

**HAN RINER**

(HAN RYNER)

**LA APEROJ  
DE AHASVERO**

el la franca originalo  
tradukis Valo.

Cercle espérantiste de l'Agenais  
Laùte! \* F 47340 Laroque Timbaut  
1980 \* 15 FF

Han Riner

(Han Ryner)

La Aperoj  
de Ahasvero

el la franca originalo  
tradukis Valo.

Cercle espérantiste  
de l'Agenais \* Laùte!  
F 47340 Laroque Timbaut  
1980 \*

Tiu ĉi broŝuro aperas en la kadro  
de SAT-broŝurservo.

Noto de la tradukinto.

Kiel pri kelkaj antaŭe eldonitaj tekstoj, la vinjeto de la Literatura Komitato ne signifas, ke ĉiuj komitatanoj aprobas mian uzadon de la pronomo "ci". Tiu uzado (cetere ne kontraŭfundamenta) ŝajnis al mi necesa pro fideleco al la originalo.

Mi ŝuldas apartan dankon al K-do Konisigaku en Minoo, kiu zorge kaj kompetente kontrolis mian manuskripton. Liaj altvaloraj konsiloj estis al mi tre utilaj.



Unua apero  
Ahasvero aperas al Lazaro

aù

LA DIALOGO PRI LA MORTO

\*\*\*\*\*

Laùlonge de riverego, Ahasvero malsupreniras. Alta, kun grandaj rigidaj trajtoj, lia forto elkrias junecon, sed kun ĝi sin miksas harmonie neniŭ alia voĉo : nek hezito nek espero, nek impeto, nek grandanimeco. La Vaganta Judo estas tia, kia li estis en la tago, kiam lia kordureco fiksis kaj durigis lian destinon.

Antaùe, la rivero furioze kuris. Nun - ŝajne en timego - ĝi malrapidiĝas, penas halti aù retroiri, starigas obstaklojn kontraù si mem. Malkuraĝa, ĵetante inter la morto kaj si malnoblegajn gestojn, ĝi ŝovadas ŝlimon sur la vojo al la proksima maro. Sed, ĉu ankoraù ĝi restas rivero ? Rivero, ĉu ci ne estas la vivo, ĝoja pri sia deklivo kaj amanta la fekundigendan estontecon ?... Tiu akvo etendiĝas, dividiĝas, stagnas en fetoraj marĉoj, elĉerpiĝas en mortaj kanaloj, perdiĝas inter kotaj insuletoj, inter kanoj, en kiuj vibras moskitoj, en kiuj siblas serpentoj.

En malproksimo, dekstre, rumoro de homamaso kaj venko. Junulino, ĉe la ekstremaĵo de sia denodita zono, trenas skvamohavan drakon, kaj, post la stranga grupo, popolo aklamas la triumfon. Ahasvero ŝajne ne aùdas, ne turniĝas. Kun mano super la okuloj kiel viziero, li longe rigardas al punkto, de kiu venas neniŭ bruo.



Jen li akcelas sian paŝadon. Kaj li murmuras :  
 - Ĉi-foje, mi kredas, ke estas li.

Senluma rideto tranĉas lian vizaĝon. Rideto rigida kaj malvarma kiel fendo en glacirivero.

Pli kaj pli larĝiĝas lia rideto. Pli kaj pli hastiĝas liaj paŝoj.

Ĉe la bordo de l'rivero, sur la trunko de mortinta tamariko, sidas viro. Kun la kubutoj sur la genuoj, la frunto inter la pugnoj, li revas en profundo. El tiu homo eliĝas ia lumo, strange pala, griza pli ol blanka, nebulo preskaŭ pli ol helo : cindra homo.

Li ne aŭdas Ahasveron veni. Li vidas nenion eksteran. Li ne havas percepton pri ĉeesto.

AHASVERO, per laŭtega voĉo :

- Lazaro, Lazaro, Lazaro, leviĝu !

Kiel risorto el stuporo, Lazaro sin levas.

Lia vizaĝo estas oni-ne-scias-kio malpreciza.

Ĉu ne pli ol karno ĝi konsistus el lumeto en

la nebulo ? La lipoj sin malfermas kiel, sub

pala radio, la randoj de nubo. Kaj

LAZARO, konsternegita, diras :

- Kiu parolis ? Kiu rediris Lian vorton ?

AHASVERO : - Mi.

LAZARO : - Kiu ci estas ?

(La okuloj de Lazaro ŝajnas fine rigardi eksteren ; oni ricevas la impreson, ke ili sin returnas al konkretaĵoj.)

- Ha ! Mi kredas rekoni cin. Ĉu ci ne estas

tiu, kiun Li kondamnis al senmoveco ?

AHASVERO, kun jesa gesto : - Mi estas Ahasvero.

LAZARO : - Mi ne komprenas... Li diris al ci :

Haltu. De tiam, oni rakontas, ke ci senriproze

marŝadas... En tiu ĉi momento, por paroli al

mi, ci ne antaŭeniras, sed cial gamboj supren-

leviĝas kaj refalas surloke, kvazaŭ ci baraktus

kontraŭ venka obstaklo... Jes, mi scias : oni

komencas rakonti, ke Li diris al ci : Marŝu !

marŝu !... sed mi, mi estis tie, mi aŭdis, mi

memoras.

AHASVERO : - Mi ĉion eksplikos al ci...Antaŭe

mi dezirus demandi cin.

LAZARO : - Parolu. Se mi povos esti utila al  
cia savo...

AHASVERO : - Mi serĉadas la morton. Sed ĝi fu-  
ĝas antaŭ mi, kiel la vivo fuĝas antaŭ la aliaj  
homoj. Estas nenio, kion mi ne provis. Mi ĵetis  
min en la plej densan parton de bataloj : sagoj  
kaj lancoj, kvazaŭ ili frapus bronzon, malakri-  
ĝis sur mi aŭ resaltis. Mi incitis leonon el  
dezerto : ĝiaj dentoj rompiĝis sur la malmolo  
de mia karno ; sur la glato de mia karno ĝiaj  
ungegoj glitis kun grinca bruo ; poste la de-  
zerta leono forfuĝis kun novaj blekegoj, blek-  
egoj de timo. Mi ĵetis min en riveregojn kaj  
en marojn : mi marŝis en la sufokaj abismoj  
kiel en plej pura aero. Mi starigis brulŝtip-  
aron, mi ekbruligis ĝin sub mia korpo : la  
flamoj lekis mian nesentemon kiel langoj de  
familiaraj bestoj. Mi malsupreniris en la kra-  
teron de Etno, dum ĝi, kun frakasbruegoj pli  
fortaj ol tondro, ĵetis fajron, fumaĵojn, kaj  
tiuajn lafojn, kiuj, de fore, ekbruligas arbojn  
kiel torĉojn : la ardaĵ furiozoj agitigis ĉir-  
kaŭ mi, por mi freŝaj kiel la flugilo de vent-  
eto. Sen iu brulvundo mi eliris el tiu infero,  
en kiu ŝtonoj fandiĝas. Kion do mi faru, mi,  
kiu volas morti ?...

LAZARO : - Mi scias, kiel oni renaskiĝas, mi  
ne scias plu, kiel oni mortas.

AHASVERO : - Pri morto mi soifas... Almenaŭ  
diru al mi la guston de la morto, ci, kiu gust-  
umis ĉe tiu pokalo.

LAZARO, skuante la kapon : - Mi ne plu scias.  
Mi jam ne memoras.

AHASVERO : - Ho ! Klopodu ! Rememoru.

LAZARO : - Mi vane provas... Tamen ŝajnas al  
mi... sed tiel malprecize...

AHASVERO : - Enmemiĝu, kaj transportu cin tutan  
en la tagojn de la tombo. Retrovu tiun guston,  
kiu fuĝas for de miaj lipoj.

LAZARO : - Guston la morto ne havas. Tia, kiel  
pura akvo...

AHASVERO : - Ho freŝeco, al kiu mi sopiras !

LAZARO : - Sed mi trinkis tiel malmulte, tro malmulte... Mi estis revekita antaŭ la kompleta dormo, antaŭ la sorĉado de la sonoj kaj la renoviĝo de la forto. Tiel, vidu, kiel laca mi estas.

(Li sin lasas refali sur la tamarikan trunkon.)

AHASVERO : - Parolu. Diru pri cia dormo.

LAZARO : - Mi ne plu scias. Ĉu cia mano ekkaptos lumradion ? Mia penso sin refermas, ĉiam elrevigita, sur la radiojn de la morto.

AHASVERO : - La radiojn, ci diras ?

LAZARO : - Vortojn mi diras... Ci demandas pri nedireblo, kaj mi provas paroli. La balbutoj de infano estos elokventa klaro, se ci komparos ilin al miaj noktaj vortoj.

AHASVERO : - Estas nenio por diri pri tio, kio estas nenio. Ci ne memoras. De la morto, ĝi estas la nenio.

LAZARO, vigle ekstarante : - Ne, ne. Sensenculo, kiu malgrandigas la aferojn laŭ la mezuro de cia senpoveco. La tero kaj la kruda vivo elportas la pezon de ciaj paŝoj kaj de cia parolo. Sed la akvoj kaj la fluida ekzisto de tio, kion ci nomas morto, lasas flui cian korpon kaj cian penson de hodiaŭ. Tamen, pro tio ne neu ilin.

AHASVERO : - Tamen...

LAZARO : - Kiel ci volas, ke la morto estu la nenio, dum mi eliris el ĝi ?

AHASVERO : - Ankaŭ infano eliras el nenio.

LAZARO : - Malsagaĵo ! Ĉu io eliĝus el nenio ! Se io, ie ajn en la spaco aŭ en la tempo, estus neniaĵo, ĉio defalus en abismon. Feliĉe, ĉie kiel ĉiam, kion ci renkontas, tio nomiĝas : la Esto.

AHASVERO : - Silentu, pro kompatato. Ĉu mia mal-espero ne ŝajnas al ci sufiĉe granda ? Lasu min kredi, ke almenaŭ la aliaj mortas.

LAZARO : - Neniu mortas en la senco, en kiu ci prenas tiun vorton. Kiam ci volas diri absolu-

ton, prononcu la nomon de la Esto. Kiam ci volas diri absoluton, supreniru al la supro de ci mem kaj krii: "Jes". Se iu diras "Ne", tio signifas "Alia Jes". Ĉu oni elirus el dormo, se la dormo estus abismo ekster la Esto? Lia parolo revekis mian penson: do mia penso daŭris.

AHASVERO: - Kia ĝi estis?

LAZARO: - Mi ne scias... Ĝi estis...

AHASVERO: - Diru, kio ĝi estis antaŭe; diru, kio ĝi estas poste. Eble, en iu ekfulmo, mi vidos. Iafoje du interbatantaj ŝtonoj elĵetas lumon.

LAZARO: - Ĝi estas la sama, sed pli kompleta.

AHASVERO: - Diru, kion plian ĝi havas.

LAZARO: - Tio estas nedireblaĵo, kaj mi ne scias, ĉu tio ankoraŭ meritas la banalan nomon penso. Prefere nomu ĝin stuporo.

AHASVERO, kun grinca rido: - Ĉu ni ne nomu ĝin frenezo?

LAZARO: - Ĉu iam ci aŭdis psalmon kantatan de unu sola voĉo? Ĉu poste ci aŭdis la saman kanton kun akompano de harpo? Neniu vorto aldoniĝis al la unuaj vortoj. Tamen la kanto sonis pli komplete; kaj ĝiaj vortoj, la samaj, kaj ĝiaj notoj, la samaj, diris pli multe, diris pli profunde kaj pli vaste. Mia penso, kanto, kiu iam sonadis sola, nun stuporo de harpo akompanas ĝin.

AHASVERO: - Stuporo de harpo?...

LAZARO: - Ci estas enfermita en tenebro kaj en nekonato; ci puŝas pordon, kaj la sunlumo envenas. La objektoj, kiujn ĝia helo donas al ciaj okuloj, estis tie, ĉiuj, antaŭ ĝi. Tamen ili surprizis cin per sia nombro kaj per sia vizaĝo el lumo. Stuporo de lumo blindigas mian penson.

AHASVERO: - Stuporo de lumo?...

LAZARO: - La objektoj, kiujn ci vidas, estas ankaŭ de infano vidataj. Ci kredas, ke ci konas ilin plibone. Ci eraras. El ĉiu el ili vibras al ĝi ĝojo, helo por ci estingita. Stuporo de

ĝojo premeblas mian penson.

AHASVERO : - Stupero de ĝojo ?...

LAZARO : - Jes, tial, ke mi mortos duan fojon. Mi vidos denove. Denove mi aŭdos.

AHASVERO : - Kion ci vidos ? Kion ci aŭdos ?

LAZARO : - Mi ĝin diras al ci, kiom oni povas diri. La vortoj ne scipovas kanti kiel la harpo, lumi kiel la suno, kaj ili ne ŝvelas kiel la ĝojo... La stuporo de ĝojo, la stuporo de lumo, la stuporo de harpo malprecizigas kaj malproksimigas, tuj kiam oni ne estas plu sola kun si mem ; se mi provas paroli pri ĝi, ĝi fuĝas for de mi kiel hontema fantomo. Provu kapti en cia mano la kvieton kaj la purecon de lago. La lume virga kvieto de la akvo, vidu, kiel, per la perforto de cia mano, ĝi malklarigas de ombroj kaj faltoj. Ĉu ci ne sentas, ke ekzistas aferoj, kiujn sufiĉas tuŝi, por ke ili jam ne ekzistu ?

AHASVERO : - Pardonu, se mi igis cin perdi...

LAZARO : - La fantomoj plej sovaĝe timemaj estas la plej fidelaj, ĉar ili estas niaj plej profundaj realoj.

AHASVERO : - Ĉar ci ne devas timi senrevenan fuĝon, provu do paroli. Kion lumigas cia suno ? Kion prikantas cia harpo ? Kion envolvas cia ĝojo ?

LAZARO : - Sin mem, sin mem ! Sed ĝi estas mi, sed mi estas ĝi. Sed, ĉu ĝi ne estas ĉio ?

Aŭskultu en la solejoj : ci aŭdos la aĵojn kanti. Rigardu, kiam neniu homa ĉesto cin kovras per sia ombro : ci vidos, ke la universo estas lumo.

AHASVERO : - Ĉiam sola mi estas, kaj mi aŭdas nenion similan, kaj mi ne vidas tion, kion ci diras.

LAZARO : - Pardonu, kompatinda senigito. Mi forgesis, ke ci povas nenion aŭdi, kaj ke ci povas nenion vidi.

AHASVERO : - Kial mi ne povus, kion povas la aliaj ?

LAZARO : - Ĉiu vivo estas dika muro. Cia ne

havas fendojn.

AHASVERO : - Kion ci nomas fendoj en la muro de la vivo ?

LAZARO : - Morto, amo... sed eble ekzistas aliaj.

AHASVERO : - Ho ve ! mi ne povas morti.

LAZARO : - Tial, ke ci ne povas ami... Amo kaj morto aperis samtempe en la vivo. Ĝis ilia veno, ĉio estis tenebro, mi volas diri : lumo, kiu neŝcias pri si. De tiam, estas iom da lumo sin konanta. Ĉio ŝajnis muta, ĉar neniu aŭdis la universalan kanton. De tiam, estas iom da ritmo sin konanta. Ĉio estis morna : feliĉo vane sin proponanta kaj klopodanta. De tiam, kelkaj floroj estas flarataj, kelkaj gojoj estas plukataj.

AHASVERO : - Mi dezirus...

LAZARO, kun fora rigardo : - En la fundo de la maroj, mi kredas ekvidi malprecizajn senmortajn vivantojn. Ili neŝcias pri amo. Ili ridetas al nenio ekstera, kaj ili ne ridetas al si mem. Sen okuloj kaj sen oreloj por la mondo ilin ĉirkaŭanta kaj por la mondo en ili enhavata, fermitaj al la aliaj kaj al si mem, senigitaj je la membroj, kiuj donas kaj prenas, tiuj monotonaĵoj unuaj meritas solaj - se ci nepre volas konservi tiun ridindan vorton - la nomon nenioj.

AHASVERO, revema : - Oni diras, ke Li reviviĝis, kaj ke Li supreniris al la ĉielo. Ĉu ci tion kredas ?

LAZARO : - Ĉiuj mortintoj reviviĝas, kaj pluraj supreniras. Antaŭ momento mi komparis la morton kun dormo, ĉar oni eligas el ĝi pli forta, pli juna, kapabla je nova goja maldormado. Sed, kiam ci provas diri nedireblon, eble ci diras malpli tion, kion ci volas, ol la malon de tio, kion ci volas.

AHASVERO : - Mi ne komprenas.

LAZARO : - Al ci kiel al ĉiuj, okazis, ke ci nomis la teron cia patrino. Ĉar la homoj ofte diras veron, sed neniam scias, kion ili diras. Ilia parolo estas blindulo, kiu lumigas lumojn. Respondu. Ĉu iafoje ci diris pri la tero : mia patrino ?

AHASVERO : - Eble mi tion diris. Nun, kiam mi pensas pri ĝi, mi trovas nenium sencon en tiu parolo.

LAZARO : - Tial ke ĝi estas tro plena. Granda lumo blindigas. En ĝi flagras mil flamoj, kaj en tiu amaso ci distingas nenium familieran vizaĝon. Tamen, da ili estas.

AHASVERO : - Penu montri unu al mi.

LAZARO : - Kiam infano estas en la ventro de sia patrino, ĉu ci opinias, ke por ĉiam ?

Kiam homo enprofundiĝas en la teron kiel grajno...

AHASVERO : - Ci timigas min... Tiel, la tombo estus...

LAZARO : - La utero de nova vivo.

AHASVERO : - Kia estas tiu nova vivo ?

LAZARO : - Kiel mi scius ? Kiel, en la sterila malvarma grenejo, la grenero divenus la ondanta klopodaĉon de la estontaj radikoj, aŭ la verdan gloron de la herbo suprenkreskanta al sunhelo ?

AHASVERO : - Al kiu ne scias, sole konvenas la silento.

LAZARO : - Escepte, kiam lin demandas tiu, kiu eĉ ne antaŭsentas. Mi ne vidas, kio estas malantaŭ la horizonto. Mi avertas la infanon, ke la horizonto ne estas kurba muro, kie finiĝas la mondo.

AHASVERO, revema : - Mi timas, ke ci diras al veron. La malesto de memoro nenion pravas. Ĉu infano memoras, ke ĝi vivis en la ventro de sia patrino ?

LAZARO : - Jes, iafoje.

AHASVERO, ekskuate : - Ci diras ?...

LAZARO : - Kiam ĝin plorigas malvarmo (kun fridosenta gesto) Ha ! kiel malvarme estas al mi !...

(Longa silento. Lazaro residiĝas sur la tamariko-trunkon. Ahasvero faras paŝon por iri foriri.)

LAZARO, lin revokante : - Ci estis al mi promesinta...

AHASVERO : - Oni ne tenas la promesojn faritajn al malamikoj de la Leĝo. Cetere, ci ne diris al mi tion, kion mi deziris aŭdi, kaj mi ŝuldas nenion al ci.

LAZARO : - Bone, foriru. Mi vidas Lin en mi. Mi vidas cin. Mi vidas la tutan scenon. Nun mi komprenas.

AHASVERO : - Ci komprenas, kial li diris al mi : "Haltu", kaj kial mi marŝadas kvazaŭ freneze ?

LAZARO : - Jes.

AHASVERO : - Tial ke li estis mensogulo.

LAZARO : - Ĉiu profunda parolo estas mensogo por la vulgaraj oreloj. Sed ci, ci scias, kaj ci estas propravole maljusta.

AHASVERO : - Do ekspliku al mi...

LAZARO : - Al tiu, kiu scias, kaj kaŝas sian scion sub mensogaj paroloj, oni ne plu respondas.

AHASVERO : - Ci ne volas plu paroli al mi ?...

(Lazaro remetis siajn kubutojn sur siajn genuojn, sian frunton inter siajn fermitajn pugnojn. Li tuta apartenas al interna spektaklo. Ahasvero lin rigardas dum momento ; poste, levante la ŝultrojn, li reekiras sian marŝadon.)

\* \* \*



Dua apero

Ahasvero aperas al Seneko

aŭ

## LA DIALOGO PRI TEMPO KAJ SPACO

\*\*\*\*\*

Vastega bieno. Ĉirkaŭ la domo, granda kaj riĉa kiel palaco, multaj sklavoj iras kaj revenas.

Je granda distanco de la domo, viro kun maltrankvila fizionomio, maljunigita de zorgoj pli ol de aĝo. Apud li staras juna virino kun okuloj kaj voĉo teneraj.

LA JUNA VIRINO : - Mia Seneko, la mango, por kiu mi petas cin kuŝigi, el ĝi ĉiun eron mi preparis per miaj propraj manoj.

SENEKO, kun suspekta rigardo : - Paŭlino, kiel malproksime ci staras de la kono pri la perfideco de miaj malamikoj. Ili povis verŝi venenon en la viandojn, kiujn ci estis preparonta, en tiujn, kiujn ci estis preparinta.

PAŪLINO : - Ne timu, mia kara sinjoro. Ĉiujn antaŭzorgojn mi prenis.

SENEKO : - Ili povis froti la vazojn kaj la tranĉilojn. Ili povis...

PAŪLINO : - Pro timo morti eble per veneno, ĉu ci kondamnos cin morti certe pro malsato ?

SENEKO : - Trankviligu cian koron, mia Paŭlino. Malmulto sufiĉas por subteni la korpon de saĝulo. Mi plukas frukton de iu arbo, kiun, en la vastego de la bieno, miaj malamikoj ne povis antaŭe vidi. Mi trinkas el fontano, kiun neniu konas. Ĝi estas sekreta kaj diskreta ; neniu murmuro ĝin elkonigas, kaj neniam iu spuro de

fremdaj paŝoj... (Li haltas, paligante, kvazaŭ subite la vortoj stranguliĝas en lia gorgo).

Kion faris mi, malsingarda ?

PAŬLINO, rugigante : - Kion ci diras, mia Seneko ? (Ŝi almetas manon al sia dolora koro)

SENEKO : - Ho ! mi plene fidas al cia amo kaj al cia fideleco. Sed unu vorto, kiun ci senatente preterlasus...

PAŬLINO : - Mi scias silenti.

SENEKO : - Permesu, ke mi restu sola.

PAŬLINO : - Kial ? Tiu sovaĝa humoro...

SENEKO : - Sokrato mortanta forigis sian edzinon.

PAŬLINO : - Sed mi ne volas, ke ci mortu ! Sed Ksantipa ne amis Sokraton, kaj mi cin amas kiel dion. Ha ! kiom kruela estas al mi cia prudento!

SENEKO : - Iru, mia Paŭlino. Ci scias, ke ankaŭ mi cin amas. (Li kisas ŝin, legere, distrite). Sed mi bezonas resti sola kun mi mem.

PAŬLINO : - Mi foriras, malgaja, sed nekapabla rezisti al deziro cia. Kiam ci deziras mian apudeston, voku min. Cia voko estos al mi granda gojo.

SENEKO, kun komenco de malpacienca : - Mi scias... Iru... Mi cin vokos, aŭ mi iros al ci.

(Paŭlino foriras). Seneko, restinte sola, marŝas, jen kun la frunto klinita sub la pezo de pensoj kaj timoj, jen plej ofte kvazaŭ freneza, kun la kapo agitata, la okuloj dekstren, maldekstren moviĝantaj, kun la korpo abrupte turniĝanta por surprizi malamikon kredeble tie gvatantan, eble ĵus senmaskiĝintan por agreso.

Lia malkvieta promenado kondukis lin tre malproksimen, ekster atingeblo de voĉo.

Subite, viro eliĝas de malantaŭ granda kverko. Tiu viro estas nuda. Li tenas en mano bastonon pezan kiel klabo. Li aspektas timinde fortika kaj lerta.

Seneko volas fuĝi. Antaŭ li staras la viro, kiu kun etenditaj brakoj fermas la pasejon).

SENEKO, balbutante : - Ĉu frenezulo aŭ malamiko? LA VIRO - Nek frenezulo nek malamiko... Iu, kiu

deziras interparoli kun saĝulo. (Li rideksplodas) Ha ! ha ! ha !

SENEKO : - Kial ci ridas ?

LA VIRO : - Sed ci, kiel ci povas ne ridi, kiam oni nomas cin saĝulo ? Ha ! ha ! ha !

(Seneko estas vundita en la tuta amplekso de sia vanteco. Sed, tial ke li timas, li penas ridi, kompleze, esperante pacigi la strangan dangeran estulon).

SENEKO : - He ! he ! he ! Ci scias, ke neniu homo meritas la nomon saĝulo. He ! he ! ci estas vera stoikisto.

AHASVERO : - Mi ne estas pli stoikisto ol Seneko mem.

SENEKO : - Ne stoikisto, mi ? Do, laŭ cia takso, kio mi estas ?

AHASVERO : - Ci estas stoikisto laŭ la sama maniero, kiel barbaro pagata de Romo estas romano.

SENEKO : - Kial ci insultas min ?

AHASVERO : - Vero ne estas insulto.

SENEKO, ribelante : - Frapu min, se ci volas. Mortigu min, se ci tion promesis. Plenumu la ordonon de ci ricevitan, kaj gajnu la imperiestran monon. Sed ĉesu insulti min per mensogoj... Frapu do, por ke mi montru al ci la animan fortecon de stoikulo.

AHASVERO : - Se mi frapus, ci parade drapirus tremantan korpon en aroganta togo. Mi cin konas : ci ne estas kuraĝa kaj simpla homo ; ci estas histriono de la filozofia teatro : malkuraĝa vizaĝo kovrita per heroa masko. Mi cin konas : ci scias cian rolon, kaj ci dirus la vortojn direndajn ; sed parolus cia memoro kaj cia vanto, ne la virto ; ju pli noblaj estus ciaj paroloj, des pli ci mensogus al ci mem.

SENEKO : - Kiu do ci estas, ke ci kredas havi la rajton malŝati min ? Kaj kion ci volas ? Diru al mi cian nomon.

AHASVERO : - Pri nenio cin instruus mia nomo. Ĉu ci konas Ahasveron ?

SENEKO : - Efektive, tiuj silaboj estas al mi novaj.

AHASVERO : - Eble baldaŭ mi diros al ci iom el mia vivo. Kaj ci, kiu amas la maloftajn sciaĵojn...

(Seneko per abrupta movo provas fuĝi.

Ahasvero ekkaptas lian manartikon).

SENEKO, tremante : - Ci estas malvarma kiel la morto. Ĉu ci estus la morto ?

AHASVERO : - Ha ! ha ! ha ! Ci deliras, mia majstro. De kiam la morto havas homan vizaĝon ?

SENEKO : - CIAJ trajtoj estas duraj kiel ŝtono aŭ kiel destino... Sen la senhalta moviĝado de ciaz gamboj, mi kredus pli pri statuo ol pri homo.

AHASVERO : - Se, por nomi estulon homo, ci postulas, ke tiu estulo estu mortema, mi ne estas homo.

SENEKO, penante al kvieto, ingenio kaj ironio :  
- Mi divenas. Simile al niaj imperiestroj, ci estas iu, kiu diigas. Sed ili sin malvestas de la vivo por vesti sin per senmorteco, kaj neniu diros, ĉu ili gajnas aŭ perdas de la sango. Koncerne cin, estu milda al homo, kiu scias paroli per rondigita buŝo, kaj mi celebros cian apoteozon.

AHASVERO : - Kiel ci celebris tiun de Klaŭdio... Tio kaj espero igis cin adori Klaŭdion vivantan. Sur la mortinton ci elsalivis tutan cian malkuraĝan malamon. Samtempe ja, ci skribis pri la sama homo bombastan oficialan laŭdon. Ho multfaca grandanimo kaj mirindaj kontraŭdiroj de stoika filozofo !

SENEKO : - Mi dezirus vidi cin en mia loko. Mi dezirus vidi tie la plej fortajn el la saguloj.

AHASVERO : - Eble Sokrato, Diogeno, Zenono aŭ Kleanto...

SENEKO, klinante la kapon : - Ekzistis kelkaj homoj pli bonaj ol mi.

AHASVERO, levante sian bastonon : - Tia konfeso eliĝu denove de ci, kaj mi cin buĉos.

SENEKO : - Kial ? Kiel grave por ci ?

AHASVERO : - Ke mi cin elektis, ho plej malŝatinda el la saĝamantoj, estas tial ke mi bezonas malŝati ĉian saĝon. Mi ĉiam bezonas malŝati saĝon, malamikon de justo.

SENEKO : - Ho malsaĝaĵo !

AHASVERO, ne aŭdinte la interrompon : - Hodiaŭ mi bezonas malŝati ĉion homan, kaj eĉ, se iel ekzistas io dia, ĉion dian . Mi cin elektis kiel la plej lertan el la advokatoj, por ke ci parolu al mi kontraŭ la homojn, kaj precipe kontraŭ la saĝulojn. Ci scipovas pledi por kaj kontraŭ. Pledu bone, por kontentigi cian vant-econ, kaj samtempe kontentigi malfacilan klienton.

(Li akompanigis tiujn lastajn vortojn per minaca gesto).

SENEKO, ridetante : - Mi konsentis mensogan konfeson, kiu ŝajnis plaĉi al ci. Ĉar ci elportas veron, mi diris la veron. Iuj homoj de filozofio pli dura ol forta volas, ke la saĝulo rifuzu al neceso eĉ unu parolon, kaj al malfeliĉo eĉ unu ĝemon. Ilia tromemfido pravas ilian nescion : ili konas nek malfeliĉon nek neceson ; ili konas nek la eksterajn tempestojn nek la povran barkon, kiu estas ĉiu el ni. Se ili dum jaroj spertus la monotonecon de la plata kvieto, mi aludas la mortecan korsikan ekzilon, kiun mi spertis, oni vidus ilin malfortaj kaj plorantaj kiel infanoj. Se uragano ludus per ili, levante ilin al la supro de siaj malsekaj montoj, ĵetante ilin malsupren en siajn valojn, kiuj ŝajnas fali pli profunden ol la fundo de la maro ; se esperoj pli ol homaj, pli ol imperiestraj ĵetus iliajn pensojn al ĉielo el gloro kaj frenezo ; se, en la tujposta momento, teruroj pli ol sklavecaj emocius ilin sub vizioj de malnoblaj mortoj kaj torturoj, kio fariĝus el ilia vorta saĝo ? Ŝtalo plej rigida estas ankaŭ plej fragila. Per unu bato, fortuna disrompus ilian orgojlon. Plej fanfaronaj estas plej malkura-

ĝaj. Tiuj ĉi ne scius kiel mi la flatojn inge-  
niajn kaj korektatajn per ironio ne perceptebla  
de la krudaj Klaŭdioj. Sed iliaj krioj tordigis  
kiel senesperaj brakoj, kaj iliaj laŭdoj al la  
forto estus sinceraj ĝis rampado en la koto.

AHASVERO : - Mi ĝojas, kiam ci recitas tiujn  
belajn parolojn, similajn - krom tio, ke en  
ili la ironio sin konfesas, fariĝinte sendan-  
ĝera - al tiuj, kiujn ci skribis de Korsiko al  
Polibio, la dieca liberigito.

SENEKO : - Kiel grave, al kiu mi skribis ilin,  
kaj en kiuj cirkonstancoj ? Senigu ilin je ĉio,  
kio ne estas ili mem ; studu ilin kaj pesu  
ilin en ilia nudeco ; poste, diru, ĉu ili es-  
tas veraj, ĉu falsaj.

AHASVERO : - Mia deziro, mia volo, mia akra  
soifo trovi nur malaltecon kaj ŝlimon en la  
homoj, asertas, ke ili estas veraj. Kaj mi cin  
amas super ĉiuj oratoroj kaj ĉiuj filozofoj, ho  
superbela malnobliganto de saĝo.

SENEKO, revema : - Tamen, saĝon mi amas.

AHASVERO : - Kiam pli materiaj bonoj fuĝas de  
cia brakumo, tiam ci avide ĉirkaŭbrakas tiun  
fantomon. Kiam ci malesperas fariĝi Jupitero  
kaj posedi Junonan, tiam ci kontentigas cin,  
ho Iksiono, per nubo formita laŭ la diino. Ha!  
ha! ha! lasu, ke mi ridu pri la pretendaj kaj  
frenezaj himeroj, kiujn ci naskas en tiuj ho-  
roj.

SENEKO, kun malafabla vizaĝo : - Mi ne scias,  
kion ci aŭdas.

AHASVERO : - Ekzistas du saĝoj. Mi trovas ilin  
kunigitaj en ci, kaj mi trovas ilin en ci mal-  
purigitaj kaj ridindigitaj. Nenie pli bone ol  
en cia koro, en cia menso kaj en ciaj gestoj  
mi legus, ke ĉia saĝo estas mensogo.

SENEKO, kun reŝiriĝo de la tuta brusto : - Miaj  
oreloj cin aŭskultas ; mia inteligento ne aŭdas  
cin.

AHASVERO : - Ĉu en cia juneco ci ne vivi pita-  
gorane ?

SENEKO : - Ci diras ĝuste. La milda elokvento de Sotiono kondukis min al abstinenco je ĉia animala nutraĵo. El tio mia menso ŝajnis pli lerta.

AHASVERO : - Ĉu tial, ke ĝi plilertigis cian menson, plaĉis al ci tiu vivo ?

SENEKO : - Sendube.

AHASVERO : - Ci do neniam amis virton kaj senkulpecon pro ili mem ?

SENEKO : - Ĉu la beleco de l'virto ne konsistas el tio, ke ĝi, liberigante la menson, preparas ĝin al kono pri la ĉielaj kaj teraj aferoj ?

AHASVERO : - Ĉiuj pitagoranoj dirus kiel ci. Sed ĉiuj stoikistoj kontraŭbatalus cian diron. Laŭ ili kono estas servisto, kaj virto estas reĝo.

SENEKO : - Neniel. Zenono kaj Krizipo unuigas sciencon kaj virton en nedisigeblan tuton.

AHASVERO : - Sed kiu scias la bonon en tia maniero, por arte paroli pri ĝi, ne por ĝin praktiki, tiun ili rifuzas nomi klerulo. Laŭ ili, klerulo estas virtulo, eĉ se lia vido pri la aferoj ŝajnas konfuza, kaj se li restas nekapabla esprimi la veron alimaniere ol per siaj agoj.

SENEKO : - Mi konfesas, ho subtila, ke ci diras la veran doktrinon de la antikvaj stoikistoj.

AHASVERO : - Ci, kiu faras el la virto nur rimedon por la scienco, el la senkulpa vivo nur vojon al kono, ĉia natura deŭlivo fluas al Pitagoro, ne al Zenono kaj Kleanto.

SENEKO : - Ci malfermas miajn okulojn.

AHASVERO : - Nu, tiu vivo, kiu cin ĉarmis kaj faris el ĉia inteligento lumon pli puran, ĉi forlasis ĝin. Kial ?

SENEKO : - Oni jam persekutis la fremdajn kultojn, kaj, inter la indicoj de tiuj superstiĉoj, oni notis la abstinadon je certaj viandoj. Mia patro timis la denunceojn, kiuj estus fermintaj al mi la vojon al estonteco,

kaj li facile persvadis min fari pli agrablajn manĝojn.

AHASVERO : - Do, ekde la frua juneco, la ambicio estis sur ci pli forta ol cia filozofia penso plej kara kaj plej centra.

SENEKO : - Mi ambicias ankaŭ esti filozofo.

AHASVERO : - Mi scias... sed la stoika doktrino, kiu diras ekzakte la malon de cia animo, kiu lokas la honestan vivon super la sciencon, aŭ pliĝuste, kiu forigas la sciencon por fari el ĝia nomo plian gloron al la honesta vivo ; kiu, kiel Sokrato, malŝatas la fremdajn sciojn kaj ripetas : "Konu cin mem" ; tiu doktrino, kiu verŝajne aspektas al ci kiel barbaraĵo kaj malriĉaĵo, kiel kaj kial ci elektis ĝin ?

SENEKO : - Mi tamen ne povis laŭdi la epikuran molecon !... La plej bonaj estus deturnintaj sin de mi.

AHASVERO : - Ci deziris dogmon, kiu ne malutilu al cia ambicio, kaj kiu, se bezone, servu al ĝi. La stoikismo estas politika partio.

SENEKO : - Jes, jam de multaj jaroj. La partio de virto, kaj, se mi aŭdacas diri, la partio...

AHASVERO : - Ci varbis cin en partion, kiu povis fari, kaj kiu faris cian bonan fortunon. Ci edzinigis ĝian doktrinon, kiel avida viro deziranta doton edzinigas la virinon neapartigeblan disde la doto. Kaj tamen, en la fundo de sia koro, li amas alian.

SENEKO : - Ho ve ! Kial mi ne restis fremda al la aferoj ! Kial mi ne restis fidela al mia unua filozofia amo ?...

AHASVERO : - Ci estas nekapabla je fideleco kaj kvieteco. Alie, la korsika ekzilo, kiu cin elvolvis en trankvila libero, kiu duobligis, por laboro kaj medito, la longon de la tagoj kaj de la jaroj...

SENEKO : - He ! Ĉu estas eble vivi longatempe ekster Romo ?...

AHASVERO : - Mi amas en ci ambiciulon tiel maltrankvilan kiel miaj gamboj. Mi cin amas tial ke, kiam necese por cia promocio, ci kuŝis en



la lito de Agripino.

SENEKO, timigite : - Silentu !... Inter miaj sklavoj povus esti iu denunciisto.

AHASVERO : - Kaj mi cin amas tial ke, kiam cia promocio tion necesigis, ci donis bon-egajn konsilojn koncerne la murdon de cia eks-amorantino.

SENEKO : - Silentu do, silentu.

AHASVERO : - Jen kiaj mi amas la filozofon.

SENEKO, reprenante kuragon kaj deturnante la konversacion : - Ci ja ĝuste diris. Mi estas amiko de tiu saĝo, kiu estas scio, pli ol de tiu saĝo, kiu estas virto. Eble la dioj donis al mia animo pli da inteligento ol da forto. Estu grandanima, kaj satigu mian sci-deziron. Cia vivo, kredeble, estas trezoro de mirindaj sekretoj. Malfermu la trezoron antaŭ mi, kaj mi cin amos.

(De antaŭ momento, Seneko ekkaptis en faldo de sia togo mallongan solidan ponardon. Ĉu la rideto de liaj lipoj konsistas el afekta komplezemo, aŭ el malico kaj kruela espero? Liaj okuloj avide rigardas la okulojn de Ahasvero, kaj li sin tenas preta por frapi ĉe la unua duba movo, ĉe la unua incita vorto, eble simple ĉe la unua favora okazo.)

AHASVERO : - Antaŭ ol mi respondos, frapu min per cia ponardo.

(Seneko, surprizita, lasas fali sian armilon. Ahasvero sin klinas, ĝin levas per la pinto, ĝin prezentas, ridante, al la filozofo, kiu, per versaĵne nekonscia gesto, ĝin reprenas).

AHASVERO : - Frapu, frapu do (Seneko restas muta kaj senmova). Mi forgesis. Singardemo estas unu el la kvar virtoj, kiujn la saĝuloj nomas kardinalaj \*. Do saĝulo frapos prefere de malantaŭe. (Li turnas la dorson al Seneko kaj krucigas la brakojn sur sia brusto.) Nu, ek ! Mi eĉ ne vidas ciajn gestojn. Decidiĝu.

\* kardinala 2 = fundamenta (PIV).

SENEKO : - Saĝulo frapas nur pro neceso, se al li restas neniu alia rimedo por savi sian vivon. Nu, mi ne estas certa, ke ci malbonintencas al mia.

AHASVERO : - Kiam ci estus certa, estus jam tro malfrue.

SENEKO : - En dubo mi min detenas. Mi preferas la danĝeron perei al la danĝero kulpi krimon.

AHASVERO : - Kuraĝa viro, kiu, eĉ de malantaŭe, ne aŭdacas frapi per sia mano... Ha ! se estus nur ordono por doni ; se ĉi tie estus Aniceto, preta obei al ci... (li abrupte sin returnas). Nu, ek ! ankaŭ min, frapu min en la ventron.

(Frenezigitate ĉe la memoro pri sia plej abomena krimo kaj ĉe la sangaj ironiaĵoj de Ahasvero, Seneko, urĝata en impulso kaj kapturono, frapas ja la nudan ventron)

• Stuporo : la ponardo rompiĝis kontraŭ la nepenetrita karno. Splito gratvundetis vangon de la filozofo. Senmezura rido ŝajnas plenigi la spacon.)

SENEKO, lasante sin fali surgenue en premegiĝo de malvenko : - Ĉu mi frenezigas ? Ĉu mi kredus, kiel trivialuloj, pri dioj kun homa formo ?

AHASVERO : - Ĉu do ne ĉiuj formoj, ha ! ha ! ha ! apartenas al la dioj, pri kiuj ci konsentas ?

SENEKO : - Diru, kiu ci estas, aŭ frapu min... Prefere la morton ol tiun agonion de la menso antaŭ neeblo.

AHASVERO : - Ho malbona filozofo ! Ci nomas neeblo tion, kio ekzistas.

SENEKO, sin relevante : - Ci pravas. Estas tiom da manieroj ekzisti... Ha, kiel mi volus vekigi, eskapi de tiu terursonĝo...

AHASVERO : - Ordinare, la konscio pri sonĝo kaj la volo pri vekigo sufiĉas. Nu, vekigu.

SENEKO, frotante siajn okulojn : - Mi daŭre cin vidas (Metante manon sur la bruston de Ahasvero) : Mi daŭre cin tuŝas, fantomo dura kaj glacia.

(Li provas pinĉi karnon inter siaj fingroj. Liaj fingroj glitas kiel sur marmoro. Li kurbigas ilin kaj tiras ilin al si en skrapogesto.)

Liaj ungoj grincas kaj rompiĝas).

SENEKO, abrupte ekkaptante brakon de Ahasvero :

- Kia ajn estu la danĝero, mi ne lasos cin sen scii, kiu ci estas.

AHASVERO, en rikano : - Gardu, ke ci ne fariĝu simila al mi.

(Seneko retroiras en subita teruro, poste sin reproksimigas kaj ridetas).

SENEKO : - Saĝulo povas alfronti ĉian destinon.

Kiam tiu, kiu pezas sur li, fariĝas tro peza, li vokas la morton : la morto obeas al ĉiuj vokoĵ kaj malsarĝas de ĉiuj ŝarĝoj.

AHASVERO, per voĉo profunda kiel singulto :

- Morti mi ne povas.

SENEKO : - Ci diras ?...

AHASVERO : - Ci vidis la senpovecon de la fero sur mia malmola karno. Ne pli povas veneno al miaj intestoj. Akvo ne sufokas min. Fajro ne bruligas min. Mi eliris vivanta el la kratero de Etno.

SENEKO, kun freneza rido : - He! he! ĉu ĉi tiu estus la antikva Empedoklo ?

AHASVERO, severe : - Mi diris al ci, kiu mi estas. Mia sola nomo estas Ahasvero.

SENEKO : - Kiel restas nekonata la nomo de tiel stranga estulo ?

AHASVERO : - Ordinare mi kaŝas min de ĉies okuloj. Aŭ mi pasas vestite kaj ne vidate de la amasoj. Jam 30 jarojn ci estas la dua homo, kun kiu mi parolas. Mi devus diri la unua. Ĉu tiu, kiu trapasis morton, estas ankoraŭ homo ?

SENEKO : - Ĉu ci iam naskiĝis ? Aŭ ĉu ci kredas cin eterna, kiel ci pretendas cin ne mortonta ?

AHASVERO : - Mi naskiĝis antaŭ 63 jaroj.

SENEKO : - Laŭ vido, ĉi estas 30 jarojn pli juna ol mi. Laŭ kredo, ci estas 2 jarojn pli aĝa.

AHASVERO : - Mi havas la aĝon, kiun Li havas.

SENEKO : - Pri kiu ci diras ?

AHASVERO : - Mi ne scias. Ĉu pri homo ?...

pri saĝulo ?... pri dio ?... Sed, kiu ajn li

estas, pri estulo, kiun mi malŝatas kaj kiun mi malamas, ĉar li ignoris juston.

SENEKO, ridante : - Ĉu ankoraŭ ekzistas tiel junaj dioj ?

AHASVERO : - Tiu, pri kiu mi diras, estas mortinta.

SENEKO : - Ĉu dioj vivantaj malpli longe ol homoj ? ...

AHASVERO : - Ĉiaj vortoj kaŭzas al mi bonon.

Priridu lin, kaj mi cin amos. Ĉu ne, li ne estis dio, tiu, kiu mortis 33-jara inter du ŝtelistoj, sur kruco.

SENEKO : - Sur kruco ? Do, sklavo-dio ?

AHASVERO, ekkaptante Senekon per brako : - Ci tamen vidas unu el la efikoj de lia potenco, unu el la mirindaĵoj, de li plenumitaj. Liajn aliajn miraklojn mi povas nei. Sed min, ĉu mi povas nei ?

SENEKO : - Kion ci diras ? Ci parolas hazarde, pli malklare ĉe ĉiu vorto. Prefere lasu, ke mi cin demandu, kaj fine mi scios.

AHASVERO : - Do demandu, kaj mi respondos, ha! ha! neantaŭvidita Sokrato !

SENEKO : - Mi jam scias, ke ci naskiĝis antaŭ 63 jaroj. Ĉu ci eliĝis el la ventro de virino ?

AHASVERO : - Jes.

SENEKO : - Ĉu kun la strangaj karakteroj, kiuj faras el ci monstron aŭ dion ?

AHASVERO : - Ne.

SENEKO : - ... aŭ ĉu tia, kiaj la aliaj homidoj ?

AHASVERO : - Tia, kiaj la aliaj infanoj. Eble iom pli akra, iom pli dura, iom pli kruela, kiel diras la kompatemaj malsaĝuloj.

SENEKO : - Ĉiuj infanoj estas kruelaj. Nia koro estas ĉiam pli juna ol ni.

AHASVERO : - Mia justo, ekzakta kiel matematiko, malhelpis, ke en mi naskiĝu tio, kion ci nomas koro.

SENEKO : - Ĉu neniam ci havis ian kompatan movon ?

AHASVERO : - Neniam.

SENEKO : - Ĉu neniam ci amis virinon ?

AHASVERO : - Mi amis buŝon, kiel oni amas frukton.

SENEKO : - Neniam ci spertis teneran emocion rigardante la fragilan gracion de infano ?

AHASVERO : - La infanojn mi ne rigardis.

SENEKO : - ... neniam melankolion, rigardante maljunulon kliniĝantan al tombo ?

AHASVERO : - La maljunulojn mi rigardis por enorgojligi pri mia forto kaj juneco.

SENEKO : - Sed cia patro ?... sed cia patrino?..

AHASVERO : - Mia patrino mortis naskante min.

Mia patro estis akra kaj dura kiel mi, sed ofte li forgesis pri justo. Ĉu ami ?... ami oni ne devas. Amo konfuzas la ĝustecon de la juĝo kaj la ĝustecon de la gesto. Mi estus volinta estimi kaj respekti mian patron. Tion ne permesis la neegaleco de lia konduto. Al miaj okuloj li ne estis ordinara maljunulo, ĉar li estis tirano, objekto de mia malamo.

SENEKO : - Ci estas kapabla je malamo : koron ci havas.

AHASVERO : - Eraras tiuj, kiuj metas en la koron la sidejon de malamo.

SENEKO : - Kie do ci lokas ĝin ?

AHASVERO : - La malamon mi ĉiam sentis en la kapo. Ĝi igas min klini la kapon, kiel por frapi per obstina frunto. Mi sentas ĝin tie kaj tie (li tuŝas tute supre, ambaŭflanke de sia frunto), kiel du kornoj el kolero kaj potenco.

SENEKO, post momenta pripenso : - Ŝajnas al mi, ke ci ĝuste diras. Mi pensas pri iu, kiun mi ne nomos, kaj mi spertas tion, kion ci diras.

AHASVERO : - Sed, se ĝi konstatas sin senpova, la malamo baldaŭ malsupreniras en la buŝon ; kaj ĝi havas guston de naŭzo.

SENEKO : - Ankaŭ tion mi sentas. Sed ni foriĝas de tio, kion mi deziras scii... Je kioma aĝo la dureco de cia koro durigis ciajn membrojn ?

AHASVERO : - Je 33 jaroj.

SENEKO : - Ĉu abrupte, aŭ per neperceptebla progreso ?

AHASVERO : - Abrupte.

SENEKO, ridante : - Kaj niaj filozofoj asertas, ke la naturo de la aferoj neniam faras saltojn...

AHASVERO : - Eble ne natura estas tio, kio okazis al mi.

SENEKO : - La naturo de la aferoj estas ĉio, aŭ ĝi ne estas. Natura estas ĉio, kio okazas.

AHASVERO : - Mi volus kredi cin. Tamen...

SENEKO : - Malsano mortigas malrapide, kaj estas nature, ke oni malrapide mortu. La salto de Leŭkado mortigas subite, kaj estas nature, ke oni subite mortu. Multaj ŝanĝoj, kiel la morto, povas okazi aŭ malrapide, aŭ subite.

AHASVERO : - Kio subite okazis, kiel ĝi detruigos ?

SENEKO : - Tio povas dependi de fremdaj aferoj. Inter la malrapidaj ŝanĝoj, pluraj elvolvas germon, kaj glano uzas jarojn por fariĝi kverko. Aliaj dissolvas la malrapidajn kombinaĵojn, kaj la kverko uzos jarcentojn por morti, se la fulmo de l'ĉielo aŭ la hakilo de arbaristo...

AHASVERO : - Do subita ŝanĝo estas akcidento el ekstere veninta.

SENEKO : - Ĉar la materio elportas la multecon de la aferoj kaj ilian skuigadon, estas nature, ke iliaj renkontoj kaŭzas akcidentojn.

AHASVERO : - Ne tiel nature, kiel...

SENEKO : - Kiam la ŝanĝo jam ne estas la elvolviĝo de la naturo de unu afero, iafoje ĝi estas la geedziĝo de la naturoj de du aferoj. La naturo de ligno permesas, ke ĝi brulu ; la naturo de fulmo volas, ke ĝi bruligu tion, kion ĝi tuŝas. La naturo de ligno permesas, ke ĝi estu tranĉota ; la naturo de hakilo volas, ke ĝi tranĉu.

AHASVERO : - Tamen mi preferus nomi natura la unuan ŝanĝon.

SENEKO : - Ĝi diferencas de la alia nur pro la malforteco de ciaj okuloj. Ĝi estas la hontema

kaj supla geedziĝo, kiun ci nescias. Ĉu ci tion scias aŭ ne, la aferoj sin interpenetras. La elementojn por la kverko la glano ŝtelas de la tero, de la humideco, de la aero, de...

AHASVERO : - Do, kio al mi okazis, tion mi jam antaŭe portis en mi?...

SENEKO : - Kiel ĉiu glano kaj ĉiu kverko, ci portis mil destinojn. Sed ci ne estis sola voranta pasivajn materiojn. Aŭ, pli ĝuste, nenio estas pasiva. Tiu aero, kiu nutras la arbon, post momento nomiĝos uragano, kaj ĝin elradikigos. Ekstera akcidento - fulmo, vento, hakilo - povos elekti inter ciaj destinoj kaj, elsprucigante tiun, kiun ci malplej konis aŭ amis, mortigi ĉiujn aliajn.

AHASVERO : - Mi kredas, ke ci diras veron.

SENEKO : - Ĉar subita estis la ŝanĝo, kiu cin malesperigas, rakontu al mi la renkonton, kiu ĝin estigis.

AHASVERO : - Mi loĝis en Jerusalemo. Mi aŭdis pri profeto el Galileo. Sed oni parolis pri tiom da profetoj...

SENEKO : - Kio estas profeto ?

AHASVERO : - Homo potenca per agoj kaj vortoj. Homo, kiu faras mirindaĵojn kaj anoncas la estontecon.

SENEKO : - Mi povas fari mirindaĵojn por ciaj okuloj, se mi konas pri la naturo de la aferoj iun leĝon, kiun ci nescias. Sed por mi, kiu scias la kaŭzon de tio, kion ci vidas, kaj la leĝon, kiu unuigas kun ĝia kaŭzo tion, kion ci vidas, ne ekzistas mirindaĵo.

AHASVERO : - Tiel, ĉiu miraklo estus artifiko ?

SENEKO : - Multaj mirindaĵoj fariĝas per la renkonto de sciantaj manoj kaj de nesciantaj rigardoj. Sed la nescio de la okuloj sufiĉas por produkti kelkajn.

AHASVERO : - Ho konsola doktrino, se mi povus ĝin kredi... Eble ĝi estas vera por la aliaj, por tiuj feliĉuloj, kiuj mortos.

SENEKO : - La naturo de la aferoj bezonas la tuton de la materio. Neniam ĝi donas ĝin defi-

nitive. Ĝi konsentas al la formoj neegalajn tempolimojn, sed ĉiam ĝi repostulas tion, kion ĝi pruntedonis.

AHASVERO : - Ci do esperas, ke mi iam mortos ?

SENEKO : - Iam la tero mortos. Tiam, sur kio-sin apogus cia formo ?

AHASVERO : - Kion ci intencas esprimi, kiam ci diras : La tero mortos ?

SENEKO : - Ĝi ekbrulos.

AHASVERO : - Fajro povas nenion kontraŭ mi.

SENEKO : - La fajro de malgranda fajrujo kiel Etno. Sed kiam, en la freneza konfuzego de l'ĉielo, la tero estos ŝanceliganta flamo, kie ci metus ciajn piedojn ?

AHASVERO : - Mi ne scias. Mi timas esti nemortema.

SENEKO : - Ci ne estas nemortema pli ol Etno aŭ la tero... Koncerne tiun estontecon, kiun anoncas ciaj profetoj...

AHASVERO : - Jes, kion ci opinias pri ĝi ?

SENEKO : - La estonteco estas kverko, kies estinteco estas glano ; la estonteco estas glano, kies estinteco estas kverko. La estonteco estas birdo, kies estinteco estas ovo ; la estonteco estas ovo, kies estinteco estas birdo.

AHASVERO : - Ci parolas kiel profeto.

SENEKO, ridetante : - Se mi dirus aferojn pli precizajn, mi riskus erari.

AHASVERO : - Ci preskaŭ donas al mi ĝojon.

SENEKO : - Glano ebligas anonci kverkon ; kverko promesas glanojn, kaj se nenio malhelpos, ĝi tenos sian promeson. La estonto, kiu estas la nura elvolviĝo de la naturo de iu afero, estas antaŭvidebla.

AHASVERO : - Sed tiu, kiu estas geedziĝo de la naturo de du aferoj ?...

SENEKO : - Miaj timoj kaj miaj esperoj ĝin diras en mi. Mi lasu ilin laŭte paroli, kaj jen mi estas profeto. Mi eĉ anoncas trian estontecon pli malfacilan : tiun, kiu estas konfuza batalo inter multaj aferoj, aŭ ilia ama miksiteco.

AHASVERO : - Do, laŭ ci, ĉiu profetaĵo estas mensoga.



SENEKO : - Ja ne. Mi estas nun kredema al la vortoj de mia espero, poste al la vortoj de mia timo. Ciaj profetoj, mi tre mirus, se ili ne dirus hodiaŭ jes kaj morgaŭ ne.

AHASVERO : - Ili ĉiam anoncadas, ke la Eternulo estas incitita...

SENEKO : - Kompatinda Eternulo !

AHASVERO : - ...sed lia furiozo, ili diras, povas esti pacigita. Ili minacas kaj ili promesas. Pluraj proklamas, en unu sola diskurso, sed por sinsekvantaj tempoj, la tagon de kolero kaj la tagon de promeso.

SENEKO : - Tiel, kio ajn okazos, bono aŭ malbono, ili estos ĝin anoncintaj. Ankaŭ mi diras: "Se neniu ŝtormo sternos tiun grenon, mi rikoltos abundajn grajnoj".

AHASVERO : - Sed ili asertas, ke la ŝtormo sternos la grenon.

SENEKO : - Ne. Ci diris antaŭ momento, ke la ŝtormo povas esti forigita.

AHASVERO : - Sendube. Per preĝo, per pentofaro.

SENEKO : - Se cia rikolto maturiĝos, ci kredos, ke ci sufiĉe preĝis kaj sufiĉe pentofaris. Se cia kampo estos difektita, ci riproĉos al ci : "Mi ne sufiĉe preĝis ; mi ne sufiĉe punis min pro la grandeco de miaj krimoj". La profeto ne riskas erari.

AHASVERO : - Kaj ni estas tiel naivaj, ke ni kredas ilin !

SENEKO : - Tiel iafaĵe vi mem realigas la profetaĵojn. Se al du naivuloj mi anoncos : "Unu el vi estas destinita por mortigi la alian", mia parolo naskos murdon.

AHASVERO : - Mi ĝojas, ke mi cin renkontis. Ci penetrigis en min veron pacigan kaj bonodoran kiel suko de frukto.

SENEKO : - Koncerne la okazajn nedependajn de ni, ciaj profetoj kaj niaj aŭguristoj, kaj la divenistoj de la Grekoj diras ĉiuj la faman vorton de Tirezio : "Kion mi vidas, tio okazos aŭ ne okazos".

AHASVERO : - Kion Li vidis, tio okazis ; kion

Li vidis, tio sendube daŭros eterne.

SENEKO : - Pri kiu ci parolas ? Ĉu pri tiu, kiun ci renkontis en cia 33-a jaro ?

AHASVERO : - Guste ci diris.

SENEKO : - Li estis unu el tiuj profetoj ?

AHASVERO : - Jes.

SENEKO : - Kiel li estis nomata ?

AHASVERO : - Jesuo de Nazareto.

SENEKO : - Nekonata nomo.

AHASVERO : - Nomo pli kaj pli fama en Izraelo, kaj jam aŭdita de pluraj en Romo. Oni adoras lin kiel dion.

SENEKO : - Oni adoras tiom da novaj dioj...

Tiuj, kiuj venas el Oriento tre sukcesas ĉe virinoj kaj sklavo.

AHASVERO : - Ja nur tiuj naivaj estuloj povas honori tiun ĉi, almenaŭ inter la nacioj. Ĉar, inter la Izraelidoj, precipe inter la helenlingvon parolantaj, kelkaj doktuloj lin proklamas. Pluraj mortas, prefere ol konfesi, ke li ne estas dio.

SENEKO : - Ĉiam estis multe da fanatikuloj en cia nacio.

AHASVERO : - Jes. Sed, se mi bone memoras, neniu religia kverelo atingis la gradon de perforteco de ĉi tiu. Kompare kun ĝi, la luktoj de la Sadukeoj kaj de la Fariseoj, aŭ tiuj de la idoj de Hilelo kaj de la idoj de Samajo estis kvazaŭ infanaj ludoj. Nun ĉiu sinagogo estas bataalkampo, kaj sango fluas sur la ŝtonoj.

SENEKO : - Mi memoras rakonton de mia frato.

Dum lia prokonsula jaro en Aĥajo, li ĉeestis tiajn batalojn. Iu Paŭlo estis ilia ĉefa kulpanto. Tiu Paŭlo ja predikis pri juda dio mortinta sur kruco kaj revivigita. Sed li ne nomis lin per la nomo, kiun ci prononcis. Li nomis lin Kristo.

AHASVERO : - Estas la sama. Kristo estas titolo, Jesuo estas nomo.

SENEKO : - Tiel, jen mi diras Nerono, jen mi diras Cezaro.

AHASVERO : - Ci komprenis.

SENEKO : - Tiun Kriston Jesuon ĉu ci ofte vidis ?

AHASVERO : - Nur unu fojon.

SENEKO : - Kaj kredeble li punis cin tial, ke ci ne kredis al li ?

AHASVERO : - Lasu, ke mi rakontu.

SENEKO : - Mi cin aŭskultas, kiel arda junulo aŭskultas belan virinon.

AHASVERO : - Ŝarĝite de sia kruco, li estis kondukata al la monteto de torturo. Inter la batoj de la soldatoj kaj la insultoj de la amaso, li marŝis kurbigita sub la pezo, kurbigita sub la sufero, sanga kaj ridinda. Mi estus malaminta lin feliĉan, kaj mi estus sentinta mian kapon kliniĝi\* por bati kaj frakasi lian feliĉon. Kontraŭ lian malfeliĉon mi spertis pli doloran malamon. Jena penso trais mian spiriton kiel glavō : "Li estas en la fundo de la misfortuna abismo. Kontraŭ lin mi nenion povas." Kaj la naŭzo de la senpova malamo invadis mian buŝon.

SENEKO : - Kial ci malamis lin ?

AHASVERO : - Li estis malamiko de la leĝo kaj de la justo.

SENEKO : - Ofte, esti malamiko de la leĝo, tio estas esti amiko de justo.

AHASVERO : - Li detruas juston per la rimedo plej potenca kaj plej malŝatinda, per la kornkompato.

SENEKO : - Kaj ci, kiu ne havas koron...

AHASVERO : - Mi malamas tiujn, kiuj ne havas spiriton. Ĉar justo estas penso kaj kalkulo.

SENEKO : - Mi kredas, ke mi cin komprenas.

AHASVERO : - Kiu, farinte promeson, ne tenas ĝin, tiu devas esti punita.

SENEKO : - Sendube.

AHASVERO : - Adulta virino devas pereii sub la ŝtonoj jetitaj de la popolo.

SENEKO : - Per Herkulo, malmulte da Romaninoj vivus !

-----  
\* kiel tiu de taŭro por kornobato.

AHASVERO : - Jesuo pardonis al adulta virino.

SENEKO : - Kaj ci mallaŭdas lin ?...

AHASVERO : - Dufoje. Li havis la malican grand-animecon, kiu detruas la leĝon kaj kuragiĝas la krimon. Krome, li estis ŝtelisto malavara per alies posedaĵo.

SENEKO : - Kion ci diras ?

AHASVERO : - Kian ĝojon frandos la trompita edzo, se li ne estos vengita ? Jesuo de Nazareto, pro krima kompato al kulpa edzino, senigis la senkulpan edzon je la sola posedaĵo al li restanta : la venĝo.

SENEKO : - Sokrato rigardis ĉian venĝon kiel malbonon.

AHASVERO : - Sokrato ne estis Izraelido. Neniam la Eternulo parolis al li, kaj li nesciis tion, kion ni scias.

SENEKO : - Ĉiulandaj vulgaruloj aprobas venĝon.

AHASVERO : - Tiu indigninda Galileano diris : "Se ci estas frapita sur la dekstra vango, prezentu la maldekstran al nova bato."

SENEKO : - Per la templo de Polukso, li pelis malproksimen la virton !

AHASVERO : - Ci ornamas per la nomo virto la malkuraĝon. Ĉiu trocedemo estas krimo, kiu nas-kas multajn krimojn. Frapite, mi devas frapi. Denton pro dento, okulon pro okulo, vivon pro vivo : jen estas la leĝo, jen la justo, jen la sola rimedo por tenadi feliĉan ordon en la mondo.

SENEKO : - Saĝo male instruas...

AHASVERO : - La saĝo de Grekoj kaj Romanoj estas malsaĝo tiom, kiom la kompatemo. Ekster la strikta justo estas nur malsaĝo. Kiam la brutala pezo de krimo malsuprenigas unu teleron de la pesilo, sole la trankvila egalpuno restarigas la ekvilibron.

SENEKO : - Se mi disputas kun ci, cia rakonto ne finiĝos. Nu, mi soifas scii. Do parolu libere.

AHASVERO : - Por plibone vidi la malbonan pro-

feton, mi estis suprenirinta stare sur benko ĉe la muro de mia domo. Kiam li alvenis antaŭ mi, li ŝajnis nekapabla fari pluan paŝon. Lasante sin fali kiel mortanto, li estis sidigonta sur mian benkon kaj apogigonta al mia muro. Tiam, mia ĵusta malamo de filo de la Leĝo, povante fariĝi aktiva, supreniris de mia buŝo al mia ĝoja frunto. Mia piedo forpuŝis la profeton. Kaj mi ridante kriis al li : "Marŝu, marŝu do !" Li levis al mi strangan rigardon, mi-ne-scias-kian humidan kaj tamen teruran lumon : vasta fulmo trempita en la pluvo de larmoj. Kaj li murmuris : "Estu, kio ci estas." Mi sentis en mia tuta esto neesprimeblan skuegon. Mi malsupreniris de mia benko kaj, luktante kontraŭ panikan fuĝemon, mi kaptis per ambaŭ manoj la malbonan profeton kaj demandis al li : "Kion ci diris ?" Sed li, metante fingron sur mian bruston ĉe la loko de l'koro, ordonis : "Mensoga simbolo, haltu". Li dufoje ripetis : "Haltu, haltu !" Poste li deturnis sin de mi kaj pluiris sian vojon.

SENEKO : - Estas ia frenezo en tiuj fabeloj el oriento. Sed tiu frenezo estas potenca kiel ebrio. Necesas peno por ne ami ĝin. (Kun rido) Ankaŭ vito kredeble venas el oriento.

(Ahasvero, perdita en la memoro, ne aŭdis. Seneko aŭskultas kelkajn momentojn, poste li skuas la judon.)

SENEKO : - Kian efikon faris al ci la stranga parolo ?

AHASVERO, kaptante manon de Seneko kaj metante ĝin sur sian bruston :

- Kion ci sentas ?

SENEKO : - Nenian baton ! Nur statuan malvarmon.

AHASVERO : - La parolo estis stopinta mian koron. Ĝi haltigis en mi aliajn sennombrajn movojn.

SENEKO : - Kaj ci ne mortis pro la subita halto ! Jen estas la vera mirindaĵo.

AHASVERO : - Mi ne mortis. Se nur mia nuna vivo ne ŝajnas al ci ia morto.

SENEKO : - He! he! subtila opinio... Sed penu diri tion, kion ci eksentis en tiu stranga momento.

AHASVERO, kovrita de nenatura ŝvito, kiel, en certaj mirakloj rakontitaj de historiistoj, iuj templaj statuoj : - Bruo estas tro kontinua, tro familiara : ci ne plu aŭdas ĝin. Sed, ĉu okazis, ĉar tiu bruo subtile ĉesis, ke ci ek-aŭdis ĝin en ekstrema ?

SENEKO : - Jes.

AHASVERO : - Tiel mi ekaŭdis mian koron pulsi kaj ĝian batadon morti. Mi eksentis mian sangon flui, kaj malfluidiĝi en miaj vejnoj. Mi ekaŭdis la siblan angoron de miaj pulmoj, kiuj ĉesis aspiri la aeron kaj reĵeti ĝin. Mil bruoj internaj, konfuzaj kaj potencaj kiel rumoro de multopa amaso, en unu momento ekplenigis min per sia tumulto ; poste la interna amaso surdigis min per sia abrupta kaj definitiva silento. Kiel diri tiun teruron samtempe sur la ĉefo kaj sur la popolo ? Ne nur mia menso, sed ankaŭ ĉiu ero el mia korpo estis invadita kaj posedata de tiu penso : "Mi mortas... mi estas mortinta."

SENEKO : - Daŭrigu.

AHASVERO : - La movoj, pri kiuj mi diras, estis de mi ne nur aŭditaj, ili estis en unu sekundo sentitaj. Mi sentis min vasta maŝino, multopa ritmo, en kiu subite ĉio denodiĝas kaj haltas.

SENEKO : - Stranga sento !

AHASVERO : - Sed, ĉirkaŭ mi, la aferoj estis kapturaj kaj vortico. Mia interna senmoveco kondamnis min vidi la movadon, kiu estas ĉie ; aŭ eble - kiel scii ? - ĝi kreis ĉie movan frenezon. Ĉiu ŝtono de mia domo fariĝis danco kaj turniĝado de atomoj. En ĉiu homo el la amaso ĉirkaŭ mi, mi vidis la internajn gestojn en mi mortintajn. Iliaj vestoj, la grundo, la domoj, ĉio flirtis en disiĝoj, en rekunmetiĝoj. La kruco portata de la profeto, bruanta kvazaŭ de foliaroj, de insektoj kaj de birdoj, fariĝis granda arbo skuata de zefiroj kaj uraganoj ; kaj ĝia ombro, tie bonfara, ĉi tie mortiga,

kovris la mondon, kiel tendo ventskuata kaj klakanta.

SENEKO : - Ci deliris. Mi difinas ciajn profetojn : homoj, kiuj havigas febron.

AHASVERO : - Ho ! la premega ebrio kaj la demenco de tiu vertigo ! Supozu, ke ĉirkaŭ ci ĉio farigas abismo. En mil abismoj glitantaj, fugantaj, revenantaj, la universo elartikigita sin serĉas kaj evitas, sin disligas kaj volas rekunligigi. Ĝi jam ne estas io alia ol nepercepteblaj disŝiraĵoj, kiuj vokas unuj la aliajn : sed, tuj kiam ili interproksimiĝas, ili sin reciproke timigas ; ili sin urĝas al neeblaj interkisoj, kaj sin disigas en panikaj forkuroj.

SENEKO : - Ĉu ci ne povis fermi la okulojn ?

AHASVERO : - Neniam fermu la okulojn en danĝero, kiun ci konas : ci vidus ĝin pli malbona, tiom preciza kaj multobligita.

SENEKO : - Tiel la deliro de tiu momento...

AHASVERO : - Estas la vizio kaj turniĝado de mia tuta vivo... Neniam interrompo...

SENEKO : - Ci troigas. Dormo venas, je regulaj intertempoj, pacigi cian malbonon.

AHASVERO : - Dormo ?... Jes, nokte, iafoje, mi falas en strangan staton, kiŭ kredeble estas dormo tia, kian mi povas ankoraŭ sperti. Mi marŝas, kaj, malgraŭ la lunhelo, mi ne vidas la fugantan kaj rikanantan grundon, sur kiu sin metas miaj piedoj ; mi ne vidas la turniĝadon, kiu ĉirkaŭas min. Aliaj turniĝadoj estas tie, pli ŝanĝemaj kaj pli frenezaj.

SENEKO : - Ne necesas dormi por...

AHASVERO : - Sendube. Ankaŭ maldorme mi estas en alia lando kaj en alia epoko ol mia korpo. Mia penso rifuĝas en la trankvilaj malnovaj tagoj. Ho ve ! en ĝia vortico la kadavroj de la malnovaj ĝojoj faras la elartikigajn gestojn de doloroj kaj demencoj. Aŭ mi forigas de mia vivo la abomenindan renkonton, kaj mi provas revigi la sekvadon de miaj jaroj kiel pacan rivereton, similan al la ordinaraĵ ekzistadoj.

Ho ve ! la reala skuado estas tertremo, kiu de-  
sube levas kaj glutas la povran rivereton. Tiuj  
klopodoj por fuĝi de mia torturo ĝin duobligas...  
sed mi distingas mian revantan penson kaj mian  
pensantan revon.

SENEKO : - Per kio ci distingas ilin ?

AHASVERO : - Mia penso aŭ mia revo, ĉiam la  
sama dormofasko. Tie la fasko estas nodita ;  
ĉi tie ĝi denodiĝas kaj etendiĝas. La branĉoj,  
kiuj ordinare estas en la mezo, nevideblaj aŭ  
malprecizaj, forgesitaj, kiel vi diras, jen en  
mia revo ili reaperas, hirtaj precizaĵoj, kaj  
disŝiras min.

SENEKO : - Do cia dormo ne estas ripozo ?

AHASVERO : - Neniam. Miaj gamboj marŝas kaj mia  
menso laboras. Sed nek tiu nek ĉi tiu scias,  
kien ili iras. Eble nenien. Ĉiu direkto estas  
perdita. Iajoje mi vekigis ĉe la bato de muro  
aŭ de penso abrupta kiel muro ; ĉe falo en  
riveron aŭ en tro oscedegantan absurdon.

SENEKO : - Tiel cia sonĝo...

AHASVERO : - Mia sonĝo, kiel mia penso, nomiĝas :  
furiozo. La penso estas kondensita doloro, la  
sonĝo, largigita doloro. Aldonu, ke la sonĝo  
endormigas la formojn plej freŝdatajn de mia  
doloro, sed revivigas formojn malnovajn, kiujn  
mia penso ne konis plu.

SENEKO : - Kaj neniu ĝojo venas karesi kaj  
kvietigi cian doloron kiel plorantan infanon ;  
venas reanimi ciajn esperojn kaj ciajn amindajn  
rememorojn kiel infanojn vekigantajn kaj komenc-  
antajn rondodancojn ?

AHASVERO : - Por mi jam ne estas ĝojo.

SENEKO : - Penu refari en ci la edukadon de la  
ĝojoj. Komencu per la plej simplaj, tiuj, kiuj  
eligas el la gustoj kaj el la satigata malsato,  
kaj el la estingata soifo.

AHASVERO : - Jam tridek jarojn mi ne spertas  
malsaton kaj soifon kaj ilian pacigon. Jam tri-  
dek jarojn mia buŝo forgesis, kio estas freŝaĵo.  
En ĝi la fruktoj fandiĝas, sen ke mi tion scias,



kaj nur la naŭzoj de senpova malamo memorigas al mi, kio estas gusto. Ankaŭ la parfumoj estas por mi mortaj.

SENEKO : - Ĉu nenio cin kvietigas, eĉ iomete ?

AHASVERO : - Unu sola afero, la movigado. Se, en la momento, kiam ci haltas, miaj gamboj ne ĉesas moviĝi piedfrapante, estas tial ke la ekstera movigado estas mia unika rimedo por malpliigi la agonian kapturton.

SENEKO : - Do haltu, kaj ci mortos.

AHASVERO : - Halti mi ne povas. Mi marŝas, kiel en abismo ŝtono falas.

SENEKO : - Almenaŭ provu.

AHASVERO : - Ĉu ci opinias, ke mi ne volis, ofte ? Mi marŝis spite al mi mem, en pli freneza kapturton, en pli krianta kaj ŝiranta doloro.

SENEKO : - Kiel mi cin kredus ? kaj kiel ci povus suferi ? Ĉia sufero estas ja interna movo.

AHASVERO : - Je unua aspekto mia sufero ne similas al cia. Ci ne konas ĝin. Por ci ĝi estas vorto, kiu, signifanta nespertitaĵon, ŝajnas al ci malplena je signifo. Sed por mi, ha ! kia terura realaĵo !

(Li ekkaptas Senekon per ŝultro kaj brutale skuas lin).

SENEKO : - Ci dolorigas min.

AHASVERO : - Ho brutulo, kiel ci volas, ke mi komprenu cian suferon, se ci ne komprenas mian ?

SENEKO : - Ili estas tiel malsamaj aferoj.

AHASVERO : - Kaj se ĝi estus la sama doloro ?

SENEKO : - Ci diras ?

AHASVERO, marŝanta per rapida paŝado, dum Seneko sekvas nun kure :

- Mi ne scias. Mi ne scias. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas la sama. (Subite haltante) Ĉu spaco kaj tempo estas malsamaj ?

SENEKO : - Mi kredas... Eble... Jes, certe malsamaj.

AHASVERO : - Kio ili estas ?

SENEKO : - Mi ne scias.

AHASVERO, en eksploda ekrido : - Ankaŭ mi. Kaj konsekvence, mi ne estas certa, ke ili estas malsamaj.

SENEKO : - Tamen...

AHASVERO : - Silentu. Kiel longe ci ne konas tempon kaj spacon, ci konas nenion. Ĉu ci nur scias, ĉu ĉiuj aferoj estas mergitaj kune en spaco kaj tempo, aŭ ĉu la aferoj estas teksaĵo, kies varpon kaj vefton formas la tempo kaj la spaco ? Sed eble la aferoj disradias tempon kaj spacon, kiel la suno disradias lumon kaj varmon.

SENEKO : - Neniu iam prirevis...

AHASVERO : - Elektu aŭ ne elektu. Kiel grave por mi, kiu ne obeas al tiuj leĝoj, kiaj ajn ili estas.

SENEKO : - Ĉio obeas al...

AHASVERO : - Se la aferoj estas en la tempo, mi estas ekzilita for de la tempo.

SENEKO : - Sed...

AHASVERO : - Se la aferoj estas tempo kaj spaco, mi konsistas nur el spaco.

SENEKO : - Komprenu, ke...

AHASVERO : - Se la aferoj kreas tempon kaj spacon, mi disradias nur spacon. Mi estas kvazaŭ suno, kiu radias nur...

SENEKO : - Pliĝuste ci estas simila al mortintoj. Ankaŭ por ili la tempo ne...

AHASVERO : - Ci ne scias, kion ci diras. Se mi rigardas kadavron, mi vidas en ĝi kiel en ci svarmantajn movadojn. Morto estas tiel agitata kiel vivo. Mi sola estas liberigita de la tempo, tial ke mi estas nek mortinta nek vivanta.

SENEKO : - Ankaŭ tiu ĉi ŝtono estas nek mortinta nek vivanta.

AHASVERO : - Vivanta, vivanta ĝi estas, tiel vivanta kiel la vivo, tiel vivanta kiel la morto. Ĝiaj atomoj sin serĉadas kaj fuĝadas

laŭ la samaj leĝoj precizaj kaj misteraj, kiuj, tie supre, estas la paŝtistoj de la steloj.

SENEKO : - Ho feliĉulo, kiu vidas la aferojn per tiel penetrantaj okuloj !

AHASVERO, ne aŭskultante, reekante sian rapidan marŝadon : - La homoj estas povraj daŭretoj, kiuj volus invadi la tutan daŭron. Mi estas povra spaceto, kiu volus invadi la tutan spacon. Ci revas pri senmorteco ; mi, pri ĉie-esteco. Mi bezonus esti ĉie, kaj ci... Sed ne, ne tiel estas. Mi bezonus esti ĉiam en la sama loko, ĉu ci komprenas ?

SENEKO : - Do, kial ci marŝas ?

AHASVERO : - Nu, tial ke ĉio marŝas, stulta filozofa ! Esti en la sama loko, tio estus esti en la samaj rilatoj. Kiam ci ĉin proklamas senmorta, ĉu ci pensas pri daŭrigo de ĉia kurado en la tempo, pri maljuniĝado inter rejunigantaj aferoj ? Ja ne. Ĉia revo haltigas la tempon, se ĝi ne transportas ĉin en mi-nescias-kian fantazian regionon, en kiu la freneza riverego, fariĝinte lago, eĉ ne konservas sian nomon, sed nomiĝas eterneco. Mia revo volus haltigi la spacon aŭ transporti min trans la nekoncepteblajn limojn de la spaco. Demencoj, ĉia revo kaj mia.

SENEKO : - Mi malfacile ĉin komprenas.

AHASVERO : - Ĉia vivo kaj ĝia dolora penado estas nur lukto kontraŭ la disfalado de la tempo. Mi, mi luktas kontraŭ la spaco, kiu disfalas sur min mem. Ci estas minuto kuranta por ĉiam sin trovi sur la sama punkto de la fuĝanta tempo.

SENEKO, sufokite kaj ridante : - Ne ĉiam mi kuras kiel nun.

AHASVERO : - Kaj ĉia sango, stulta filozofa, ĉu ĝi ne ĉiam kuras ? Kaj la aero, kiu ŝveligas kaj malŝveligas ĉian bruston kiel blovilon ? Ĉu ci ne aŭdas la galopon de ĉia koro ? Ĝi strebas sekvi la tempon. Sed je ĉiu paŝo ĝi

malfruas. La tempo preteriros cin, eskapos de ci, ci jam ne estos.

Mi estas punkto kuranta por reatingi la fuĝantan spacon ; la spaco kuras pli rapide ol mi.

Tamen aŭskultu la grandan doloron. Ĝi disŝiras cin en profundoj de ci nekonataj. Ĝi disŝiras min, kaj mi ĝin konas. Nek tempo nek spaco estas striktaj linioj. Ho larĝo ! ho profundo ! ho vi, dimensioj, kiuj ne havas nomon por la homoj ! Nek tempo nek spaco estas fuĝo en difinita direkto. Ho disdividita forkurado, miriada da movoj interkuniĝantaj kaj interbatantaj ! Ĉiu forportas iom el ci, malgraŭ la daŭrado de cia multobla peno por cin rekombini. Baldaŭ ili venkos, kaj ci mortos liberigite. Ĉu ci volas, ke mi cin liberigu ? (Seneko abrupte flankenmoviĝas). Mia senpova luktado kontraŭ la movojn de la spaco, mi timas, ke ĝi estos senfina. Mi estas senfina malvenko... La tero turniĝas ĉirkaŭ sia akso. Miaj paŝoj, ordinare, kontraŭbatalas tiun movadon, provas teni, por miaj okuloj, la sunon en la sama punkto de la horizonto. Ho malrapido de mia kurado ! Mi estis ĉe oriento, jen mi estas ĉe sudo. Malgraŭ miaj frenezaj klopodoj, la vespero min atingos. Ĉu unu el miaj tagoj iam sukcesis esti eĉ nur du el ciaj tagoj ? Kaj tiu movo estas tiu, kiun mi plej efike kontraŭas. Mi vidas la teron forkuri ĉirkaŭ la suno kiel ŝtono per ĵetrimeno ĵetita. Kiel mi luktus kontraŭ la jaran fuĝadon ? Kaj la suno iras en la ĉielo, mi ne scias kien. Sed la tero mem havas aliajn movojn nenombreblajn, kiujn mi rimarkas, kontraŭ kiuj mi nenion povas. Feliĉa Seneko, la tempo ŝajnas al ci nur kuranta antaŭ ci, kaj cia doloro endormiĝas per ŝajna unuformeco.

(La kurado de Ahasvero fariĝas pli kaj pli rapida).

SENEKO, lasante sin fali sur razenan benkon :

- Miaj kruroj kaj mia spirito ne povas plu

sekvi cin.

(Li aŭdas ankoraŭ kelkajn vortojn).

AHASVERO : - Mia kurado, la baraktado freneza, senutila, kaj sin konanta senutila, kaj tamen neevitebla, de iu falanta en abismon ; de iu, kies brakoj, svingate, neniam tuŝas la bordon de la abismo. Kie ajn ci estas, kie ajn mi estas, ĉiam la vakuo apertigās kaj plilargiĝas ĉirkaŭ ci, ĉiam la vakuo apertigās kaj plilargiĝas ĉirkaŭ mi.

Tria apero

Ahasvero aperas al Mark-Aùrelìo

aù

LA DIALOGO PRI LA POTENCO

\*\*\*\*\*

En romia kampadejo, la imperiestra tendo. Ĉe la fundo, nur ursofelo, kuŝanta viro. Li estas Mark-Aùrelìo, eluzita korpo, vizago de vola sereneco. En la momentoj de forgeso, ĉu la malstreĉo ne sin manifestas kiel malkuraĝigo, laca sinforlaso, konsentita malvenko, kiu nur sin ornamas per filozofio kaj grava rideto? Apud li 19-jara junulo, skulptita el bestia forto. Tiu ĉi estas la filo de la kronita filozofa, Kommodo, malalta obstina frunto, peze fortika kaj brutita makzelo.

MARK-AURELIO : - Mia filo, kion mi plue diros al ĉi ? Ĉia forto min forlasas, kaj, se vortoj de mortanto havas ian povon, ne ilia ripetado povos...

KOMMODO, sin deturnante en oscedo : - Kia absurda pedagogo ! Tiel longe, ĝis la morto fermos tiun buŝon...

M.-A., flanken : - Li eĉ ne sukcesis kaŝi sian enuon. (Laŭte) Mia filo, ŝajnas al mi, ke mi tuj dormos. Retiriĝu.

(Kommodo sin klinas por premi la manon de sia patro).

M.-A., retirante sian manon : - Ne, mia filo. Mi timas, ke mia malsano estas kontaga. Do prudento triumfu super ĉia pieco. Estas mi, kiu ĉin petas. Retiriĝu, ne tuŝinte min per la lipoj aù per la mano. Ĉi ŝuldas ĉin al la savo de nia popolo.

KOMMODO : - Mi ankoraŭ esperas, patro mia.

M.-A. : - Oni revenu je la tagiĝo por min enĉerkigi.

(Li kovras sian kapon per basko de sia mantelo. Kommodo eliras skuante siajn fortajn ŝultrojn. Longatempe la imperiestro restas senmova, jam simila al kadavro. Poste li komencas etan movon, ĉar li aŭdis proksiman bruon. Sed li ekmemoras, ke jam nenio ekstera interesas lin, kaj li interrompas la komencitan movon.

La nokto falis.

Viro eniris en la tendon. Komence li palpe antaŭeniras, poste li lumigas torĉon).

M.-A., senmove, kun fermitaj okuloj : - Ŝajne lumo (Li malfermas la okulojn, ne retirante la ŝtofon, kiu vindas lian kapon). Iu rabisto, eble... Tio jam ne estas mia afero.

La viro, plantinte la torĉon apud la liton kaj longe rigardante : - Ĉu li estus morta, jam ?

M.-A., sen iu movo : - Ĉu ci ne povas lasi min dormi ?... Se ci havas ordonon por peti, jam nun Kommodo estas la imperatoro.

LA VIRO : - De neniu mi petas aŭ ricevas ordonon.

M.-A., flanken : - La voĉo ne estas malpli akra. Tamen ĝi ne estas tiu de mia filo (Li sin turnas, rigardas) Kiu ci estas ? Mi ne konas cin.

LA VIRO, kun stranga rido : - Kaj sendube ci jam ne havas tempon por min koni. Tamen, se tio cin interesas, eksciuj, ke mia nomo estas Ahasvero.

M.-A. : - Mi jam rigardis min kiel mortintan. Tamen, se mi povas iel utili al iu homo...

AHASVERO : - Neniu homo povas utili al iu homo... Ha! ha! ha!

M.-A. : - Stranga rido, penetranta kiel fero! Pri kio ci ridas ?

A. : - Pri ci kaj pri mi, pri mi kaj pri ci.

M.-A. : - Kial ?

A. : - Tial ke mi cin malamas, tial ke mi min malamas.

M.-A. : - Kiajn frenezajn sonĝojn havigas agonio pro malsato ! Ĉu Kleanto spertis ilin?...

A., ripetante kun pli granda forto : - Mi cin malamas, kaj mi min malamas.

M.-A. : - Kial ci malamas min ?

A. : - Tial ke ci similas al mi.

M.-A. : - Kial ci malamas cin mem ?

A. : - Tial ke mi estas homo.

M.-A. : - De kio venas tia malamo al la homoj ?

A. : - Ili similas al Dio aŭ al la dioj, laŭ cia plaĉo.

M.-A. : - Ci do malamas la diojn ?

A. : - Certe !

M.-A. : - Ĉu ĉiujn ?

A. : - Jes, ĉiujn.

M.-A. : - Ĉu ci estus unu el tiuj kristanoj, kiuj malŝatas la diojn por honori unu Dion, kvazaŭ la mondo ne estus filo de Unu kaj de Multopo ?... unu el tiuj kristanoj, kiuj malŝatas la vivon kaj, kun tragika pompo, brakumas la morton, kvazaŭ la morto ne estus funkcio de la vivo ?...

A. : - Kristano mi ne estas.

M.-A., atente rigardante lin : - Sed verŝajne ci estas judo... Ambaŭ intersimilas. Povraj estuloj el malsato kaj malamo.

A. : - Mi estas cirkumcidita de antaŭ 280 jaroj, kaj iam mi renkontis la dion de la kristanoj, marŝantan al la ekzekuto.

M.-A. : - Stranga deliro... Mi estus dezirinta morti kun sana kapo. Verŝajne, estis tro postule. Fariĝu la volo de Jupitero.

A. : - Imperiestro Marko, mi ne estas kreaĵo de cia febro, kiel la malsagaĵoj, kiujn imperiestro Marko mensoge pretendis skribi por si mem. Tuŝu. Mia karno estas reala.

M.-A., aŭtomate tuŝante Ahasveron : - Ĝi estas malvarma, eĉ por frostiĝinta mano.

A. : - Neniel mirige, se, je mia aĝo... Sed ne tion mi venis diri al ci.



M.-A. : - Kion ci venis diri al mi ?

A. : - Kontemplu senmortan homon.

M.-A. : - Se ci verdiras, mi cin kompatas.

Ĉar ci malamas tiun vivon, kiu ligiĝas al ci.

A. : - Eble tial mi malamas ĝin.

M.-A. : - KREDU min, Ĝi estas inda nek je amo nek je malamo. Ĝi neniam donas al ci ion alian ol la estantecon, t.e. petalero tro eta por havi parfumon, aŭ dornero tro dispistita por piki. Reduktu ĉian estantecon al tio, kio ĝin konsistigas je lasta analizo, - por ekzemplo la silabo, kiun ci aŭdas aŭ prononcas - kaj la estantecon, cia sola bono aŭ cia sola malbono, fariĝas al ci indiferenta. Krom la sfera\* beleco de la saĝulo aŭ la sfera beleco de la kosmo, kio povas valori rideton de komplezo, malŝato aŭ amaro ?

A. : - Ci parolas fanfarone, por ke mi admiru cin.

M.-A. : - Jupitero estas atestanto, ke mi parolas por ci, ne por mi. Jupitero atestas, ke mi faras mian funkcion homan, penante kuraci la malbonon, pro kiu suferas homo.

A. : - Kaj mi, mi pli venenos la malbonon, pro kiu ci suferas, la malbonon, pro kiu ci mortas. Mi unue respondos koncerne la kosmon. Poste mi respondos koncerne la saĝulon. Sed ĉu du ridoj ne estus sufiĉaj respondoj ?...Ha!ha!... Ha!ha!...

M.-A. : - Ofte mi aŭdis ridojn, kiuj signifis stultecon de malalta ĝojo. Hodiaŭ mi aŭdas ridon, kiu signifas stultecon de malnobla doloro.

A. : - Ci timas mian ridon. Tial ke ĝi sonas ne nur en mia buŝo, sed ankaŭ en cia koro. Ci timas mian penson, tial ke ĝi estas cia penso plej profunda, tiu, kiun ci penis silentigi en ci. Ha! ha! ci kovras ĝian murmuron per vortoj solenaj kaj stultaj kiel sono de trumpetego. Jen per mia buŝo ĝi parolas pli laŭte ol la stoikaj trumpetoj kaj la pretenditaj internaj venkoj. Hodiaŭ ci aŭdos min pli laŭte

\* La formo sfera estis rigardata kiel plej perfekta.

ol ĉiujn majstrojn, min, kiu estas ci, min,  
kiu estas cia penso.

M.-A. : - Se ci estas mia penso, ci estas nura konsento, admiro kaj amo al la bela ordo de tiu universo, kies parto estas mi, viva aŭ morta.

Se ci estas mia penso, ci diras al la Naturo :  
"Donu al mi tion, kion ci volas, reprenu tion,  
kio al ci plaĉos." Sed tiujn vortojn mi dirus  
senspite, kiel filo parolas al sia patrino.

A. : - Ci konfuzas cian penson kun cia volo.

M.-A. : - Mia penso dependas de mia volo. Ĉiuj  
miaj internaj agoj dependas de mi.

A. : - Ci mensogas al ci mem.

M.-A. : - Mi diras la solan liberigan veron.

A. : - Liberigo estas peno. Ci diras vortojn,  
kiuj penas, ne penson, kiu sekvas sian naturan  
deklivon.

M.-A. : - Kiel longe ne intervenis volo, ankoraŭ  
ne estas penso. Sen la venka peno de dio Sferus,  
la disaj frenezaj materioj ne formus la mondon.  
Sen la venka peno de la saĝulo, la internaj  
flirtoj kaj kaosoj ne formus unu penson.

A. : - Ha! ha! mi ridas pri la vortoj, kiujn ci  
uzas, kaj pri la arbitra uzo, kiun ci faras el  
ili... Ha! ha! ci estas tiu malsaĝulo, kiu krea-  
das, ke la nomoj havas la forton modli la aĵojn.  
Cia penado estas neutila. Jen mi estas, voĉo  
samtempe ekster kaj en ci. Nek tie for nek tie  
ĉi ci silentigos min.

M.-A. : - Mi ne estas la malsaĝulo, pri kiu ci  
diras, sed mi scias, ke la ekstero ne dependas  
de mi. Tial ĝi estas al mi indiferenta. Parolu  
tion, kiom al ci plaĉos, voĉo ridinde fremda.  
Ci ne penetros ĝis mia animo, ci ne detruos la  
firman konstruaĵon de mia ĝojo.

A. : - Cia ĝojo? Ho sinistra mensogulo! Ci  
mortas senespera.

M.-A. : - Mi estas tro certa pri mi, ke mi bezon-  
as respondi ekstere al ci.

A. : - Mi asertas, ke sub cia alteca melankolio,  
ci kaŝas la plej profundan, la plej vastan kaj  
la plej racian malesperon.

M.-A., kun akcento de adorado : - Al mi konvenas ĉio, kio konvenas al vi, ho Kosmo. Nenio estas al mi tro frua aŭ tro malfrua el tio, kio por vi alvenas ĝustatempe. Mi faras mian frukton el tio, kion portas viaj sezonoj, ho Naturo. De vi venas ĉio ; ĉio estas en vi ; en vin reiras ĉio. Ho civito de Jupitero, mi admiras vin. A. : - Ho civito de Jupitero, Ahasvero kaj imperiestro Marko vin malamas. Ĉar vi estas maljusta kiel ĉiuj civitoj, kaj viaj leĝoj estas tiel malsagaj kiel tiuj de la nacioj. Mizera civito, kies civitanoj estas mortkondamnitaj. Terurega leĝo, kiu volas, ke filo vidu mortisian patrinon. Naturo, vi estas subtila ekzekutisto : se du estuloj longatempe sin reciproke amas, vi venas, senpardone, deŝiri unu el la brakoj de la alia, kaj per unu sola morto detruu du vivojn.

M.-A. : - Tiel, cia malamo estas pasia amo. Ci malamas la mondon, tial ke ci tro amas ĝin. Ci riproĉas al la Kosmo de tiu ĉi minuto, ke ĝi ne plidaŭrigas eterne la belon, kiu cin emocias. Ci riproĉas al la Naturo, ke ĝi multobligas la formojn anstataŭ lasi la materion eterne putradi en la vazoj, kiuj unue al ci plaĉis. Pli-largigu cian penson kaj cian amon ; lernu ĝui la harmonian movadon kiel miriadojn da ripoztempoj malsame kaj egale belaj. Ho Kosmo, nobla ĥoro, kiajn mirindajn dancojn vi turne movadas ĉirkaŭ la Centra Fajro !

A. : - Mondo malnobla kaj kruela, vi kreas nur por detruu.

M.-A. : - Ho Kosmo, vi detruas unu formon nur por krei alian formon. Artisto Fajro, vi realigas laŭlonge de la tempo la belaĵojn, kiujn ne povas enteni la samtempa spaco.

A. : - Avara mondo, se vi donas unu plezuron, tio estas por baldaŭ ĝin deŝiri de ni, kaj lasi nin plorantaj kaj senigitaj.

M.-A. : - Grandanima Kosmo, kiam blindulo plendas, ke vi forprenis ion de li, vi ĵus donis al li ion alian. Grandanima Kosmo, nia estant-

eco ĉiam estas mano troplena kaj elverŝanta. Por trairi ĉiujn ĝojojn, kiujn vi kunamasigas en unu el miaj horoj, mi bezonus tutan tagon el amo kaj dankemo. Sed por prikanti la plenecon de unu el miaj tagoj, ĉu ne necesus al mi tuta jarcento ?

A. : - Mensogulo ! Ci ĵus diris pri la malpleneco de la estanta tempo.

M.-A. : - La aferoj havas multajn aspektojn. La ideo, kiun mi faras al mi pri ili, estas mia, dependas de mi, apartenas al mi. Mi ĝin plenigas aŭ malplenigas laŭ la necesoj de mia feliĉo.

A. : - Tiel, laŭ ci, ĉio estas samtempe vera kaj malvera.

M.-A. : - Ci nomas mensogo la arton feliĉe vivi, sed mi nomas mensogo la arton igi sin malfeliĉa. Kiu do, krom ci mem, donas al la aferoj la malhelajn kolorojn, en kiuj sin drolotas cia malespero ? Cia malespero harmonigas la aferojn en tragika belo. Cia malespero estas artisto, kiu, en la fundo de ci, ĝojas, dum ĝi cin malĝojigas.

A. : - La aferoj ne dependas de ci. La vero...

M.-A. : - Provu diri, kio estas la aferoj ekster mi kaj ci, kaj ĉiuj homoj. Kio estas la spektaklo ekster la spektantoj ? Neniu tion scias. Car ĉiuj, eĉ dio Sferus, laŭ tio, ke ĝi estas kono, ĉiuj estas spektantoj. Faru al ci harmonian animon, kaj jen la mondo fariĝas harmonio.

A. : - Ci estas venkita, ci kiu rifuĝas en la universala konfuzo. Por certigi bonon, jen ci nepre devas ĝin konfuzi kun malbono.

M.-A. : - Ĉu estas bono aŭ malbono ekster la sentantaj estaĵoj ? Jes, estas Bono por komprenanta inteligento. Tamen, antaŭ ci, la ekstera marmoro kaŝas sian mirindan belecon.

Tremetante sub la lumo kaj sub cia rigardo, ĝi ŝajne diras : "Faru al mi tion, kion ci volos." Ci prilaboras ĝin en kuraĝa maldormo aŭ en senzorga somnambuleco. Se cia volo estas

nobla kaj forta, la statuo estos bela.

A. : - La mondo ne proponas skulpteblan marmoron. Vidu la malpuraĵojn, kiujn ĝi ĵetas ĉirkaŭ cin kaj en cin : la koton de la plezuro kaj la sangon de la doloro.

M.-A. : - Ĝi ĵetas en min, ĉu realan, ĉu eblan, la plej neesprimeblan harmonion. Ĉu la ordo estas patro de mia penso, ĉu filo de mia penso, mi ne scias. Sed mi danke ĝuas la ordon kaj la penson.

A. : - Pri kiu ajn temo ci parolas, ci ĉiam restas propravola blindulo, mokata kaj amanta edzo. Antaŭ ci, sur scenejo, oni montris cin kiel la plej trompitan el la edzoj ; al publiko, al kiu ci apartenas, la komediistoj nomis la amantojn de cia Faŭstino. Ci ne konsentis aŭdi. Sammaniere ci edziĝas al la viro, alia malĉastulino. Laŭlonge de la jarcentoj ci portados la ridindecon, ke ci proklamis bone regata la civiton de Jupitero, kaj proklamis Faŭstinon "tre bona kaj tre fidela edzino". Ha! ha! ha! mi bone ridis antaŭ kelkaj tagoj. Kie do mi vidis tiun emocian bareliefon : Faŭstino forportata en la ĉielon de Renomo, kaj dume imperiestro Marko sekvas ŝin per rigardo plena de amo kaj fido ?...

Ci silentas. Ci ne kuraĝas rediri antaŭ mi ciajn mensogojn, nek ilin malkonfesi. (Li prenas tabuletojn de sur malgranda tablo). En libro, kiun imperiestro Marko hipokrite adresas "Al si mem" - sed li ja esperas, ke la jarcentoj legos ĝin - li dankas la diojn, ke ili donis al li "edzinon tiel komplezan, tiel ameman kaj fidelan"... Ci ĉiam mensogas, ĉu ci parolas pri Faŭstino, ĉu ci parolas pri la mondo. Kiu volas diri sin feliĉa, tiu estas nepre kondamninda al mensogado.

M.-A., kovrante sian kapon per la mantelo :  
- Lasu min morti en paco.

A. : - Ĉu mi vivas en paco, mi ? Ĉu mi havas la pacigon morti, mi ? Por iomete kvietigi

mian doloron de senmorteco, mi bezonas vidi homojn finiĝi en malespero. Ha! per forto de mensogado al ci mem, ci riskis foriri en aspekto de ĝojo aŭ trankvilo. Sed mi venis por malklarigi sub ciaj lipoj la fonton, el kiu trinki estas al mi malpermesite. (Li brutale tiras la ŝtofpecon, malkovras la kapon de la agonianto) Kontraŭdira spirito, kiu antaŭ ne longe laŭdis la Kosmon kaj la belecon de la spektaklo, kiun ĝi prezentas, aŭskultu tion, kion mi trovas en ciaj tabuletoj. (Legante): "Kiam, en la teatro aŭ en la cirkoludoj, oni vidigas al ci unuforman ripetadon de samaj objektoj, ci enuas. Do ci devus enui dum cia tuta vivo : en tiu ĉi mondo, ĉu supre, ĉu mal-supre, ĉiam la samaj efikoj, ĉiam la egala ludo de kaŭzoj ĉiam samaj." Kaj ci finas per krio, kiu, de unu jarcento kaj duono, estas mia krio : "Ĉu tio ne finiĝos ?"

M.-A. : - Mi petas, forskrapu tion, kio estas skribita sur tiu tabuleto. Tiun tagon mi ne estis saĝa.

A. : - Ci kredas, ke estas pli saĝe mensogi ol konfesi la veron, pli saĝe proklami la virtecon de Faŭstino ol... Ha! ha! ha! (Parolante kaj ridante, li dume ekzamenas la tabuletojn). Sed tiel ofte ĝi elsaltis de ci, la vero ! (Legante) : "Oni estas trudita konsoli sin mem per la atendo pri sia propra dissolviĝo." Ha, filozofa amanto de la Kosmo, la Kosmo ŝajnis al ci tiel feliĉa kampadejo, ke ci cin konsolis per la sola espero pri dizerto. Ĉar ci dizertas, kaj cia rifuzo pri ĉia nutraĵo, kio ĝi estas, krom la plej malkuraĝa forfuĝo ?

M.-A. : - Se mi trovas, ke en la ĉambro estas tro da fumo, mi rajtas eliri senbrue el la ĉambro.

A. : - Sed ne laŭdante por la aliaj la puran aeron, kiun oni spiras en ĝi. (Li daŭrigas serĉadi en la tabuletoj). Jen estas la kompleta

konfeso, jen estas motivo por havigi rimorson al Faŭstino, al ŝiaj amantoj, al Kommodo, filo de Faŭstino kaj de iu diboĉulo, ha!ha!ha! se tiaj homoj estas kapablaj je rimorso. (Légante): "En tiu ĉi horo, ci vidas tiajn disŝirojn en cia domo, ke ci ekkrias: Ho Morto, ne prokrastu veni, pro timo, ke ankaŭ mi atingu memforgeson!" Kion ci nomas sinforgeso, imperiestro Marko? Ha, ci sentis la dekadencan de cia penso kaj la malrapidan kaj certan malnobliĝon de cia karaktero.

M.-A. : - Mi ĉiam strebadis al bono.

A. : - Ci ĉiam mensogis al ci mem.

M.-A. : - Neniam mi faris malbonon propravole. Se pli kaj pli mi havas la malfortecon ĉagreni min mem, neniam mi ĉagrenis aliulon, krom malgraŭ mi.

A. : - Marko, ci estis naskita filozofa, kaj ci fariĝis imperiestro. En la tago, en kiu ci konsentis pri la imperio, ci rezignis pri la saĝo.

M.-A. : - Mi volis igi la saĝon reganta. Platono instruis al mi, ke por la feliĉo de la popoloj necesas, ke la filozofoj fariĝu reĝoj, aŭ la reĝoj filozofoj. Mi provis igi la homojn feliĉaj.

A. : - Ci sukcesis nur igi cin malfeliĉa.

M.-A. : - Sub la krono mi portis la penson de Epikteto, se ne, ho ve! lian virton.

A. : - Ĉu ci estas certa, ke la krono ne misformas la penson? Ĉu ci estas certa, ke homa frunto portas tiun saĝon sen depremiĝo?

M.-A. : - Ĉu mi povis rifuzi la potencon, kun risko lasi ĝin fali en krimajn manojn?

A. : - Ĉu ci kredas senkrimaj la manojn, en kiujn ci hodiaŭ ĝin liveras? Se Marko estus restinta simpla unuopulo, la Urbo kaj la Mondo ne devus elporti gladiatoron Kommodon.

M.-A. : - Mi donis al la universo iom da ripoztempo.

A. : - Ci donis nenion similan al ripozo. Ci daŭre militadis.

M.-A. : - Malgraŭ mi, ci ja scias.

A., kun kruela rido : - Milito, ha! ha! ha!  
kiel nobla filozofa ekzerco ! Aŭskultu, kion  
mi legas el ciaj tabuletoj : "La araneo estas  
fiera kapti muŝojn ; tiu homo estas fiera kapti  
leporidon, ĉi tiu kapti sardinon ; tiu alia  
kapti aprojn, jena kapti sarmatojn. El la vid-  
punkto de la principoj, ĉiuj rabistoj." Mi cin  
salutas, ho ĉasisto de Sarmatoj, ho konfesanta  
rabisto ! Sed pardonu. Ĉu tiuj vortoj : "el la  
vidpunkto de la principoj" ne estus malkonfeso  
pri filozofio ? Marko, respondu : kio ci estas,  
ĉu imperiestro, ĉu filozofo ?

M.-A. : - Al mi ne estis facile resti plene  
filozofo. Mia pozicio tion malebligis.

A. : - Mi ŝatas tiun konfeson...

M.-A. : - Tamen mi faris, kion mi povis, kaj,  
kiam la devoj de mia ofico...

A. : - Mi komprenas. Ci ludis filozofe, kiam  
ci ne havis ion plibonan por fari... Sur unu  
el la lastaj tabuletoj, la homo, kiu komence  
volis realigi la revon de Platono, skribis  
tiujn vortojn, kiuj ĝojigas min. (Legante) :  
"Kiaj malfortikaĉaj politikuloj, tiuj nanoj,  
kiuj pretendas reguligi la aferojn laŭ la  
principoj de filozofio ! Ili estas buboj, kies  
nazon oni purigas per tuko... Ne esperu, ke  
iam ekzistos Platona respubliko." Ĉu en la  
horo, kiam ci tiel skribis, la imperio estis  
kuracinta cin el la filozofia frenezo, aŭ ĉu  
ĝi forŝiris de ci, kune kun filozofio, ĉian  
racion ?

M.-A. : - Mi faris la malmultan bonon, kiun  
mi povis.

A. : - Ci konsentis fari malbonon. Ci konsen-  
tis, ho ĉasisto de Sarmatoj, konduki trupon da  
rabistoj.

M.-A. : - Ĉu mi povis agi alie ?

A., legante : - "Se iu ago estas malhonesta,  
ne faru ĝin ; se io ne estas vera, ne diru ĝin:  
ĉar pri tio ci estas mastro." Ci faris agojn,



kiujn ci rigardis kiel malhonestajn. Sed ci aldonis ridante, mi supozas : "el la vidpunkto de l'principoj". Kaj ci elparolis mil mensogojn. En tiuj tagoj, ja vere, ci laŭdis politikon kaj mokis filozofion kaj ĝian bubecon.

M.-A. : - Ci incitas malesperon, kiu voras min. Tamen...

A. : - Ha! mi komprenas cian malesperon. Imperiestro filozofo, ci estis nura ŝirataĵo.

(Legante) : "Kiel Antoneno, mi havas por patrio Romon, kiel homo, la mondon." Kiel Antoneno, ci devis mortigi sarmatojn ; kiel homo, ci devis respekti la vivon de la homoj. Ci estis trudita al elekto : necesis rezigni esti Antoneno aŭ rezigni esti homo. Ci mokis filozofojn kaj principojn, kaj ci restis Antoneno.

M.-A. : - Homo, kiu estus nur homo, estas absurdaĵo, ĥimero, vakua revo. Ci ne povas esti sen havi difinitajn rilatojn kun la aliaj. Tiel, cia devo ne estas unu, sed ĝi estas multopa. Kiel eble plej mi povis, mi akordigis la devojn, kiuj, antaŭ mia konscienco, pledis unuj kontraŭ aliaj. Mia majstro Epikteto aprobis min.

A. : - Cin mallaŭdus Epikteto, kiu diris : "Se oni cin demandas, el kiu lando ci estas, neniam respondu, ke ci estas Atenano aŭ Korintano ; ĉiam respondu, ke ci estas mondĉivitano." Ci, per gestoj ofte murdaj, respondis : "Mi estas Romĉivitano ; kaj mi helpas la tiranan urbon premeigi la mondon." Sed mi grandanime ŝllasas al ci la Sarmatojn. Kia ajn estas la malnobleco de la milito, ci, imperiestro Marko, kulpis krimojn pligravajn ol milito.

M.-A. : - Ĉiuj kulpoj estas egalaj.

A. : - Mi konas tiun dogmon de ciaz majstroj. Ĝi estas absurda. Ĉar iu homo kapabla de tia krimo retroiros antaŭ tia alia. Imperiestro filozofo, homo de bono kaj penso, ci mortigis plurajn el ciaz subuloj, tial ke ili ne same pensis kiel ci, kaj tial ke ilia amo al la homaro esprimiĝis per aliaj vortoj ol tiuj de

la stoikistoj.

M.-A. : - Pri kiuj homoj ci parolas ?

A. : - Ŝajniku, kvazaŭ ci forgesis. Bizanco kaj Liono memoras.

M.-A. : - La kristanoj, tiuj malamikoj de la leĝoj...

A. : - La kristanoj metas obeon al sia dio super obeo al homoj. Same Sokrato laŭdis submetigon al la neskribitaj leĝoj prefere ol submetigon al la skribitaj leĝoj ; same la cinikuloj malsatas la civiton por ami la naturon ; same Epikteto cin persvadas aŭskulti la "vivantajn leĝojn de la dioj", ne tiujn "mizerajn leĝojn de la homoj, kiuj estas leĝoj de la mortintoj". Ci mortigis kristanojn, tial ke, per malsamaj vortoj, ili instruas tion, kion instruis la saĝuloj.

M.-A. : - Ci mensogas. Mi ordonis, ke oni punu iujn ajn, kiuj denuncis kristanon kiel tian.

A. : - Sed ci prezentigis antaŭ ciajn juĝistojn tiun, kiu estis denunciata.

M.-A. : - Ne pro liaj pensoj aŭ eĉ pro liaj paroloj. Oni lin persekutis nur pro la murdoj, kiujn liaj samsektanoj kulpadas en siaj sekretaj kunvenoj. Ĉu ci ne scias, ke ili voras homan karnon freŝe oferitan ?

A. : - Ĉu ci vidis tion, kion ci diras ?

M.-A. : - Pluraj tion konfesis.

A. : - Malkuraĝuloj, kiuj provis per mensogo savi sian vivon. Ĉu ci konis tion, kion diris Attalo, kiam, sidante sur ruĝe varmigita fera seĝo, lia karno, dank'al ci, kuiriĝis kaj fumis kiel viando de ĉasbesto ?

M.-A. : - Se mi ĝin sciis, mi ne memoras.

A. : - Sin turnante al la popolo, kiu frandis lian torturon, li diris en vero : "Estas vi, la hommangantoj..." Mi cin salutas, bonega kuiristo por hommangantoj.

M.-A. : - Mia ofico postulis...

A. : - Permesu, ke mi cin salutu duan fojon, bonega leno\* : Samtempe kiel al la bestoj de l' dezerto, cia grandanimo liveris al la

\* vendisto de sklavoj (N.d.l.tr.)

okuloj de l'popolo la preskaŭ infanecan nudon de Blandino.

M.-A. : - Ĉu la imperiestro povis damaĝi malamikojn de la imperio ?

A. : - Ne pli ol ĉefo de rabistoj povas damaĝi vojaĝantojn.

M.-A. : - Jupitero ordonis al mi komandi al homoj.

A. : - Kaj kiu instruis al ci tiun malfacilan arton ?

M.-A. : - Mia patro Antoneno, miaj majstroj...

A. : - Ili ĝin nesciis, tiom kiom ci.

M.-A. : - Kiu do ĝin konus, laŭ ci, se la pia Antoneno...

A. : - Eble cia Epikteto.

M.-A. : - Mi ĉiam demandadis por konsiloj la skribojn de Arrieno pri la granda Epikteto.

A. : - Ĉu ci scias, kion li diris pri Sokrato, "kiu sciis komandi al homoj" ?

M.-A. : - Mi kredas memori...

A. : - Laŭ la majstro, kiun ci alvokas, kaj kiun ci neniam komprenis, Sokrato diradis al ĉiu : "Faru, kiel Jupitero ordonis al ci, alie ci spertos damaĝon. Kiun damaĝon ? Neniun alian, ol malkonformon al cia natura funkcio. Ne serĉu damaĝon pli gravan ol tiu." Ĉu per tiaj vortoj ankaŭ ci komandis ? Ne, sed ci arbitre faris malbonon al iu ajn, kiu malobeis ciajn arbitrajn ordonojn. Ha! kiel Sokrato kaj Epikteto malŝatus cin, ĉampiono de la skribitaj leĝoj kontraŭ naturon kaj filozofion ! Se Sokrato estus vivinta sub cia regado, ankaŭ ci estus lin kondamninta al morto por malhelpi lin honori diojn malamikajn de Romo, kaj por puni lin, ĉar li koruptis la junularon. Ci estus ekzilinta Epikteton, ho posteulo de Domiciano, ho malŝatinda...

M.-A. : - Por malŝati min, necesas, ke ci komparu min al Sokrato kaj al Epikteto. Malgraŭ tio, kion ci antaŭe asertis, cia racio malpermesas al ci malŝati ĉiujn homojn.

A. : - Mi certigas...

M.-A. : - Ci asertas, ke ci vivas de antaŭ centokdek jaroj, kaj ke ci plezure konfuzas mortantojn. Ĉu ci ĉagrenis la agonion de Epikteto ?

A. : - Mi ne provis.

M.-A. : - Ci cin sentis jam antaŭe venkita.

A. : - Mi estis okupita aliloke... Sed diru, se la dioj estus proponintaj al Epikteto la demandon, kiun ili metis al ci, kiun respondon la lama filozofo estus farinta al la dioj ?

M.-A. : - Mi ne komprenas cian parolon.

A. : - Se la destinoj estus oferintaj la kronon al Epikteto, ĉu li estus akceptinta ?

M.-A. : - Antaŭe mi estus dirinta : jes. Nun mi jam ne scias.

A. : - Se li akceptus, li estus fariĝinta tia, kiel ci ; li estus konsentinta, por defendi la imperion, krimojn, kiuj permesus al mi malŝati lin.

M.-A. : - Mi kredas, ke li estus havinta la inteligenton rifuzi.

A. : - Do, kian vastan malŝaton al la homoj signifus lia rifuzo !

M.-A. : - Parolu pri ci. Diru, kiu ci estas kaj kion ci faris. Por ke mi sciu, ĉu ci rajtas malŝati min.

A. : - Eble sincera homo malŝatus la aliajn kaj sin mem. Tamen mi neniam kulpis maljustaĵon. Mi ĉiam agadis konforme al miaj principoj. Sed ci...

M.-A. : - Kiel gravas mi ? Ankoraŭ unu horo, kaj mi jam ne estos. Jam mia vivo forviŝigos, kiel, en la blindigo de l'vekiĝo aŭ en la tenebro de pli profunda dormo, sonĝo kaj ties necertaj nebuloj.

A. : - Malbona sonĝo, mi volas, ke ci konfesu.

M.-A. : - Ne, ne.

A. : - Konfesu, aŭ mi fermos antaŭ ci la rifugejon, en kiun ci urĝe cin ĵetas, la morton.

M.-A. : - Ci estas freneza.

A. : - Ĉu ci scias, kio estas la morto ?

M.-A. : - Ĉu ĝi estas la fino de ĉio...

A. : - Ĝi estas la fino de nenio.

M.-A. : - Do rekomenco de la pureco de l'mateno; restariĝo kaj liberigi de la estulo, kiun servute kurbigis liaj misfaroj kaj eraroj.

A. : - Aŭskultu. La demandoj, kiujn metis al ci la destino, kaj al kiuj ci mise respondis, estos al ci denove metitaj.

M.-A. : - Kiam ?

A. : - Post kelke da jaroj aŭ kelke da jarcentoj... Aŭskultu. Denove estos al ci dirite :

"Jen estas la nevidebla krono de la filozofo mastro de ci mem, kaj jen estas la krono de la mastro de homoj. Elektu."

M.-A. : - Ho! kian mirindan ĝojon ci anoncas al mi ! Filozofo mi estos. Malriĉa, sklava, kripla, de ĉiuj malŝatata faru min la Destino, se nur...

A. : - Denove ci kredos, ke unu homo povas porti ambaŭ kronojn.

M.-A. : - Neniel. Mi estas el tiuj, kiuj instruiĝas de siaj eraroj.

A. : - Malfeliĉulo, ci estos ĉion forgesinta.

La homo ne memoras pri siaj unuaj ŝanĉelpaŝoj kaj siaj unuaj balbutoj, ankoraŭ malpli ĝi povus reiri al siaj antaŭaj vivoj. Aŭskultu, imperiestro Marko. Ci decidis ankoraŭfoje la malbonan elekton. Ci ankoraŭfoje suferos, sur trono, la malrapidan misformiĝadon kaj la grandigantan disŝiriĝadon. Ci ankoraŭfoje mortos sufokite en la kiso de la sama malespero.

(Mark-Aŭrelio baraktas momenton kiel aprosieĝata de hundaro. Poste, liaj gestoj senforte refalas. Kaj li ĝemas, per estingiganta voĉo) :  
- Kompatu, kompatu, silentu.

A. : - Aŭskultu, imperiestro Marko (Sed li sin klinas super lin, rigardas. Poste, levante la ŝultrojn :) li jam ne estas tie ĉi. Nenio plu por diri sub tiu tendo, en kiu restas neniu...

\* \* \*

Kvara apero

Ahasvero aperas al la Ĵakvoj. \*in some in

aŭ.

LA DIALOGO DE LA RIBELO

\*\*\*\*\*

Vasta ebenajo. Dise, artaj aŭ naturaj, altaĵoj, sur kiuj staras fortikaĵoj. Ahasvero marŝas, peza de pensoj ankoraŭ malprecizaj. Li iras malrapide, senatente pri la eksteraj aferoj. De ĉiuj flankoj, laŭ padoj kaj vojoj, ankaŭ tra kampoj, estuloj malsane palegaj, senkarnigitaj, kovritaj de malpuregaj ĉifonaĵoj, agitiĝas, interproksimiĝas, formas grupojn, kiuj sin kunigas. Kaj jen multularo ĉirkaŭas la Vagantan Judon. En la fundo de sia penso, kapturiga kaj necerta kiel sono, li konfuze perceptas la grandan rumoron. Fine ĝi ŝiras lin el li mem. Li rigardas. Li aŭdas proksimajn parolojn.

VIRINO, puŝante per kubuto maljunulon :

- Parolu al la fremdulo. Li ne similas al ĉiu. Eble li aŭskultos nin, li...

LA MALJUNULO : - Eĉ se li nin aŭskultus, kion li povus kontraŭ tiom da mizero ?

LA VIRINO : - Li povas meti sin ĉe nian kapon. Al li oni obeus, ĉar li ne similas la aliajn, kaj ĉar li estas tre granda, kaj oni vidas, ke li estas tre forta. Oni ekbruligus la kastelojn,

\* Les Jacques : populara nomo de la francaj kampuloj-servutuloj, kiuj en mezepoko ribelis kontraŭ siaj sinjoroj. La plej fama el tiuj ribeloj ("jacqueries") okazis en j. 1358. (N.d.l.tr.)

oni mortigus la sinjorojn, kiuj formangas nian laboron kaj nian vivon. Poste oni estus liberaj kaj oni havus por mangi.

LA MALJUNULO : - Vi, virinoj, revadas nur pri ribeloj, sango, murdoj...

LA VIRINO : - Ni pensas pri la estonteco, ĉar ni amas niajn infanojn. Ni ne deziras por niaj infanoj la malbonojn, pro kiuj ni suferas.

LA MALJUNULO : - Ci nenion povas kontraŭ la sinjoro vestita per fera armaĵo ; ci nenion povas kontraŭ la pafarkisto, kiu frapas de malproksime. Kiam ili estos mortigintaj cin kaj min, kion gajnos el tio ciaj gefiloj kaj miaj genepoj ?

LA VIRINO : - Ci timas morti... Ci timas eĉ malpli ol tion. Ci ne kuragas paroli. Nu bone. Mi parolos.

(Si venas sin loki maldekstre de Ahasvero. Si parolas al li. Si sola parolas. Sed la vasta rumoro subtenas ŝian voĉon, kiel instrumentoj subtenas kanton. El tio ŝiaj vortoj ricevas strangan profundecon. Ahasvero aŭdas ilin, profundajn kaj potencajn, kvazaŭ ilin elparolus la tuta vastega popolĥoro).

LA VIRINO, aŭ pliguste LA POPOLO : - Fremdulo, fremdulo, ni malsatas kaj soifas.

AHASVERO : - Jam tro da jarcentoj mi forgesis malsaton kaj soifon... Popolo, ciaj vortoj estas por mi malplenaj.

LA POPOLO : - Fremdulo, fremdulo, ni parolas al cia koro.

AHASVERO : - Popolo, ci kredas frapi al domo, kaj ci frapas rokon. Estas neniu pordo, tra kiu ci povus eniri. Estas neniu malplena spaco, en kiu ci povus rifuĝi kaj kaŝiĝi.

LA POPOLO : - Fremdulo, fremdulo, kion ni faru en nia malsato, kion ni faru en nia soifo ?

AHASVERO : - Manĝu kaj trinku.

LA POPOLO : - Panon ni ne havas, kaj la fontoj fluas interne de la kastelo. Ni havas nenion manĝeblan, kaj se ni trinkas el la malpura akvo

de l'fosaĵo, iu arkisto enuanta en sia turo rid-  
eksplozas kaj prenas nin por pafocelo.

AHASVERO: - Manĝu viajn manojn, kiuj estas el  
bona viando. Manĝu la pecon da viando, kiu sen-  
utile skuigas en via buŝo. Se la suno kaj la  
polvo sekigas vian gorgon, tranĉe malfermu  
viajn vejnojn kaj trinku vian sangon.

LA POPOLO: - Fremdulo, ni bezonas niajn manojn  
por falĉi la grenon, kiun oni baldaŭ manĝos,  
por semi la grenon, kiun oni manĝos venontan  
jaron. Ni bezonas nian langon por depostuli iom  
el tiu greno, kiu tuta estas ido de nia laboro.  
Kaj se ni ne havos plu da sango, de kio venus  
la febro, kiu subtenas nian laboron? de kio  
venus la febro, kiu subtenas niajn kriojn por  
justeco?

AHASVERO: - Ĉu do viaj manoj ne semis kaj ri-  
koltis la grenon ĉi-jare manĝatan? Ĉu via lango  
ne postulis hieraŭ kaj ĉi-matene? Ĉu do ĝis nun  
via sango ne havis la febron por justeco?

LA POPOLO: - Ni laboris dum la kvar sezonoj.  
Ni laboris de la apenaŭ blanka ektagigo ĝis la  
tre nigra nokto. Ni kriadis pro malsato kaj  
tage kaj nokte. La febro por justeco nin tur-  
mentadis kaj tage kaj nokte. Ĝi tenis nin vek-  
itaj, kiam malsato kaj laceco nin lulis kaj  
duonsvenigis por endormigi nin.

AHASVERO: - Kial vi ne manĝas ĉi-jare la grenon,  
kiun vi semis la antaŭlastan aŭtunon kaj rikol-  
tis la lastan someron?

LA POPOLO: - La sinjoro ĉiom forprenis.

AHASVERO: - Kial vi ne depostulas tion, kio  
apartenas al vi, kion vi kreis per via penado?  
Ĉu en tiu ĉi lando ne estas juĝistoj?

LA POPOLO: - La juĝistoj estas el la partio de  
la sinjoro, ne el la partio de justo.

AHASVERO: - Kiomope estas la sinjoroj, kiomope  
la juĝistoj, kaj kiomope vi?

LA POPOLO: - La juĝistoj kaj la sinjoroj kaj  
eĉ la armitaj viroj estas malgrandnombraj. Sed  
ni estas tro multaj por koni nian nombron.



AHASVERO : - Kial vi restas surdaj kiel juĝistoj ? Kial vi restas, kontraŭ vi mem, kruelaj kiel sinjoroj ? Aŭskultu la febron por justo, kiu gruntas en vi. La gruntoj de febro fariĝas klaraj paroloj, se oni aŭskultas ilin. Aŭdu do kaj aŭskultu la ordonojn de justo.

LA POPOLO : - Niaj patroj aŭskultis la ordonojn de la febro de justo. Ili mortigis la sinjorojn, ili mortigis la juĝistojn. Ho ve! pluraj el ili altiĝis, kaj fariĝis juĝistoj kaj sinjoroj. La juĝistoj nin torturantaj, la sinjoroj nin mangantaj estas eks-mortigintoj de sinjoroj kaj juĝistoj.

AHASVERO : - Ĝis nun via parolo similas al silento. Via parolo faras unu paŝon antaŭen, unu paŝon malantaŭen, kaj via movado sendirekta ne kondukas vin pli foren ol senmoveco. Findecidu. Diru tion, kion vi volas, kaj nur tion, kion vi volas.

LA POPOLO : - Ni volas...ni volas...Ni volas...ni volas...

AHASVERO : - Ĉu vi tute malkonas vian propran koron ?

LA POPOLO : - Malsato, soifo, battoj, humiligoj konigis al ni nian koron.

AHASVERO : - Ĝi do parolu, kaj se ĝi ne povas paroli, ĝi krii.

LA POPOLO : - La krioj utilas por nenio. Nia koro parolas al ci klaran lingvaĵon. Ni volus renkonti justulon. Ni metus lin ĉe nian kapon. Ni blinde obeas al li, por ke li mortigu la hodiaŭan maljuston kaj malhelpu la naskigon de morgaŭa maljusto.

AHASVERO : - Se vi blinde obeas, kiel vi scios, ĉu li kondukas vin al justo aŭ al maljusto, al egala ĝojo aŭ al novaj abismoj de sufero ?

LA POPOLO : - Se ni ekzamenos liajn ordonojn, ni dividos nin, ni interbatalos, kaj la malamikoj nin premeĝos.

AHASVERO : - La suferado ankoraŭ ne instruis al vi tion, kion scii necesas. Kiam vi scios, vi jam ne bezonos alian ĉefon ol justo. Daŭr-

igu aŭskultadi la lecionojn de sufero. Ja ĝi instruos vin por marŝi.

LA POPOLO : - Nia sufero krias tro laŭte, kaj ni ne distingas plu ĝiajn vortojn. Nia sufero estas falado en la morton, ĝi ne povus instrui nin pri marŝado.

AHASVERO : - Ĝoju, ĝoju. Malsato, soifo kaj febro vin mortigos. Ĝoju : via malsano estas mem via propra kuracilo.

(Li eksplodas per kruelega, daŭranta rido).  
VIRINO el la plej proksimaj : - La fremdulo estas freneza. Ni foriru.

(La parolo de la virino estas ripetata ĉirkaŭ ŝi, poste pli malproksime. Ŝtono falinta meze de lago, ĝi sulkiĝas la akvon laŭ plilarĝiĝantaj rondoj. La amaso, per senkohera movo, iom post iom disiĝas. Grupoj malrapide foriĝas aŭ staras dise. Sur pluraj lokoj sonas krioj de kolero aŭ de espero. Sed sennombre respondas malkuraĝigitaj paroloj kaj ŝultrolevoj. Tamen kelkaj, pezaj de tro da doloroj kaj tro da malamoj, kvazaŭfrenezaj kiel bestoj tro longe pelitaj, sovaĝe deflankiĝas. En ili tumultas, pli kaj pli precizaj, venĝoprojektoj : longaj rampadoj ondoliniaj kaj kaŝe malicaj, kaj jen subitaj incendiaj eklumoj. Je momentoj, ilia fermita vizaĝo preskaŭ apertigis, la lipoj kaj la okuloj tremetas al subrido. La lumo de la incendio heliĝas malpli malbonan estontecon. Baro el teruro kaj flamoj haltigas la sinjorojn kaj la juĝistojn antaŭ la plej gravaj maljustaĵoj. Nu, ĉar la gesto de venĝo estas sennombre imitita, la baro kuntiriĝas, ĝis ĝi enfermas mastrojn kaj arbitralojn en strikta egaljusto.

Ĉiuj foriĝis de Ahasvero. Nun li marŝas en potenca soleco. Kaj jen li parolas al si mem).  
AHASVERO : - Ĉu la vortoj de tiu popolo ne falis, ĝin konfuzante, mezen de penso, kiu volis naskiĝi en mi ?... Mi enuas ; mi enuas jam tro da jarcentoj. Mi serĉis ludon por distriĝi. Iam mi havis la filozofojn, amuzajn marionetojn de logiko kaj kontraŭdirado : da filozofoj ne estas

plu. Mi iris por konfuzi agoniojn, kiuj riskis esti kvietaj : la pastroj oportune anstataŭas min. Ĉiu mortanto malespere sin reĵetas malantaŭen, terurita pro la vizio de la inferaj flamoj ; kaj la kiso de la imagata fajro tremigas lian karnon pli profunde ol la kiso de la febro... Ho! mia senmorta enuado... Sajnas al mi, ke mi pripensis turmenti la potenculojn. Bruligi kelkajn kastelojn kaj kelkajn monaĥejojn, eble tio min amuzus... Ahasvero, kial ci mensogas al ci mem kiel banala filozofo ? En la sekreto de cia spirito kaj de ciaj kalkuloj estas espero, kiu timtremas sin konfesi. Estu kuraga, ido de Izraelo, suprenigu al la lumo, por ĝin fronte alrigardi, la plej tremantan el ciaj pensoj. Sciu, kiu ĝi estas, por ke ci ĝin certigu, firmigu kaj pligrandigu, aŭ por ke ci detruu ĝin. Estu sincera, Ahasvero : ci volus starigi juston en la mondo. Ĝi estas la revo de cia raso. Tiu, kiu cin kondamnis, ĝin revis kiel ci. Kaj li scipovis igi sin sekvata de la homoj. Sed la kompatindulo laŭiris turnovojojn, kiuj erarigas la mondon. Estas tial, en la profundo, ke ci malamis lin ; ci malamis la generalon, al kiu oni obeas, kaj kiu eraras pri la manovro, kaj kiu rifuzas la solan venkmedon. Por jarcentoj li ekstermis la egalredonon, unikan juston tiel longe kiel okazadas maljusto. Li fordonis sian vivon anstataŭ preni la vivon de la maliculoj. Li predikis amon, kiam endis proklami venĝon. Oni adoras liajn gestojn, oni ripetas liajn vortojn, kaj la mondo estas pli malbona ol antaŭ lia veno. Ahasvero, ci havas super li grandegan avantaĝon : ci ne havas koron ; ci ne riskas fariĝi milda kaj humila. Tiu supereco cin signas, por ke ci estu la savonta homo... Sed kiel gravas, ke la homaro fariĝu justa kaj bona, se la universo restas maljusta kaj malbona ? Aŭdacu ĉion diri, Ahasvero. Kiel gravas por ci la justeco kaj la feliĉo de aliaj, se cia propra malfeliĉo restas

nekuracebla ? Ci amas, en justo, la absoluton kaj la universalon. Ke ĝi estu la volo de Dio farita sur la tero ; ke ĝi estu ĉies feliĉo. Pensu pri ci aŭ pensu pri la aliaj : ĝuste tio ne gravas. Ĉar justo ne ekzistas, tiel longe kiel unu sola maljusto kreas obstaklon al ĝi. Ha! ĝi estas la plej mirinda kaj la plej kompleta el la poemoj, la vero de cia raso. Sufero kaj morto estas idoj de peko. Unu sola kulpo de la homo, kaj la mondo estas malekvilibrigita, kaj, ĉar abismo vokas abismon, krimoj kaj doloroj sin multobligis : la universo estas vasta frenezo ploranta. La homo justo reordigos la egalpezon. Estu do la nova Adamo, riparu la malbonon kaŭzitan de la unua Adamo. Bruligu ĉiujn malbonajn herbojn. Fekundigita de tiu cindro, la tero fariĝos ĝardeno de justo kaj ĝojo, en kiu neniu mortas... Ne morti, ĉu tio estas la bono, kiun ci deziras, Ahasvero ? Malfeliĉulo, ĝi estas tio, kion ci havas, ĝi estas la mizero, kiu cin rodadas... Rigardu pli profunde, Ahasvero. Cia vera mizero, ĝi estas, ke ci ne vivas. Starigu la universalan juston, kaj ci amos la harmonian vivon. La homaro, fariĝinte aminda, faros al ci koron por ĝin ami. Vivanta kaj feliĉa, ha! kiom ci amus vivon kaj feliĉon... Aŭskultu, Ahasvero, la voĉon, kiu supreniĝas en ci el la profundo de la jarcentoj. Nova Adamo, ci estis sufiĉe longatempe la Homo de Doloro ; estu, fine, la Homo de Justo kaj Savo. Kreu por la bonaj kaj por la malgrandaj la eternan vivon, liverante al flamoj kaj detruado la malicajn, la riĉajn kaj la premantajn.

(La vespero estas veninta. Ahasvero aŭdas apud si, en dornaĵo, kvazaŭ bruon de rampanta besto. Li rigardas. Ĝi estas viro sin kaŝanta. La Vaganta Judo eksaltas trans la dornaĵon, ek-kaptas la viron kaj brutale skuas lin).

AHASVERO : - Kial ci cin kaŝas ?

LA VIRO, penante repuŝi la agresanton : - Iru al ciaj aferoj, fremdulo, kaj lasu min iri al miaj.

AHASVERO : - Kiu diras al ci, ke ciaj aferoj ne estas la miaj ?

LA VIRO, kun freneza rigardo : - Se ciaj aferoj estas la miaj, jen tenu, ekprenu kaj iru meti fajron al la kastelo.

(Li lasas fali dikegan rezin-torĉon, kiun li kaŝis sub sia bluzo, li tiras el sia ŝino fajroŝtonon, kiun li ĵetas teren. Ahasvero lasas la viron, levas la torĉon kaj la bruligilon.)

AHASVERO : - Kiun kastelon ci preferas vidi bruli.

LA VIRO : - Mi preferus ĉiujn.

AHASVERO : - Ĉiujn, konsente, se oni helpos min. Mi unue kuras al la plej proksima.

(Li faras kelkajn rapidajn paŝojn al la kastelo, kiu jam simbole incendiigas de la krepuskolumo. Sed subite, haltante) :

- Jen venas la nokto. Mi preferas labori dumtage.

(Elirintaj el oni-ne-scias kie, multaj homoj staras ĉirkaŭ Ahasvero. Ili aklamas lin per voĉo tamen retenata)

LA POPOLO : - Vivu la fremdulo ! Vivu la fremdulo ! Li tuj bruligos la kastelon.

AHASVERO : - Ne hodiaŭ vespere. Morgaŭ, je ektagiĝo.

LA VIRO : - Se ci timas, redonu al mi tio, kion ci prenis de mi. Mi tiom amas fari mem la laboron.

AHASVERO : - Ci farus ĝin ne tiel bone.

(Turnante la dorson al la kastelo, rapide forirante : ) - Ĝis morgaŭ, je la komenca matenblanko.

(Ĉiuj sekvas lin per la rigardo, kun konserteno kaj hezito).

LA VIRO : - Tiu, se iam oni revidos lin ĉi tie... Li estas timulo.

DUA VIRO EL LA POPOLO : - Mi, mi kredas, ke oni lin revidos. Li revenos kun la sinjoro, kaj indikos al li tiujn, kiuj plej laŭte kriis... Li estas spiono.

TRIA VIRO EL LA POPOLO : - Sed ne, li foriras for de la kastelo.

LA DUA VIRO EL LA POPOLO : - Ci estas tro stulta... Nura militruzo.

(Ĉiuj sin klinas, levas ŝtonojn, ĵetas ilin en la direkto al Ahasvero. Li estas jam ekster atingeblo, kaj lia marŝo estas tro rapida, ke oni provu lin peli.)

LA VIRINO, kiu longe parolis kun Ahasvero en la mezo de la tago : - Mi, mi diras al vi, ke li revenos, kaj ke morgaŭ brulos la kastelo.

VIRO : - La virinoj, ĉiam urĝemaj por plendoĝemi, ĉiam urĝemaj por esperi.

(Ŝi foriras levante la ŝultrojn).

LA VIRO, kiu havis la torĉon kaj la fajroŝtonon : - Necesas gvati ĉirkaŭ la kastelo.

ALIA : - Por kion fari ?

LA VIRO : - Por mortigi lin, se li revenos.

(La plimultaj el la tie estantaj silente foriras. Kelkaj restas por interdiskuti. Poste, en la jam nigra nokto, ili sin direktas al la kastelo, kaj, ankoraŭ malproksime, disigas kaj iras posteni por supervidi ĉiujn pasejojn.

La nokto pasas tute, sen interesaj incidentoj.

La matena antaŭkrepusko komencas blankigi la orienton. Unu el la gvatantoj eklautigas la blekon de la sirnio. La aliaj, rampante, venas je lia voko, sin grupigas ĉirkaŭ li.)

LA GVATANTO : - Jen li alvenas.

LA ALIAJ : - Li ne pasos.

LA GVATANTO : - Ni kaŝu nin malantaŭ la arboj, ambaŭflanke de la vojo... Mi havas mian forkregon.

Alia : - Mi, mi havas mian falĉilon.

Tria : - Al mi sufiĉas miaj pugnoj.

(Ahasvero alproksimiĝas. Fore, malpreciza rumoro. Oni sentas, disajn kaj kaŝitajn, la elementojn de homamaso. Kredeble, nenombreblaj okuloj gapas al la kastelo.

Ahasvero alvenas meze de la embusko. Li sidigas sur la tero.)

UNU VIRO, al sia najbaro : - Kion li faras ?

LA ALIA : - Kiel grave ? Ni mortigu lin.

(Ĉiuj abrupte sin ĵetas sur lin. Kaj ili frapas per forkegoj, per falĉiloj, per pugnoj).

AHASVERO, ekridegante : - Ha! ha! ha!

(Kiu frapis per la pugnoj, tiuj forkuras hurlante pro doloro. La aliaj konsternite rigardas. La armiloj glitis sur la haŭto kiel sur bronzo. Kelkaj frakasiĝis.

Ahasvero, flegme, frapas la fajroŝtonon, ekbruligas la torĉon. Poste, senvorte, li levigas, kaj per akcelata paŝado, marŝas al la kastelo.)

ARKISTO en la turo : - Kiu ci estas ? Kien ci iras ?

AHASVERO, ne interrompante sian marŝadon :

- Ha! ha! ha!

LA ARKISTO : - Bone ridos, kiu laste ridos.

(Li celas Ahasveron. La sago trafas la bruston, restan enplantita en la vesto.

Ahasvero, daŭre kurante, deŝiras la sagon kaj ĵetas ĝin al tero.)

LA ARKISTO, vokante : - Al mi, kompanoj, jen estas malamiko.

(Multaj sagoj siblas ĉirkaŭ Ahasvero. Pluraj tuŝas lin kaj glitas. Aliaj strange resaltas. Kelkaj restas kroĉitaj en la vestoj. Li ne prenas plu sur sin la penon ilin eltiri. Nenio ŝajnas malfaciligigi lin, nenio malplirapidigas lian kuradon.

La popolo estas nun post li, anhelante por lin sekvi. Sed lin solan celas la arkistoj.)

LA SINJORO, kiu ĵus alvenis meze de la tumulto :

- Mortigu do tiun rabiulon !

UNU ARKISTO : - Sinjoro, niaj sagoj glitas sur li.

LA SINJORO : - Tial ke viaj manoj tremas.

(Li ekŝiras de li la arkon, zorgigante celas. La sago frapas Ahasveron en la brusto, maldekstre. Ĝoje : )

- Rekte en la koron !...

(Ahasvero daŭrigas sian marŝadon).

- La fosaĵo lin ja haltigos. Preparu dikan ŝtonegon por premegi lin. Atendante, pafu al la popolo.

(La arkistoj obeas. Kelkaj viroj el la popolo falas kriante. La plimulto el la aliaj retroiras kaj disigas. Cento obstine sekvas Ahasveron.)

Ahasvero staras ĉe la bordo de la akvoplena fosaĵo. Per abrupta gesto li forĵetas siajn vestojn. Jen li estas en la fosaĵo. Li naĝas per la dekstra brako, dum la maldekstra mano tenas la torĉon. Li albordiĝas ĉe la piedo de la levponto. Dikega ŝtono falas sur lian kapon. Momente ŝanceliĝinte sub la bato, li rerektiĝas kaj refirmiĝas.)

AHASVERO : - Ha! ha! ha! La torĉo daŭre brulas.

(Li komencas ekbruligi la levponton. La arkistoj, teruritaĵ de la nevundebleco, forkuras kriante.)

UNU ARKISTO : - Mi ne volas kontraŭbatali homon, kiun Dio protektas.

ALIA : - Li estas sanktulo.

LA SINJORO : - Sorĉisto li estas.

(Li faras krucosignon. La sorĉisto ne ŝajnas ĝin rimarki.)

- Kuru voki la kapelanon. Li venu kun benita akvo.

(Sed jam la levponto komencas flami, kaj la kapelano ne alvenas.)

- Ni rifuĝu en la ĉefturo.

(Li fuĝas kun la malmultaj fideluloj restintaj apud li.)

La levponto disfalas. Ahasvero pasas tra la ardaĵo, el kiu ŝprucas flamoj.

La popolo ĵetis en la fosaĵon ŝtonojn, teron kaj branĉofaskojn. La plenigita fosaĵo liveras ĝis la enirejo mallargan pasejon. La popolo penetras en la ĉirkaŭremparon, sin ŝovante inter la muro kaj la fajro. Oni kuras post Ahasvero. Multaj portas sekan lignon. Pluraj tenas torĉojn, kiujn ili ekbruligas. Malgraŭ la sagoj, ili venas amasigi siajn faskojn ĉe la piedo de



la ĉefturo.

Supre de la ĉefturo, apud la sinjoro, PASTRO en sacerdotaj vestoj, kun aspergilo en mano, aspergante Ahasveron : - In nomine Patris, et Filii, et Spiritus sancti\*...

Ahasvero sin klinas, levas du dikajn ŝtonojn, ĵetas unu al la pastro, kiu falas)  
AHASVERO : - In nomine religionis\*, ha!ha!ha!

(Li ĵetas la duan ŝtonon al la sinjoro)  
- In nomine justitiae\*.

(La sinjoro falas. La fajro lekas la murojn de la ĉefturo.)

LA ARMITAJ VIROJ : - Pardonon ! Kompaton !  
Ni kapitulacas senkondiĉe.

AHASVERO : - Nenian indulgon.

LA POPOLO : - Nenian indulgon ! Nenian indulgon ! Nenian indulgon !

AHASVERO, al si mem : - Ili finos la taskon sen mi. Ni iru bruligi la plej proksiman monaĥejon.

\* \*  
\* \*

---

\* En la nomo de l'Patro, de l'filo kaj de l' Sankta Spirito.

En la nomo de l'religio.

En la nomo de justo.

Kvina apero

Ahasvero aperas al La Boesio

aŭ

LA DIALOGO PRI LA MEMVOLA SERVUTO\*

\*\*\*\*\*

La Boesio sur sia mortolito. Ĉirkaŭ li lia edzino, lia onklo kaj Montanjo.

LA BOESIO : - Ĉesu plori, se vi amas min, Sinjorino edzino mia. Mi sentas min en stato plibona. Mi volas morgaŭ min levi, kaj, profitante de tio, ke oni kredas min tro malforta por taskoj, kiujn la homoj diras gravaj, verki iujn sonetojn por via laŭdo kaj honoro. Sed postmorgaŭ, sen plua ripozo kaj pigro, mi reiros al la ŝarĝoj de mia ofico.

SINJORINO DE LA BOESIO : - Mia Stefano, mia Stefano, se vi min forlasos, kio restos al mi krom morti ?

LA BOESIO: - Vin forlasi, mia Margareta, jen estas afero, pri kiu mi ne pensas. Mi amas vin per amo tro granda. Al mi necesas ankoraŭ sesdek jaroj de via kunvivado kaj kompanio, minimume... Ĉu vi bonvolas, amata edzino mia, kaj vi, mia onklo kara, retiriĝi, por ke mi povu pritrakti kun mia amiko Mikaelo certajn apartajn temojn ? Mi sentas min forta kaj fortika ; kaj la homa

-----  
\* En la teksto de Han Riner, tiu ĉapitro estas verkita en franca lingvo de la XVIa jarcento. Franclingvanoj povas, legante la originalon, ĝui tiun arkaisman parfumon, kiu, kompreneble, ne estas konservita en la traduko.

(N.d.l.tr.)

vivo, kiu malofte atingas jarcenton, estas tro mallonga, ke mi perdu tempon.

(La edzino kaj la onklo de La Boesio longe kisas lin kaj retiriĝas).

MONTANJO : - Mia Stefano, mi admiras vian gajecon kaj vian anim-egalecon en la suferado.

LA BOESIO : - Kion vi diras pri suferado, frato mia ? Ĉu ĝi estas tiel granda malbono, via opinio ? Kaj ĉu vi ĉiam scipovas distingi ĝin disde plezuro ? Ili, diras Sokrato, estas interkatenitaj malamikoj, kiuj ĉiam iradas unu post la alia. Sed al mi ofte ili ŝajnas pliĝuste kompanoj, kiuj marŝas sampaŝe, aŭ gefianĉoj, kiuj en rapida danco sin intermiksas kaj konfuzas, tiel ke nur duone oni ilin distingas.

MONTANJO : - Vi estas, frato mia, tiel abunde provizita per bonoj kaj trezoroj spitantaj la fortunon, ke neniu homo vivis pli sate kaj kontente. En vi la filozofo ne prezentas malafablan vizaĝon ; sed li estas rido kaj plaĉaj paroloj. Li pensigas min pri travestiita princo, kiu ŝajnigis sin burleska amuzisto.

LA BOESIO : - Burlesko estus troa, frato mia, kaj ridego estas ĉiam akompanata de ia maldeco. Sed travestiita princo, certa esti obeata, kial li ne havus ridan vizaĝon ?

(La buŝo de La Boesio sin malfermas tute larĝe, granda truo de silento ; lia korpo subfleksigas, liaj okuloj returnigas.)

MONTANJO : - Jen li denove en unu el tiuj malfortiĝoj, kiuj min timigas... Ĉu li ne forsendis sian edzinon, kiel Sokrato, ĉar li opiniis, ke li estas nun mortonta ? (Li maltrankvile sin klinas super sian amikon). Kaj mi povas nenion fari. Baldaŭ lia spirito revenos el la nekonata kvartalo, en kiu ĝi promenas, tiel ridanta kaj afabla, kaj neniom perdinte el sia forteco. Sed la korpo restos malfortigita kaj konsumita. Ve! ve! mia frato, restas al mi malmulte da tempo por vin havi (Li kisas lin).

LA BOESIO, rekonsciigante : - Ĉu vi, frato mia? Viaj karesoj revenigas min el la lando de sonĝoj kaj svenoj. Mi estas feliĉa, ke mia edzino kaj mia onklo ne vidis tiun ĉi novan malfortigon.

MONTANJO : - Estas nenio ; tio estas ordinaraj akcidentoj en tiaj malsanoj.

LA BOESIO : - Vere, frato mia, estas ja nenio, eĉ se okazus tio, kion vi pleje timus.

MONTANJO : - Do, mia frato, vi havas nenian frandon por la vivo ? Tamen, kiam vera amikeco ĝin spicas, ĝi akiras sensimilan guston.

LA BOESIO : - Se Dio donus al mi elektopovon, ĉu reveni al vivo, ĉu fini la vojaĝon, kiun mi komencis, mi ja tre hezitus pri la elekto.

MONTANJO : - Kvankam pliaĝa ol mi je tri jaroj, vi estas tiel juna, frato mia !

LA BOESIO : - Mi estas en la aĝo, en kiu Dio elektis morti. Kredeble li havis bonajn motivojn.

MONTANJO : - Diaj motivoj...

LA BOESIO, ridetante : - ...havas, foje, ion homan. Se mi ne timus la malpiecon de tiaj komparoj... (pli ridetante). Sed malpiecon mi timas...

MONTANJO : - Vi ŝajnas preskaŭ ĝoji pro morto en tia aĝo.

LA BOESIO : - Krom tio, ke imiti Kriston konvenas al bona kristano, mi vidas tiom da avantaĝoj ĉe apartiĝo disde la vivo en tiu ĉi tempo.

MONTANJO : - Kiujn avantaĝojn ankoraŭ ?

LA BOESIO : - Krom tiu malsano, kiu ŝajnas al mi sen alia kuraceblo ol morto, mi ĉiam estis bonfarta - kio eble ne estus pludaŭranta. Kaj ĉu vi kalkulas por nenio, frato mia, eviti la maloportunojn de maljuneco ? Mi diras maloportunojn tiom mensajn kaj moralajn kiom korpajn.

MONTANJO : - Per la vortoj mensaj maloportunoj, ĉu vi komprenas la malfortigon de la memoro, de la juĝkapablo kaj de la fantazio ?

LA BOESIO : - Vi diras mian penson, frato mia.

MONTANJO : - Sed kion vi nomas moralaj maloportunoj de maljuneco ?

LA BOESIO : - Verŝajne mi vivis ĝis hodiaŭ kun malpli da malico kaj pli da simpleco ol en la aĝo de ambiciemo kaj avareco.

MONTANJO : - Ĉu vi ne estas en aĝo de maljusto, ke vi akuzas pri ambiciemo kaj avareco la maljunecon de Stefano de La Boesio, la plej virta kaj konstanta el la homoj, la Sokrato de nia jarcento ? Ĉu Sokrato estis malpli filozofo en siaj lastaj tagoj ol en la mezo de sia vojo ?

LA BOESIO : - Sokrato estis unika, frato mia, krom nur por tiu, kiun blindigas amikeco. (Noktigas). Mi sentas dormemon pezi sur miaj palpebroj. Retiriĝu, mia frato, por ke mi dormu.

MONTANJO : - Permesu, ke mi maldormu apud via dormo.

LA BOESIO : - Ne. Mi ripozas nur tiam, kiam mi scias dormantaj ĉiujn miajn amatojn. Kaj gardu vin, mi havas kun ili mirindajn interrespondojn. Se vi ne dormos, tion mi sentos, kaj mi ne dormos. Do kisu min, frato, poste hastu al dormo.

(Montanjo longe kisas La Boesion).

MONTANJO, ĉe la pordo : - Mi lasas la pardon duone malfermita. Se vi bezonos ion ajn, frapu per la martelo sur la sonorilon, kaj mi alkurros.

LA BOESIO : - Iru, frato mia. Mi promesas, ke mi vokos, se vi povos utili al mi.

(Montanjo retiriĝas, post kiam li lumigis noktolampeton. La Boesio fermas la okulojn por dormo aŭ medito.

Pasas tempo, pli ol horo.)

AHASVERO, enirante kaj refermante la pardon post si : - Mi sekrete disĵetis en la aliaj ĉambroj odoron tian, ke ĝis la mateno neniu vekigos : nek edzino nek hundo nek amiko. (Li mallalte ridas :) Ha! ha! oni ne atingas la dek-sesan jarcenton de sia aĝo sen malkovri kelkajn etajn misteraĵojn de Sinjorino Naturo... Bedaŭrinde nenio povas endormigi min ĝis halt-

igo de miaj kruroj kaj de mia menso.

LA BOESIO, eligante el torporo : - Ĉu vin, mia frato, mi aŭdas murmuri iujn vortojn ? Ĉu okazis akcidento en la domo, aŭ ĉu vi estis maltrankvila pro mi ?

AHASVERO : - Nek okazis akcidento, nek mi estas maltrankvila. Sed mi deziras paroli kun vi.

LA BOESIO : - Mi ne rekonas tiun voĉon, nek, en la necerta lumo, tiun vizaĝon.

AHASVERO : - Neniam vi aŭdis tiun voĉon, nek vidis tiun vizaĝon. Mi ne degnas montri min dufoje.

LA BOESIO : - Mistera parolo, kiu povus eligi el la lipoj de la morto, se la morto havus lipojn.

AHASVERO : - En tiu ĉi momento ci saĝe parolas, ci kiu ofte estis sensaĝa. La morto ne havas lipojn, kaj mi ne estas la morto.

LA BOESIO : - Kiu vi estas ? Kaj kial vi parolas sen gentileco al tiu, kiu jam ne havas forton por puni la spitantajn ?

AHASVERO : - Jam enkolerigita ! Ha ! ha ! ha ! Nu, mi sukcesos.

LA BOESIO : - Enkolerigita, ne. Via malkuraĝo staras malsuper kolero, kaj meritas nur males-timon.

AHASVERO : - Mi parolis pli familiare al pli grandaj ol ci, al imperiestro Marko, por ekzemplo, aŭ, por ekzemplo, al tiu Jesuo, kiun eble ci kredas Dio.

LA BOESIO : - Ĉu ci estas pastro, por esplori pri mia kredo ? Se jes, ĉiumatene ci parolas tiranece al cia Dio, kaj trudas lin malsupren-veni en ciajn manojn. Sed al imperiestro Marko, mortinta antaŭ tiel longa tempo, kiel ci estus parolinta, krom en iu abrupta alparolo kaj ridinda prozopopeo el pompa kaj kria prediko ?

AHASVERO : - Mi havas la aĝon, kiun havus Jesuo se li estus plu vivinta. Mi parolis al li sur la vojo al la kalvario. Koncerne imperiestron Markon, mi konfuzis lian agonion, kiel mi konfuzas cian.

LA BOESIO : - Antaŭ momento mi kulpis pri miso en filozofio. Ankoraŭ iom plu, kaj mi incitigus kontraŭ sonĝon el mia dormo aŭ fantazon el mia deliro, t.e. kontraŭ ion, kio eligas el mi, t.e., se bone rigardi, kontraŭ min mem.

AHASVERO : - Ĉu iam oni incitigas alie ol kontraŭ sin mem ? Sed tion oni nescias. La kolero estas arkisto, kiu, anstataŭ celi al realo, celas en spegulo bildon kaj neniaĵon.

LA BOESIO : - Vi estas filozofo, sinjoro sonĝo mia, pri kio mi vin dankas. Dank'al vi mi mortos, kiel Sokrato mem, konversaciante pri noblaj temoj.

AHASVERO : - Sonĝo mi ne estas. Mia nomo estas **Ahasverus**.

LA BOESIO : - Bela nomo, kiu sendube klare sonas meze de latina preĝo. Sed tiuj, kiujn ni vidas en dormo aŭ febro, kial ili ne prenas al si nomojn ?

AHASVERO, mirigite : - Ĉu neniam ci aŭdis rakonti pri Ahasvero ?

LA BOESIO : - Mi ne scipovus diri. En mi levigas tenebroj, kiuj kovras kaj mergas iujn fundojn de mia memoro. Kaj tro granda estas mia malforteco, ke mi konsentu al neutila peno...

AHASVERO : - Eble ci pli facile rekonos la nomon, kiun donas al mi la vulgarularo. Mi estas la Vaganta Judo.

LA BOESIO : - Mi aŭdis pri ci. Sed, verdire, neniam atendis cian viziton. Sidigu vin, bela Sinjoro, viaj maljunaj kruroj kredeble estas lacaj, tiel longe trakuradinte la mondon.

AHASVERO : - Ripozo pli lacigus min. Permesu, ke mi restu staranta. Tiel mi cin honoros.

LA BOESIO : - Kiel plaĉos al vi, bela Sinjoro. Ĉu vi diros, al kio mi ŝuldas la favoron de via veno ? Aŭ ĉu vi kutimiĝis asisti al ĉiuj mortantoj ?

AHASVERO : - Mi venas nur al tiuj, kiuj, sen

mi, riskus morti en paco.

LA BOESIO : - Ci anstataŭas la pastron, kiun mi esperis eviti. Laŭ cia plaĉo. Ĉar ci ne volas lasi min ripozi antaŭ la morto, eble pli bone mi ripozos poste.

AHASVERO : - Aŭskultu mian parolon, Stefano de la Boesio. Ci estas unu el la plej bonaj homoj, kiuj iam vivis.

LA BOESIO : - Ĉu Ahasvero estus la nomo de la demono de orgojlo ?

AHASVERO : - Tiuj, kiuj kapablas juĝi, konfesos pri ci, laŭlonge de la deklivo de l'jarcentoj, jenan trioblan laŭdon : "Li verkis belan libron; li havis belan amikecon ; li mortis per bela morto."

LA BOESIO : - Vivo tiel plenigita kaj tiel finita ravas min tiel, ke mi mortas ĝoja kiel mi vivis.

AHASVERO : - Ha! ha! ha! Feliĉo estas mensogo. Cia amiko multoble cin perfidos.

LA BOESIO : - Se ci parolas kontraŭ min, mi cin aŭskultas. Se kontraŭ miajn amatojn, mi retenas mian spiron kaj tuj mortos.

AHASVERO : - Do mi parolos kontraŭ cin... Cia forpaso estos malpli bela, ol kredos la homoj. Ci mortas kun apudesto de malamiko.

LA BOESIO : - Ĉu batalo bone tenata estas malpli bela ol paco bone uzata ?

AHASVERO : - Se ĉi tie iuj amus cin, ĉu ili ne maldormus super ci ? Ĉu malamiko povus eniri ? Mi parolas kaj ridas sufiĉe laŭte, ha!ha!ha! Ci vidas. Neniu venas, neniu vekigas. Tiel, en la ĝardeno de Getsemano, la disĉiploj dormis, dum Jesuo, ha!ha!ha! preĝis, ploris, ŝvitis sangan ŝviton.

LA BOESIO : - Mi toleras la impertinenton de tiaj komparoj de maljunulo, kiu ja bone gajnis sian rajton pri senprudentiĝo.

AHASVERO : - Se ci volas, ni lasu ĉian komparon... Nek cia edzino nek cia onklo, nek tiu, kiun ci nomas frato...



LA BOESIO : - Se ci estas songo, la granda bruo, kiun ci faras sub mia frunto, ne povus esti aŭdata de ekstere.

AHASVERO : - Songo mi ne estas (Li metas manon sur la vizagon de La Boesio).

LA BOESIO : - Do, maljunulo malvarma kiel tombo, dek ses jarcentoj da malico povis provizi cin per ruzoj kaj rimedoj. Ci endormigis per drogoj tiujn, kiuj alie estus tie ĉi.

AHASVERO, al si mem : - Amo faras lin klarvida (Laŭte:) Ne nur cia morto estos malpli bela ol iuj kredos. Cia libro eliĝos sensukigite el trapaso, kiun mi diros.

LA BOESIO : - Ĉu ci pretendas koni la estontecon ?

AHASVERO : - Ĉu la rivero ne eliĝas el la fonto, kaj la estonteco el la nuno ? Miaj okuloj legas sub la fruntoj la penson, kiu fariĝos parolo aŭ ago.

LA BOESIO : - Se ci legus la pensojn, ci ne misuzus tempon apud mi. Ci sciis, ke nenio povas min konfuzi, kaj ci fuĝus batalon antaŭe perditan.

AHASVERO : - Mi legas mian venkon en la aktoj de proksima estonteco.

LA BOESIO : - Ci ne konfuzos min, tiel longe kiel mi estos mi mem. Se deliro anstataŭos la racion, kiun mi nomas mi, kiel gravas tio, kio okazos en loko, en kiu mi jam ne estos ? Tio ne pli atingos min ol la penso de fremdulo, aŭ tio, kion povos fari la vermoj eliĝintaj el mia kadavro.

AHASVERO : - Ĉu ci deziras, ke mi parolu pri cia libro ?

LA BOESIO : - Mi estus tre malbona filozofa, se, kun la morto inter la dentoj, mi ankoraŭ ne estus libera je deziro.

AHASVERO : - Ĉu ci preferas, ke mi parolu pri cia amiko ?

LA BOESIO : - Silentu aŭ parolu, laŭ cia plaĉo. Se ci elektos paroli, parolu pri tio, kio al ci plaĉos. Ci anoncis cin kiel mian malamikon.

Do, kial ci estus scirola pri miaj preferoj ?

AHASVERO : - Tiu, kiun ci nomas frato, kaj kiun ci subtenas sur la vojo de komenciĝanta vivo, estos multe pli granda ol ci por la okuloj de la homoj.

LA BOESIO : - Mia malamiko plenigas mian koron per ĝojo.

AHASVERO : - Mi scias, ke ci estas sena je ĵaluzoj, kiuj trempas kaj malstreĉas aliajn lutojn de amikeco, ha!ha!ha! Tial mi diras al ci tiujn aferojn. Mikaelo Ejkem\* ne estas, kiel Stefano de la Boesio, kampa herbo, kiu haste kreskas kaj floras, antaŭ ol ĝi sekigis kaj mortos. Mikaelo estas tre granda arbo, kiu malrapide kreskas.

LA BOESIO : - Ci povu verdir.

AHASVERO : - Pro la onda ĉarmo de sia spirito kaj la delikateco de sia lingvaĵo, li estos senmorta.

LA BOESIO : - Aŭdante tian novaĵon mi ĝojas.

AHASVERO : - Forfluu nur unu jarcento, kaj neniu cin konos alie ol kiel amikon kaj sekvanton de Montanjo. Tiel viaj pranepoj inversos la rangojn kaj rolojn.

LA BOESIO : - Ci plenigas min per feliĉo.

AHASVERO : - Per la longa fekundeco de sia fantazio, per la dolĉeco kaj glateco de sia parolo, kiu estos kiel eble plej ĝentila kaj plena, Mikaelo fariĝos pli granda ol Stefano...

LA BOESIO : - Mi cin dankas.

AHASVERO : - Sed, tuj kiam Stefano jam ne estos, ha! kiel Mikaelo sin montros malfortika laŭ karaktero kaj malriĉa laŭ interna belo.

LA BOESIO, al si mem : - La malamiko diras timojn, kiujn mi ne volis konfesi al mi, kaj min vundas en la koro. Sed li ne vidos mian timon, ankaŭ ne mian vundon kaj aflikton. (Laŭte:) Ci mensogas.

AHASVERO : - Mi diras veron, kaj ci tion scias. En la tempo de via unua renkonto, lia poeto kara estis la galanta Ovido, kaj lia inklinio (memoru)

-----  
\* Mikaelo Ejkem de Montanjo.

direktis lin al Epikuro. Ci rektigis lin ĝis la firmeco de Lukano kaj de la stoikistoj. Morgaŭ ci jam ne estos tie lin subtenanta, kiel paliso subtenas arbon junan, se diri cian penson ; sed verdire, kiel kverko portas hederon. Tiam li refalos al rampa vivo kaj al la singardemo de malalta kurago.

LA BOESIO : - Mi konas mian fraton, kaj mi scias, ke ci mensogas.

AHASVERO : - Ci penas tion kredi. Sed en la profundo de cia spirito ci scias, ke mi diras vere, kaj ci suferas.

LA BOESIO : - Ci mensogas per la gorgo. Se al li okazos iu malfirmigo, aŭ reveno de la antaŭa homo, li pensos pri sia frato, kaj la amikeco refaros lin filozofo.

AHASVERO : - Li fine malamos filozofion kaj fuĝos de ĝi, kiu pensigas pri la morto ; kaj Mikaelo timos pensi pri la morto.

LA BOESIO : - Ci parolas pri malkuragulo. Sed Mikaelo, sena je fanfaroneco, estas kalkulinda inter la bravuloj.

AHASVERO : - Li estos urbestro en Bordojo ; venos pesto, kaj, anstataŭ subteni sian popolon per sia kunesto kaj sia kurago, li fuĝos de sia devo kaj de la pesto.

LA BOESIO : - Kial mi cin kredus ? Kiel ci legus sub la fruntoj pestojn aŭ akcidentojn nedependajn de nia spirito ?

AHASVERO : - Ĉu mi ne povus legi el la steloj ?

LA BOESIO : - En la libroj de la antikvaj astrologoj mi serĉis prognozojn koncerne hodiaŭajn faktojn. Ĉiufoje, kiam astrologo parolis klare, li mensogis, kiel ci nun mensogas.

AHASVERO : - Mi lasas en cia koro venenitan sagon, kiun ci vane penas elŝiri. Kaj mi parolos al ci pri cia libro.

LA BOESIO : - Ne jam. Antaŭe, malbona astrologo, mi volas iom paroli pri la astrologoj.

AHASVERO : - Kion ci diros pri ili ?

LA BOESIO : - Ne la mil mensogojn, kiujn de ili mi scias. Necesus pli da vivolongo, ol al

mi restas. Sed unu nuran, kiun rakontis al mia patro.

AHASVERO : - Mi aŭskultas.

LA BOESIO : - Ĉu ci konis Johanon Stofleron, faman matematikiston kaj astronomon el Germanio?

AHASVERO : - Jam mil kvincent jarojn, mi konis ĉiujn, kiuj estis rigardataj kiel multesciaj inter la homoj. Sed malofte mi konigis min de ili.

LA BOESIO : - Ĉu ci memoras, ke tiu teruris la popolojn per antaŭdiro pri la mondfino en j. 1524 ?

AHASVERO : - Mi memoras. Tial ke, en februaro 1524, granda konjunkcio de Saturno, Jupitero kaj Marso okazos en la signo de la Fiŝoj. Li miskomprenis, ke...

LA BOESIO : - Ci konas lian eraron post la sekvo.

AHASVERO : - Li forgesis, ke...

LA BOESIO : - Memoru. Ĉiuj astrologoj el Eŭropo, Azio kaj Afriko pravigis lin kaj anoncis post li la universalan diluvon.

AHASVERO : - Ne ĉiuj. Aŭgusteno Nifus, rimarkinte la konsternegon, kiu ekkaptis la popolojn, publikigis libron por demonstri, ke tia diluvo ne estas timenda.

LA BOESIO : - Sed Vito Rangon, arma generalo en Florenco, ektimis, ke Karlo-la-Kvina, trankviligite per la rezonoj de Aŭgusteno Nifus, neglektu la savajn antaŭzorgojn. Tial li dungis faman kuraciston por refuti la libron de Nifus, por decidigi Lian Imperiestran Moston prizorgi sian sekurecon. Ĉiuj scienculoj aprobis tiun refutadon kaj mallaudis Nifus'on kiel trompiston kaj perfidulon. La imperiestro sendis misiulojn por viziti la grundojn en liaj provincoj kaj marki la lokojn, sur kiuj homoj kaj bestoj estus malpli elmetitaj al la akvoj de l'diluvo.

AHASVERO : - La frenezo estis, malmulte mankas, universala.

LA BOESIO : - Mia patro rakontis al mi, ke en

Francio la teruro estis granda tiel, ke multaj apenaŭ ne perdis la spiriton, kaj konstruis ŝipojn, kaj inter ili estis Aŭriolo, Tolozano, profesoro pri kanona juro, kiu faris por si arkeon laŭ la ideo kaj simila de tiu de Noa.

AHASVERO : - Se cia patro estus saĝa, li povus en tiu konjunkturo gajni mirindajn riĉaĵojn. Tiuj, kiuj loĝis proksime de maro aŭ rivero, forvendis je granda perdo siajn kampojn kaj domojn.

LA BOESIO : - Mia patro estis prudentulo, kaj li klopodis por trankviligi tiujn frenezulojn.

AHASVERO : - Stranga tasko, kaj malfacila.

LA BOESIO : - Sed iliaj mensogoj pri la estonteco instigis la astrologojn ankaŭ mensogi koncerne la pasintecon.

AHASVERO : - Kiel ?

LA BOESIO : - Johano Boden, homo tro fida je la ĥimeroj de astrologio, legis al mi iujn paĝojn de libro "Pri la Respubliko", kiun li nune prilaboras. Li rakontas en ĝi tiun elreviĝon de siaj kunfratoj.

AHASVERO : - Tio estas sincera kaj naiva.

LA BOESIO : - Sed li atribuas ĝin al miraklo.

AHASVERO : - Kredo pri miraklo apartenas al bona kristano.

LA BOESIO : - Laŭ lia diro, la granda diluvo de 1524 estis prave prognozita.

AHASVERO : - Kiel, ĉar ĝi ne okazis ?

LA BOESIO : - Tial ke Dio, en la tempo de la unua ĉielarko, promesis al la homo, ke tia plago ne trafos lin ree. Tial li malhelpis per miraklo kaj aparta volo tion, kio laŭnature estis okazonta.

AHASVERO : - Tio estas subtile argumentita.

LA BOESIO : - Cetere, diras Boden, tiu pereiga konjunktio de planedoj afliktis la kristanaron per multaj malfeliĉoj. Boden recitas ilin laŭlonge, iom pligrandigas ilin, kaj, por plibone trovi sian konton, ne forgesas la konkeron de Rodiso far la Turkoj. Sed tiu, se ci memoras...

AHASVERO : - Mi memoras. La urbo estis prenita en 1522, du jarojn tro frue por Boden.

LA BOESIO : - Tion mi diris al li. Sed ĉu li konsentos senigi sin je tiu malfeliĉo?... Cetere li rakontas, ke tiu jaro 1524, kaj speciale februaro, alportis grandajn pluvegojn kaj inundojn en diversaj landoj. Nu, mia patro, kiu amis la veron, memoris, ke ĝuste tiu monato februaro estis, male ol kutime, seka kaj serena. Koncerne la malfeliĉegojn, kiuj sekvis la konjunkcion de la planedoj, mia patro konis du.

AHASVERO : - Kiujn nome ?

LA BOESIO : - Malforta frostoj, kiu ruinigis parton el la brasikoj kaj pomarboj.

(silento)

AHASVERO : - Ci ne diras la duan ?

LA BOESIO : - Ne sen rideto ĝin recitis mia patro. Ĝi estis la eksigo de multaj etaj kaskistoj, de kiuj estis konsumita la financo de Francio... Ci scias, kion mi opinias pri astrologio. Diru tion, kio al ci plaĉos.

AHASVERO : - Mi diros pri cia libro, kiu estos neutila al la homoj.

LA BOESIO : - Al trivialaj homoj ĉio estas neutila.

AHASVERO : - Ĉu ci ne esperis, ke iam ili forskuos sian memvolan servuton ?

LA BOESIO : - Hazarde mi havis tiajn esperojn, kiam mi skribis. Sed tiam mi estis dekokjara, kaj nun mi estas tridek-jara.

AHASVERO : - Ĉu ci pentas, ke ci skribis ?

LA BOESIO : - Ne. Neniam la penso liberigos la popolojn ; sed ĝi helpas iujn spiritojn liberigi. Eĉ se ĝi ne havas alian avantaĝon, tio, kion mi skribis, formis kaj liberigis min mem. Ĝi estis la ilo, per kiu mi mem skulptis.

AHASVERO : - Mi aŭdis, ke ĝi estis cirkonstanca afero kaj krio jetita kontraŭ la tiranecon kaj la kruelegajojn de Anno de Montmorencio.

LA BOESIO : - Ĝi estis tio kaj io alia. Ĝi estis alio, por ke ĝi estu tio.

AHASVERO : - Ci fariĝas obskura kiel tombo.

LA BOESIO : - Kiel krii frenezon de iu tempo, se ne kriante eternajn verojn ?

AHASVERO : - Tiu libro, el kiu iuj folioj kuras sub mantelo\*, ĉu ci scias, kiam ci jam ne estos tie, ĉu ĝi estos presita ?

LA BOESIO : - Mi scias, tial ke Mikaelo tion promesis.

AHASVERO : - Mikaelo lasos pasi longan tempon, antaŭ ol li plenumos sian promeson.

LA BOESIO : - Mi lasis lin juĝonto pri la oportuna horo.

AHASVERO : - Li timos perdi per ĝi protekton kaj favoron de la altuloj, kaj, eldonante ciajn aliajn produktojn, li sin gardos montri la "Kontraŭ-Unu"\*\*.

LA BOESIO : - Ci diras kalumnion.

AHASVERO : - Li trovos en ĝi tro delikatan fasonon por ĝin allasi al la kruda kaj peza aero de tiel malagrablaj sezonoj... Ne li unua presos ĝin.

LA BOESIO : - Kiu do ?

AHASVERO : - Iuj el la reformita religio ĝin elmetos al lumo kun malica celo, miksitan kun aliaj skriboj el ilia faruno\*\*\*.

LA BOESIO : - Kiu legos, tiu facile vidos, ke mi ne estas doktoro el Genevo.

AHASVERO : - Tiu, kiun ci nomas frato, incitigos kontraŭ tia uzo de cia skribo.

LA BOESIO : - Kaj bone agos, pri kio mi lin dankas.

AHASVERO : - Sed li mensogas.

LA BOESIO : - Neniam Montanjo mensogas.

AHASVERO : - Li diros, ke ci pritraktis tiun temon dum cia infaneco.

-----  
\* franca esprimo = kaŝe cirkulas.

\*\* Subtitolo de "Traktato pri memvola servuto".

\*\*\* Franca figura esprimo.

LA BOESIO : - Ĉu, dek-okjara, mi estis jam matura viro ?

AHASVERO : - Dek-sesjara, li diros, kaj ke ci ĝin pritraktis kiel ekzercon nur, kiel banalan temon, jam turmentitan en mil lokoj de libroj.

LA BOESIO : - Ci estas malsaga. Ci parolas pri mia amiko, kiel ci parolus pri mia malamiko. Ci diras ne tion, kion li faros, sed tion, kion ci farus, se al ci estus permesite, por malhelpi mian gloron... Se iu malsagaca dirus tiajn mensogajn parolojn, Mikaelo reenigus al li lian mensogon en la gorgon.

AHASVERO : - Ha!ha!ha! Mi plantis en cian koron du venenitajn sagojn.

LA BOESIO : - Mensogo rekonita estas sago sen forto, kiu falas longe antaŭ la celo... Nun ci ne havas ion plu por diri al mi. Lasu min morti.

AHASVERO : - Kion ci nomas morti ?

LA BOESIO, ridetante : - Pri tio demandu min morgaŭ. Mi ne rakontas pri iu lando, antaŭ ol mi ĝin vidis.

AHASVERO : - Ĉu ci kredas, ke ci revenos sur la teron por nova homa vivo ?

LA BOESIO : - Iuj asertis tiajn songaĵojn. Koncerne min, mi ne scias.

AHASVERO : - ... aŭ ĉu ci kredas eniri en eternan ripozon ?

LA BOESIO : - Tion mi ne kredas. Nenio ripozas en la naturo, kaj, se okaze, ripozi estus ĉesi esti.

AHASVERO : - Do senmova ĉielo kaj senfina infero ŝajnas al ci revo kaj neniaĵo ?

LA BOESIO : - Jes, se mi devas verdiri.

AHASVERO : - Ci pravas... Iam ci revenos sur la teron en nova homa korpo. Ĉu ci scias, kion tiam ci vidos ?

LA BOESIO : - Por scii mi atendos vidi.

AHASVERO : - Ci vidos, sub novaj nomoj, samajn ekscesojn, maljustaĵojn kaj memvolajn servutojn.

LA BOESIO : - Eble.



AHASVERO : - Kaj tio estos kun kulpo cia.

LA BOESIO : - Tion mi negas.

AHASVERO : - Jesuo kredis, ke amo savos la mondon. Li eraris.

LA BOESIO : - Ho ve !

AHASVERO : - Ci, ci konsilas alian vojon al savo. Sufiĉas, ci diras, la volo nenion doni al tirano. Ne necesas, ke la servutulo klopodu fari ion por si kaj por siaj fratoj, sed nur li ne klopodu ion fari kontraŭ sin kaj kontraŭ siajn fratojn.

LA BOESIO : - Ĉu tiu parolo ne estas vera ?

AHASVERO : - Kiel tiu de Jesuo.

LA BOESIO : - Kion ci diras ?

AHASVERO : - Por ke tiuj paroloj liberigu la mondon, necesas, ke unu aŭ la alia el ili estu aŭdita, amata kaj praktikata de ĉiuj homoj. Tio estas neebla.

LA BOESIO : - Tion mi timas por la popoloj.

AHASVERO : - Nur la ribelo, kiu frapas la subpremantojn, kiu mortigas la maliculojn, kiu senigas la ŝtelistojn, detruas subpremadon, malicon kaj ŝteladon por starigi juston.

LA BOESIO : - Milfoje oni ribelis, kaj tamen justo ne regas sur la tero.

AHASVERO : - Pluraj batalis por justo kun maljustaj koroj, pluraj batalis kontraŭ tiranecon per tiranaj manoj.

LA BOESIO : - Milito estas lernejo de maljusto, tiraneco kaj krueleco. Neniam batalo naskos profundan pacon, neniam perforto naskos juston; neniam malbono naskos bonon.

AHASVERO : - Do ploru kaj malĝoju ĝis la morto kaj trans la morto. Ĉar ci malesperas pri la estonteco de la homaro, kies parto ci estos.

LA BOESIO : - En ĉiu tempo estos pluraj justuloj. Se mi revenos en homa naturo, mi nur volas esti unu el ili.

AHASVERO : - Ĉiuj vojoj al la regno de Dio trompis tiujn, kiuj sekvis ilin. Tial, kiam mi renovigas mian esperon, mi fidas nur al armita justo kaj egalredono.

LA BOESIO : - Tiuj, kiuj sekvis aliajn vojojn, trovis almenaŭ sian propran bonecon kaj la pacon de la koro. Sed ci, judo, sur cia antikva vojo, ci renkontis nur malicon kaj maltrankvilon.  
 AHASVERO : - Komprenu do...

(Sed la okuloj de La Boesio fariĝis fiksjaj, kaj ili ne rigardas plu al ĉi tiu flanko de la vivo, lia buŝo estas malfermita kiel antaŭ la plej miriga kaj abrupta el la spektakloj. El ĝi eliĝis lasta stertoro, kiu rompiĝas kaj estingiĝas.

AHASVERO, metante manon sur la koron de La Boesio : - Li eniris en tiun misteron, kiu estas al mi fermita, kaj kiun la homoj nomas morto. (Forirante:) Ĉu mi sukcesis konfuzi liajn lastajn pensojn ? Mi ne scias... Kia animo multe pli forta ol iu Mark-Aŭreljo ! Juste estas diri, ke ĝi portis nur tridek tri jarojn da vivo, kaj ne estis premegita sub la pezo de imperio.

\* \* \*

Sesa apero  
 Ahasvero aperas al Galilejo  
 aù  
 LA DIALOGO PRI LA SCIENCO

\*\*\*\*\*

En karcerero de la Sankta Ofico, maljunulo premegita de malforto kaj malvenko. Li sidas sur sia lito, kun la kapo peze falinta, la brakoj malsupren pendantaj, la manoj preskaù trenigantaj sur la pavimeroj. La pordo malfermiĝas, kaj li ne emociiĝas. Ĉu eĉ aùdis li ?

Ahasvero, ferminte la pordon post si, venas al Galilejo kaj delikate tuŝas lian ŝultron. En eksalto la scienculo relevas la kapon. Oni vidas anue la heroece vastan lumon de la frunto, nedifektita kaj venkinta ĉefturo. Sed sur ruinoj ĝi starigas sian forton kaj sian gloron. La okuloj, kiuj vidis tiel ĝuste kaj profunde, estas preskaù estingitaj ; la vangoj falas inter faltoj ; la nazo, iam elflorinta potenco kaj maliceto, falas kiel tristajo en la hirta blanko de la lipharoj kaj barbo ; la buŝo malfermas truon de malespero.

GALILEJO : - Kion ci deziras de mi ?

AHASVERO : - Nenion timu. Mi estas el ciaj amikoj.

G., en disŝira rido : - Mi havas tiom da amikoj, kaj tiel diversajn. La plibonaj volas la savon de mia animo.

A. : - Ĉu ci malŝatas tiujn, kiuj volas savi cian malsanan korpon ?... Ferdinando...

G. : - Ĉu ci venus komisie de Lia Grandduka Moŝto ?

A. : - Morgaù oni cin transportos en lian

palacon de la Triunuo ĉe la Montoj... Laŭ tiuj, kiuj kredas la vortojn, ci estos daŭre mallibera. Sed, krom la libero eliri, kiun cetere cia farto igus iluzia, ci ĝuos ĉiujn oportunaĵojn de la vivo.

G. : - Tiurilate mi ne estas tre postulema.

A. : - Ci estos flegata de homoj, kiuj cin amas. Ci havos librojn kaj instrumentojn.

G. : - Libroj kaj instrumentoj estas senutilaj, kiam la okuloj jam ne vidas... kaj kiam oni promesis ne plu rigardi.

A. : - Ci povus ridi, kun kelkiuj, pri la komedio de cia apostatiĝo.

G., kun terur-movo : - Vade retro, Satanas\*... kristano ne ludas pri sia savo.

A. : - Trankviliĝu, timulo. Ci tro scias, ke mi ne estas Sinjoro Satano. Mi eĉ malpli estas familiarulo de la Sankta Ofico.

G., suspekteme : - Ci volonte diras, kio ci ne estas ; ci ne diras, kio ci estas.

A. : - Ĉu ciaj okuloj estas komplete fermitaj, aŭ cia menso komplete estingita ? Aŭ ĉu, por certaj malkovroj, scienculo estas malsupera al vulgarulo ? Neniu homo el la popolo vidas mian vizaĝon sen kribi : Jen estas judo.

G., atente rigardante sian kunparolanton :  
- Multaj vizaĝoj estas mensogaj, kaj, pro mono, pli ol unu judo, samkiel pli ol unu sinpretenda kristano...

A. : - Mia vizaĝo verdiradas jam de antaŭ mil sescent tridek tri jaroj.

G. : - Jam 1633 jarojn ! (Flanken :) Ĉiu frenezo ne estas enfermita nur en la kapoj de klerikoj kaj en la kapoj de aristotelanoj.

A. : - Ĉu ci neniam aŭdis pri Ahasvero, la Vaganta Judo ?

G. : - En mia infaneco mi aŭdis maljunulinojn rakonti multajn fabelojn. Jam longe la fabeloj

-----  
\* latine : retroirui, Satano.

de la sekvantoj de Aristotelo sufiĉas por gajigi min. La vivo estas mallonga...

A. : - Ne por mi, ho ve !

G. : - Kaj la scienco estas longa.

A. : - Se ci aŭskultus min, ciaj oreloj cin instruus en unu horo, pli ol ciaj okuloj cin instruis en dek jaroj.

G., flanken : - Ĉu li estus multescia homo, kvankam tro amanta tiujn mensogojn, kiujn oni hezitas nomi burleskaĵoj kaj ĉarlatanaĵoj ? Persekutita serĉado igis stranga kaj iom freneza pli ol unu serĉiston.

A. : - Kion ci murmuris inter ciaj dentoj ?

G. : - Se ci havas ion por instrui al mi, mi aŭskultas.

A. : - Unue, ĉu ci kredas, ke mi estas Ahasvero, kaj ke jam mil sescent jarojn...

G. : - Kiel grave ?

A. : - Mi volas scii.

G. : - Se ci serĉas, ekster la temoj de kredo, homon, kiu kredas ĉion diratan al li, iru aliloken. Ne mankas aristotelanoj.

A. : - Mi ne amas la gregojn.

G. : - Se ci volas paroli al prudentulo, kiu ne asertas sen certeco, restu.

A. : - Kio malhelpas, ke ci kredu mian parolon ?

G. : - Cia vizaĝo diras cin judo ; mi akceptis cian parolon, kiam ĝi estis akorda kun cia vizaĝo. Cia vizaĝo diras proksimume tridek kvin jarojn ; cia parolo malakordas kun ĝi je iom tro granda nombro.

A. : - Ĉu iam ci vidis vizaĝon 1633-jaran ?

G. : - Tiu sperto mankas al mi, mi humile konfesas.

A. : - Laŭ kiu rajto ci supozas ĝin pli simila al centjarula vizaĝo ol al tridekjarula ?

G., ridetante : - Cia potenca rezonado venkis min. Mi konsentas al ci la 1633 jarojn, kiujn ci postulas. Sed malavaro pro malavaro. Mi sufiĉe ofte diskutis kontraŭ Aristotelon, por ke ci konfesu miajn dumil jarojn proksimume.

Permesu, ke mi forgesis la ekzaktan daton de mia naskiĝo. Je nia aĝo oni rajtas pri kelkaj memormankoj.

A. : - Ci ne kredus min, tion mi sentas, se mi rakontus al ci ĉion, kion mi vidis de post la kalvario.

G. : - Mi ne kredas Danton Alighieri, kiam lia poemo rakontas tion, kion li vidis de la obskura arbaro. Tamen li estas elokventa pli ol ci scipovus esti.

A. : - Ni ne kverelu pro tiel malgrava afero. Mia estonteco estas sufiĉe longa, ho ve ! por ke senĉagrene mi oferu al ci dek ses jarcentojn. Ni parolu pri io alia. La tero turniĝas.

G., rapide : - Tion kredi ci rajtas, ci kiu ne estas kristano. Sed mi, por kiu mortis Jesuo, mi scias, ke ci eraras. La kardinalaj moŝtoj tion demonstris al mi, kaj hieraŭ mem mi solene ĝin agnoskis. La Skriboj ne permesas, ke kristana spirito dubu pri la senmoveco de nia globo.

A. : - Povra malsana maljunulo, cia korpo, ne cia spirito estis venkita.

G. : - Feliĉa malvenko, kiu certigas mian eternan savon.

A. : - Iam ci diris pri la scienco : "Nek super nek malsuper la kredo ; ekster la kredo."

G. : - Mia juneco estis tro sentima.

A. : - Ni parolu pri ĝi pli ĝuste. Ci ne sentas en ci la vokitecon de martiro.

G. : - Se bezone, mi mortus pro la kristana kredo. Ĉu mi ne faris pli ol morti, forlasante pensojn, kiujn mia racio asertis veraj ?

A. : - Ci forlasis ilin ŝajne, kaj nur por la tempo, dum kiu ci estas en la manoj de ciaj malamikoj.

G. : - La kristano ne nomas malamikoj tiujn, kiuj savas lian animon.

A. : - Antaŭ dek sep jaroj, kiam dek unu teologoj deklaris cian doktrinon "malsaĝa kaj absurda en filozofio" (en kion entrudiĝis tiuj fak-

uloj ? Ne sutor ultra crepidam!\*) same kiel "formale herezaj", ci submetis cin al ilia juĝo. Ci promesis "komplete forlasi la kondamnitajn opinion kaj neniel ĝin teni, instrui kaj defendi, nek skribe nek parole". Ci malfidelis dek sep jarojn al la promeso, kiun eltrudis el ci tiu bando da rabistoj, kaj ci pravis dum dek sep jaroj.

G. : - Mi malpravis. Mi dankas mian Dion, ke li ne vokis min al si en tiu epoko de blindeco kaj de morta peko.

A. : - Ci mokas min kiel Urbanon\*\*. Kiam ci ne estas en prizono, ci, malgraŭ la singarda formulo, kiun mi antaŭe rememorigis, metas la sciencon super la kredo, la Naturon super la Skribojn.

G., vive : - En miaj plej herezaj horoj, neniam mi pelis tiel malproksimen la tromemfidon.

A. : - Vere estas, ho subtila, ke ci volonte procedas per demandoj. Ci demandis : "Kial ni devus komenci niajn serĉadojn per la parolo de Dio prefere ol per liaj verkoj ? Ĉu hazarde vi trovus lin malpli nobla kaj bonega kiam li kreas, ol kiam li parolas ?"

G. : - Mia sankta patrino la Eklezio suverene respondis al miaj demandoj. Mi ne devas plu demandi.

A. : - Ĝi kredis kondamni cin, ĝi kondamnis sin mem. Tion ci scias, kaj malgraŭ tiaj suferoj ci priridas ĝin en la fundo de cia koro.

G. : - Filo ne ridas pri sia patrino.

A. : - La scienco estas cia patrino, la Eklezio cia malamiko. Kaj ci kaŝmalicete ĝojas pro la embaraso, en kiun ĝi sin metis.

-----  
\* "Ŝuisto, ne super la Ŝuo". Vorto atribuita al la greka pentristo Apelo, kaj signifanta : ne kritiku super via kompetento (N.d.l.tr.)

\*\* La papon Urbanon VIII (N.d.l.tr.)

G. : - Neniam la Eklezio estas en embaraso ; al ĝi estis promesite, ke la pordoj de la infero ne superos kontraŭ ĝi.

A. : - Memoru, kion ci skribis al Elio Riodati en la komenco de ĉi-jaro, unu monaton antaŭ cia proceso.

G. : - Mi komplete forgesis pri tio.

A. : - Ci skribis : "Se tiu Fromondo kaj la ceteraj starigus, ke la moviĝado de la tero estas herezaĵo, kaj se la demonstroj, observoj kaj necesaj renkontoj pruvus, ke ĝi moviĝas, en kiun embarason ili estus jetintaj la Sanktan Eklezion !"

G. : - Infano timeme avertas sian patrinon. Kiam la patrino ordonis, restas al ĝi nur obei.

A. : - Precipe se la patrino estas freneza, stulte memkontenta kaj kruela.

G. : - Kiu bone amas, bone punas. La savo de mia animo estas la sola afero por...

A. : - Ankoraŭ en januaro, ci starigis jenan rezonadon kiel nepreneblan turon : "La mondo estas verko de Dio, kaj la Skribo lia parolo. Sed ofte la Sankta Spirito uzis esprimojn kiuj, se rigore akceptitaj, estus kontraŭaj al vero. Aŭ ĉu vi konsentas pri Dio ema al kolero, al pento, al forgeso ? Ne, certe. Vi konfesas, ke la Skribo konfirmigis siajn parolmanierojn al la kapabloj kaj opinioj de la vulgarularo. Sed la Naturo, ministro de neŝangebla Dio, indifera al homaj opinioj kaj deziroj, ĉiam obedas la samajn leĝojn en la movoj, figuroj kaj arangoj de la diversaj partoj de la universo. La popoloj longe kredis, ke la luno estas plata; ĝi tamen ne malpli estis sfera."

G. : - Kristano humiligas sian orgojlan raciemon, kaj pie ripetas la decidojn de la Eklezio. Eble mi rajtis kredi tion, kio ne estis formale kondamnita. Hodiaŭ ĉio estas ŝanĝita.

A. : - Jam unu fojon ci ŝajne kliniĝis. Ĵus libera, ci malŝatis la decidojn de homoj, al kiuj mankas la inteligento ne por kontraŭbati ciajn



demonstrojn, sed eĉ nur por ilin kompreni.  
Denove ci releviĝos per sama malŝato.

G. : - Mi jam ne havas la tromemfidon juĝi miajn juĝintojn.

A. : - Eĉ malpli la tromemfidon kredi, ke la naturo varias laŭ la ordonoj de kelkaj homoj. Ci skribis al Francisko Zugoli : "La naturo, mia kara sinjoro, mokas la konstituciojn kaj dekretojn de princoj, imperiestroj kaj monarkoj." Ĉu ci kredas, ke ĝi obeas prefere al kelkaj sutanvestitoj ?

G. : - La naturo obeas nur al Dio. Sed, kiam Dio rivelis...

A. : - Cia Dio dividiĝas je kiom da personoj ? Ĝi konsistas unue el Urbano VIIIa, la patro, poste el liaj multaj filoj la Inkvizitoroj. Koncerne la Sanktan Spiriton...

G. : - Ĉesigu ciajn malpiaĵojn, aŭ mi cin forpelos per krucosigno.

A. : - Ĉerca Galilejo, ci ne sufiĉe kredas al la potenco de l'signo por...

G. : - Ci trouzas la fakton, ke mi ne havas benitan akvon.

A. : - Ha! ha! ha! kia amuzo, aŭdi cian timon, cian malfidon kaj cian sekretan ironion paroli kiel la stulteco de maljuna virino.

G. : - Kial mi estus tiel orgojla, ke mi preferus mian racion al tiu de tiom da multesciaj homoj ? Ĉu ilia unuanima atesto ne povis konvinki min ?

A. : - Kiu do skribis : "Oni ekzamenas la atestojn pri aferoj dubaj, pasintaj kaj ne daŭrantaj, ne pri tiuj, kiuj estas aktualaj kaj ĉi-tieaj" ?

G. : - Mi ne konas tiun parolon.

A. : - Ĝi estas de Galileo Galilei en lia libro pri "La Arkisto". Ci do perdis ne nur la forton por pafi novajn sagojn, sed eĉ la memoron pri ciaj antaŭaj kuraĝoj ?

G. : - Mi rezignis orgojlon kiel la unuan kaj la plej malbonan el la ĉefaj pekoj. La morto proksimiĝas, kaj mi volas prezenti min antaŭ

la superega Juganto en la humila sinteno de la plej milda el la fideluloj.

A. : - Nu do!... Tuj kiam tiuj ĉi ne tenos plu cin en siaj ungegoj... Sed, ĉu ci konfesas ĝin aŭ ne, la tero turniĝas. Tion mi sentas, tion mi vidas.

G. : - La okuloj de la spirito estas potencaj; tamen iafoje ili eraras.

A. : - Per la okuloj de la korpo mi vidas ĝin turniĝi, kaj mia kapturino sentas ĝin fuganta sub miaj piedoj... Ho ve! turniĝi ne sufiĉas al ĝi. Kiel infano, ĝi balanciĝas sur sia akso, kaj tio estas la kaŭzo de tio, kion vi nomas procesio de la ekvinoksoj.

G. : - Vere estas, ke la komplikeco de iliaj spiritalaj linioj ne kontentigas min, kaj, se la Evangelioj neglektis tiun temon...

A. : - Kaj iliaj embarasoj pri cirkloj kaj epikloj cin kontentigas ! Kaj la freneza rapido, per kiu ili dotas la firmamenton...

G. : - Mi promesis kredi, ke la suno turniĝas ĉirkaŭ la tero. Mi ne promesis ekspliki, kiel tio estas ebla. Ju pli malfacile akceptebla ĝi estas, des pli granda estas mia merito. Mia religio estas plena de misteroj. Mi konfesas la kredon de karbisto\*, kaj mi pelas la penon de mia spirito al la regionoj ne malpermesitaj al mi.

A. : - Ĉiuj aferoj sin kuntenas. Konsenti pri unu eraro, tio estas falsi la tutan sciencon.

G., ridetante : - Kiam mi scios ĉiujn aferojn, mi konfesos tion, kion ci diras. En atendo, unu nescio plia aŭ malplia...

A. : - Ĉu do ci esperas iam scii ĉiujn aferojn?

G. : - Jes ja. En la ĉielo mi vidas Dion, kaj konsekvence la tutan veron, frontalfrunte. Tion oni promesis al mi.

-----

\* franca esprimo por signifi : la kredo de plej simpla homo, neniel intelekta. (N.d.l.tr.)

A. : - Supla kaj burleska italo...

G., ridante : - Judo insultanta al scienculoj kiel al Dio.

A. : - Ci atingos, ke mi ridetu, mi kiu konas kaj volas koni nur la kruelan ridon. Ha!ha!ha!

G. : - Tiu rido ne ŝajnas eliganta el homo.

A. : - Eble tial ke ĝi venas de pli profunde kaj pli fore ol ci volas kredi.

G. : - Ĉu do oni tiel ridis sur la Kalvario ?

A. : - Jes.

G., skuante la ŝultrojn : - La historio de la homoj ne interesas min.

A. : - Kaj tiu de cia Dio ?

G. : - Mi kredas tion, kio estas kredenda.

Koncerne la ceteron...

A. : - Tamen, mi ripetas al ci, ĉio sin kuntenas. La historio de la homo estas ĉapitro el la historio de la naturo.

G. : - Min pasiigas la anatomio de la homo.

Sed la gestoj, kiujn ĝi unu fojon faris, hazarde...

A. : - Ĉu ci kredas, ke la naturo faras siajn plurfoje ?

G. : - Certe ! Sama kaŭzo ĉiam produktas samajn efikojn en samaj cirkonstancoj.

A. : - Neniam la cirkonstancoj estas samaj.

G. : - Kion ci diras ?

A. : - Kiel la universala kaj disdirekta fuĝado de la aferoj rekondukas dufoje ekzakte saman kuntrafon de cirkonstancoj ?

G. : - Ci estas malsaĝulo, kiu volas absolute... Ekzistas kaŭzoj proksimume samaj, kaj ili produktas efikojn proksimume...

A. : - Proksimume, ci diras. Jen ni preskaŭ interakordas. Certaj efikoj estas similaj laŭ la mensoga malakreco de ciaj okuloj. Same kiel, laŭ la mensoga malakreco de cia menso, certaj kaŭzoj estas similaj.

G. : - Du glanoj aŭ du kverkoj ne intersimilas ĝis tia grado, ke ili estu en du punktoj de la spaco, unu sola glano aŭ unu sola kverko.

Tamen la glanoj estas pli frataj inter si ol kun kaŝtano, kaj la kverko pli parenca al kverko ol al kaŝtano. Kiam mi diras :

"Ĉiam kverko estas filo de glano", mi diras ion. Kaj ankaŭ kiam mi diras : "Sama kaŭzo ĉiam produktas samajn efikojn."

A. : - Ci diras nenion. Ĉar la dua kverko ne estas la unua, laŭ kiu rajto ci donas al ĝi la saman nomon ? Laŭ kiu rajto ci konkludas de unu al la alia ? Sed cia flirtanta koncepto pri simileco, mi cin defias fiksi aŭ difini ĝin. Ĉio, kio ne estas identa, estas diferenca.

G. : - Ho kruela ! ho senprudenta ! Ci estas tiu, kiu per unu sola pulvo frakasas la malamikon kaj sin mem. Se ci prenas la aferojn kun tia rigoro, jen mi estas kondamnita al silento, kaj ankaŭ ci.

A. : - Ne, ne mi. Mi parolas, kiel historiisto, pri aferoj, kiu okazas unu fojon. Nu, ĉiuj aferoj apartenas al tiu klaso. Tiel, historiisto, mi parolas pri ĉio ; sed ci, filozofo kaj scienculo, serĉisto de leĝoj, ne de faktoj, amanto de ĥimeraj similecoj kaj ne de realaj diferencoj, mi cin kondamnas al mensogo aŭ al silento.

G. : - Laŭ cia opinio, do, oni povus paroli nur pri individuaj aferoj ?

A. : - Sendube, ĉar aliaj ne ekzistas.

G. : - Kaj la lingvaĵo, por proksimiĝi al tio, kion ĝi esprimas, enhavu, mi supozas, nur individuajn vortojn...

A. : - Mi ne komprenas.

G. : - Kaj kiam ci estos elparolinta la nomon de Galileo Galilei, ci havos nenion plu por diri pri li, eĉ ne ke li estas homo.

A. : - Ci troigas mian penson.

G. : - Krom se ci volus rezervi por mi la nomon homo. Ĉar ci saĝe rimarkis, ke mi diferencas de ĉiuj, al kiu la vulgarularo konsentas tiun nomon.

A. : - Ci iras tro malproksimen, ĉar...

G. : - Ĝis nun mi tro indulgeme batalis kontraŭ tiel barbaran malamikon. Mi puŝos cin ĝis silento, ĝis nenieco. Mi rifuzas al ci la rajton doni al mi nomon. Se ĝi signis la hieraŭan Galilejon herezan, kiel ĝi signus la hodiaŭan Galilejon ortodoksan kaj subiĝintan ? Se ĝi konvenas al la Galilejo, kiu antaŭ momento elspiris aeron, ĝi jam ne konvenas al la Galilejo, kiu nun enspiras ĝin. Ĉu ĝi nomas tiun, kiu estis sidanta, aŭ tiun, kiun ciaj atakoj incitis kaj metis staranta sur siaj piedoj ? Ĉu ci aplikas ĝin al tiu, kiun premegeas la ombro de karcero, aŭ al tiu, kiu kuris tra kampoj, ĝoja kaj envolvita de sunlumo ? Ci ne povus atribui ĝin samtempe al la dormanto kaj al la vekiginto, al tiu, kiu diras vorton, al tiu, kiu diras alian vorton, kaj al tiu, kiu aŭskultas cin paroli.

A. : - Sed mi ja tenas...

G. : - Se ci volas diri nur la diferencojn, mi malpermesas, ke ci diru eĉ la diferencojn. Mi malpermesas, ke ci pensu ilin.

A. : - Mi mokaĝ pri ciaj malpermesoj.

G. : - Ne ja. Ĉar ci mem cin paralizis. Ci tranĉis ciajn membrojn ĉe ĉiuj artikoj. Kiel ci povus ankoraŭ moviĝi ?

A. : - Mi ne komprenas.

G. : - Ĉu la ideo pri diferenco ne estas ideo ĝenerala ? Aŭ ĉu ĉiuj diferencoj estus por ciaj okuloj unu nura diferenco ?

A. : - Mi diras, ke...

G. : - Eĉ la diferencoj intersimilas per io, se ni rajtas nomi nomon al ili. Forigi la ĝeneralon kaj la similon en tia grado, kiel ci faras, estas forigi eĉ la diferencon. Ci detruas la spiriton kaj la parolon.

A. : - Iru ĝis la fino de cia penso, kaj diru, ke mi detruas ankaŭ la aferojn.

G. : - La aferojn ? Jes, ci detruas ilin en ci. Ili ne atendis cian naskiĝon por naskiĝi ekstere, kaj la morto de cia penso nek mortigas

nek movas ilian liberan realecon.

A. : - Tamen...

G. : - Sed tiu diferenco mem, pri kiu ci mal-singarde parolis, kien ci metas ĝin, se ne inter du aferojn, kiuj ekzistas individue ?

Tiuj aferoj, en kiuj ci neas ĉian rilaton, jen ci metas en ilin iun rilaton. Cia neado jesas.

A. : - Mi pretendas, ho subtila...

G. : - Se inter la aferoj estas nenio komuna, ci eĉ ne rajtas kalkuli ĝis du... Ha! ci volas detrui la sciencan. Ci ja povas - en ci, kompreneble - kondiĉe, ke ci detruu en ci ĉian penson.

A. : - En mi kaj en ci. Mi ne postulas pli, ha! ha! ha!

G. : - Silentu do, kaj foriru. Aŭ prefere, restu, kie ci estas. Nun kiam por ci jam ne estas diferenco nek similo, kie ci trovas motivojn por fari unu geston prefere ol alian ? Senmoviĝu en la morto de cia penso, ĝis la alia morto...

A. : - Instinkto kondukas, pli certe ol spirito, en la bezonojn de la vivo.

G. : - La granda bezono de mia vivo, ĝi estas serĉado kaj pensado.

A. : - Do, al ci endas morti en nekontentigo.

G. : - Nu do! La scienculo, serĉisto de relativo, sin kontentigas je ĉiu observo, je ĉiu eta malkovro, je ĉiu proksimiĝo inter sia hodiaŭa vido kaj sia hieraŭa vido. Sed malkontenteco estas ido de la granda malsaĝo, nome la soifo pri absoluto kaj infinito.

A. : - Ĉu ci tiel parolus antaŭ teologoj ?

G. : - Kial ne ? Kompreneble, post kiam mi estus adorinta per pia formulo la misterojn, en kiuj absoluto estas por mi neatingebla, kaj la revelaciojn de mia Dio, kaj la sciplenajn klarigojn de tiuj, kiujn li komisiis por instrui min.

A. : - Absoluto ekzistas aŭ ne ekzistas.

G. : - Ĉu mi neis ĝian ekziston ? Mi diris, ke ci ne trovos ĝin.

- A. : - Ankaŭ mi tion diras, ĉar ĝi ne estas.
- G. : - Mensogulo, ci ĝin jesas pli ol mi.
- A. : - Kiel ?
- G. : - Ci pretendas scii, kie ĝi estas.
- A. : - Nenie mi ĝin vidas.
- G. : - Ci kredas vidi ĝin ĉie. Kaj ci proklamas ĝian nomon.
- A. : - Male, mi estus dankema, se ci ĝin instruus al mi.
- G. : - Ci nomas ĝin aparta afero aŭ individuo. Sed, samkiel teologo, por diri pri sia Dio, havas nur neajn vortojn, ci havas nur neadojn por diri pri cia absoluto. Kiam teologo asertas pri sia Dio iun pozitivan atributon, li avertas, ke la nomo, per kiu li signas tiun atributon, jam ne havas la signifon, kiun oni donas al ĝi parolante pri teraj aferoj. Ci estas devigata averti, ke la vortoj, per kiuj ci salutas cian absoluton, havas jam nenian sencion.
- A. : - Ci estas malfacile venkebla batalanto, Galileo Galilei, tuj kiam ci ne tremas plu pri cia korpo. Tamen, jen ci estas devigata konsenti, ke la scienco estas vera nur proksimume, t.e., entute, ke ĝi estas falsa. Ci ne povas plu diri : "Sama kaŭzo produktas saman efikon". Ci diras nur : "Kaŭzoj proksimume identaj produktas efikojn proksimume identajn".
- G. : - Tio sufiĉas al mia ambicio. Mi, homo, havas nur homajn postulojn.
- A. : - La leĝoj, kiujn ci formulas, estas nur proksimumaj.
- G. : - Sendube.
- A. : - Kaj ju pli ĝenerala estas leĝo, des pli ĝi foriĝas de la faktoj kaj de la vero.
- G. : - Se ci intencas diri, ke malpli granda estas la precizeco, kun kiu ĝi aplikiĝas al tiu aŭ tiu alia fakto hazarde elektita, ci pravas.
- A. : - Ĉu ci scias, al kio mi komparas tiun sciencon, pri kiu ci tiel fieras ?

G. : - Mi scios, kiam ci estos al mi dirinta.

A. : - Mi komparas ĝin al la balenciĝanta lampo, kiun ci longe kontemplis iam en cia juneco.

G. : - Per kio la scienco kaj la lampo...?

A. : - Aŭ pliaŭguste, mi komparas ĝin al ebrulo stumblanta laŭlonge de vojo kaj falonta jen en la dekstran, jen en la maldekstran flank-fosaĵon.

G. : - Kion ci intencas diri ?

A. : - Iafoje cia scienco enamiĝos je leĝoj tre ĝeneralaj, des pli malriĉaj, ju pli riĉaj ili deziros esti. Iliaj infanecaj brakoj kredos stringi senfinan nombron da faktoj ; sed tiuj faktoj forglitos, kaj la leĝoj, ŝanceliĝantaj knabinetoj, transportos neniaĵon.

G. : - Mi aŭdacas diri, ke...

A. : - Aliafoje, igite pli singardema de siaj vastaj malvenkoj, la scienco multobligos etajn apartajn leĝojn, tiel proksimajn al la faktoj, ke ili fariĝos preskaŭ tiel multaj kiel la faktoj. Eble ĉiu estos tre proksima al la realo, sed ĝi diros tiel malmulte, ke oni aŭskultos ĝin kun ne pli da intereso ol la babiladojn de maljunulino. Prudenta homo ridos pri la pretendemaj knabinetoj, sed li oscedos ĉe la lantaj rakontadoj de la povra oldulino, kaj li endormiĝos.

G. : - Tamen estas...

A. : - Tiel, hodiaŭ, ci adoras Dion unikan, kiu estas por ci nedirebla kaj nekonceptebla, kaj kiu, en la fundo de cia penso, malfacile distingiĝas disde nenio. Sed ciaj praavoj adoradis diojn tiel multajn, ke en ĉiu el ili restis tro malmulte da dieco.

G. : - In medio virtus\*.

A. : - Ĉu ci intencas diri, ke konvenas agnoski malgrandan nombron da dioj, dekduon por ekzemplo? La nombro dek du havas apartajn proprajojn.

-----  
\* En mezo (kuŝas) virto (N.d.l.tr.)



G. : - koncerne kredon, mi jam informis cin, mi kredas tion, kion instruas la Sankta Eklezio. Se ci volas koni miajn religiajn kredojn, ne al mi demandu, sed al niaj bon-egaj teologoj. Mi, se ci tion deziras, parolos pri la scienco kaj la legoj, kiujn ĝi serĉadas.

A. : - Konsente. Ni revenu al tiu, kiu ŝanceliĝas de dekstre al maldekstre, de maldekstre al dekstre. Sed la mezo de la vojo estas linio sen larĝo, sur kiu mi defias, ke ci metu cian tutan piedon.

G. : - Ci daŭre refaladas en cian manion pri absoluto. Eble pri tio kulpas la dezerto, en kiu malfruigis ĉiaj praavoj.

A. : - Jen ci estas malpia. Ĉu ne ankaŭ la dio unika, infinita, perfekta, absoluta de ĉia Eklezio estas filo de la unuformeco de tiu dezerto?...

G. : - Pri tio ne konsentus mia Eklezio. Do mi ne konsentas.

A. : - Mi diros al ci ion banalan kaj oftan, tamen strangan, kaj neniam de iu homo rimarkitan.

G. : - La okazoj plej banalaj estas la plej malfacile distingeblaj.

A. : - Ĉiuj objektoj en la universo dilatiĝas kaj kuntiriĝas.

G. : - Pri tio mi ne dubas.

A. : - Sed ĉiuj samtempe, samproporcie. Kaj tiuj proporcioj estas grandegaj, trans ĉio, kion ci povus konjekti. Kiam mi venis al ci, ci estis pli granda ol ulmo ; jen ci estas pli malgranda ol formiko.

G. : - Ĉi frezeziĝas.

A. : - Ĉar ĉio ŝanĝiĝas en sama ritmo, ci ne rimarkas tiun universalan ŝanĝigon. Ĉiaj mezuriloj grandiĝas kaj malgrandiĝas samtempe kiel ci kaj la aliaj mezureblaj objektoj.

G. : - Kion ci inventas, estas ingenia. Se vere, ci pravas, mi ne povus ĝin scii.

A. : - Estas vere, ha!ha!ha! Cia Dio aŭ la dioj de ciaj praavoj amuziĝas. Kompreneble : sen tio, ilia eterneco tro enuigus ilin.

G. : - Permesu, ke mi metu al ci demandon. Ĉu ŝanĝiĝas cia granda kiel ĉio cetera ?

(Ahasvero hezitas) Respondu.

A. : - Maliceta Galilejo !

G. : - Mi timas miavice cin mirigi. Ĝis nun la mirindaĵo, pri kiu ci diris, estis de mi preteratentita. Sed mi ĝin suspektis jam kelkajn momentojn. Mi estis ĝin dironta en la sama momento.

A. : - Ci mokas min.

G. : - Ne pli ol ci min... En la universala ŝanĝiĝo - ĉu efiko de maljuneco, vere troa por homo ? - ci restis sensanĝa. Tial mi vidis cin ŝanĝiĝi.

A. : - Sed...

G. : - De kiam la Sankta Inkvizicio instruis min pri rezonado, mi malŝatas la simplajn eksplikojn, kaj trovas pli facile konsenti pri la moviĝado de ĉiuj aferoj, krom unu nura, ol pri la moviĝado de tiu sola afero. Do mi vidis, ke ci restas sama, dum mi kaj la universo etigiĝis kaj grandigiĝis en burleska kapturino.

A. : - Ci mensogas. Kiel ci mi suferas la neflekseblan leĝon, kaj ci povis nenion konstati.

G. : - Nu do, burleskulo, kiel ci ion konstatis?

A. : - Mi, malamiko de absoluto en la penso kaj de rigoro en la parolo, eble parolis laŭ cia maniero. Ĉu mi diris hipotezon aŭ fakton, ci havas nenium rimedon por scii. Tiel cia scienco disfalas...

G. : - Mallertulo ! Ci renversas ĉion, escepte de la scienco.

A. : - Cia aŭdaco...

G. : - La scienco ignoras la aferojn kaj ilian esencon ; ĝi diras nur la rilatojn inter la aferoj. La modifo, kiun ci supozas universala, restas nekonstatebla, tial ke ĝi modifas nenium rilaton. Jen do ci estas trudita meti pli da

vero en la rilatojn ol en la aferojn mem, pli da reguleco en la sciencan ol en...

A. : - Ci donas al mi ĉion, kion mi postulas. La vortoj estas mensogaj pro sia pleneco, la aferoj pro sia malpleneco. La vortoj mensogas per sia stabileco ; la aferoj, kiuj mensogas per sia malkvieta moviĝado, ĉiam eskapas de ci kaj de cia hundaro da vortoj. Neniam la vortoj diros ion realan. Ĉu ci volas, ke mi diru al ci, mi, la realon ?

G. : - Per kio ci dirus ion ajn, se ci malpermesas al ci la vortojn ?

A. : - La aferoj estas nur ŝajnoj kaŭzitaj de la movado.

G. : - De la movado de kio ? Aŭ ĉu ci konceptas movadon, kiu estus la movado de nenio ?

A. : - Tiu ŝtono, kiun ci kredas vidi senmova, solida kaj kvietaj, estas febro el movadoj. Ĝiaj atomoj sin interkrucadas, interserĉadas, interfugadas. Cia vido pri tiu ŝtono ? Ha!ha!ha! kapturita, pri si mem nekonscia.

G. : - Ci diras : "Tiu ŝtono ne estas, ĉar ĝi reduktiĝas al movado de atomoj". Ja tion ci diras ?

A. : - Ja tion.

G. : - Mi, mi diras : "Tiu ŝtono estas, ĉar ĝi konsistas el moviĝantaj atomoj."

A. : - Mia okulo disigas la atomon, kiel ĝi disigas la ŝtonon. Atomo, ankaŭ, estas nur turniĝado.

G. : - Do ci konsistigas ĝin el turniĝantaj objektoj.

A. : - Ĉu do cia spirito ne povas, kiel mia okulo, analizi, dividi ?

G. : - La spirito sin lasas treni ĝis infinita dividado. La spirito ne scipovas halti. Sed la aĵo postulas, ke oni haltu. Necesas nedivideblo por konsistigi divideblon. Ke tiu nedivideblo estas malgrandega tiagrade, ke ĝi estas nekapt- ebla por nia okulo kaj eĉ por nia imago...

A. : - Do la aĵoj kaj la spirito estas neakord-

igeblaj malamikoj...

G. : - ... tiel longe, kiel la spirito nescias, ke, ĉar ĝia nobleco estas koni la aferojn, ĝi devas submetiĝi al la aferoj kaj preferi iliajn necesojn al la siaj.

A. : - Diru al mi, kio estas la aferoj.

G. : - La spirito devas ankaŭ scii siajn limojn. Neniam ĝi penetros la veran kaj propran esencon de la naturaj substancoj.

A. : - Do ĝi konas nur vualojn kaj ŝajnojn.

G. : - Sendube.

A. : - Nu do, kiel ci aŭdacas aserti, ke ekzistas aferoj, kaj ne nur ŝajnoj ?

G. : - Necesas io por subteni vualon. Necesas realo, por ke ekzistu ŝajnoj.

A. : - Malsaĝulo ! Ĉu ci neniam songis en cia dormo ? Al kiu realo respondis la fantomoj aperintaj en ciaj songoj ?

G. : - Ekzistas songoj, tial ke maldormo antaŭis dormon ; la songo ludas per la solaj materioj, per kiuj ĝin provizis la maldormo. Denaska blindulo songas, ke li aŭdas bruojn, ke li flaras parfumojn, ke li gustumas nutraĵojn, ke li sekvas liniojn per sia mano ; lia dormo ne vidas kolorojn... Neniam utiligu aperojn kontraŭ realon : ili estas ĝiaj idoj ; ilia rondodanco ĉirkaŭas ilian patrinon, kaj, kaŝante ŝian esencon, evidentigas ŝian ekziston.

A. : - Mi ne disputos plu per rezonoj kun ci, tro subtila italo. Simple, naive, mi instruos ciajn sentumojn. Donu cian manon.

(Galilejo malfideme donas sian manon.)

Ahasvero metas ĝin sur sian bruston, maldekstre. Galilejo haste ĝin retiras.)

A. : - Kial cia mano fuĝas de mia korpo ? Ci tremas kiel antaŭ fantomo. Ha! ha! ha! eble mi estas fantomo.

G. : - Ci estas glacie malvarma. Kiel fantomo estus frosta aŭ varma ?

A., brutale ekkaptante Galilejon : - Aŭdacu diri, ke la ĉeesto de fantomo ne frostigus cin.

Aùdacu diri, ke la malvarmo, kiun ci sentis, venas de mia korpo kaj ne de cia spirito, de mia karno kaj ne de cia timo.

(Galilejo, per granda kuraĝa ekpeno, ree metas sian manon al la brusto de Ahasvero).

G. : - Glacio ne. Pli ĝuste bronzo. Strange ! nenio batas. Ŝajnas, ke ne estas koro.

A. : - Ne estas. Ekspliku, kiel mi vivas.

G. : - Ci estas tro urĝema. Mi konstatas fakton. Se mi ne eksplikos ĝin hodiaù, eble aliaj ĝin eksplikos morgaù, aù post jarcento...

A. : - Aù neniam.

G. : - Aù neniam... Ĉu ci estis ĉiam tia ?

A. : - Ne.

G. : - De kiam ?

A. : - De antaù mil sescent jaroj.

G. : - Kion diri ? Kion kredi ? Kion sentas mia mano, ĉu, antaù ol mi ĝin konstatis, estus al mi ŝajninta malpli absurda ol la paroloj de ĉi homo ?

A. : - Ci estas trudata konfesi, ke mi diras veron.

G. : - Ne. Mi ne miksas la fakton, kiu ekzistas kaj cian klarigon pri la fakto.

A. : - Nu, donu cian klarigon.

G. : - Mi ne havas.

A. : - Ci konfesas cian nescion, cian nepovon.

G. : - Mi konfesas, senkonfuze kaj senemociè. Multaj estas la aferoj, pri kiuj mi scias, ke mi ilin nescias. Scipovi nescii, estas la duono de la scienco.

A., malfermante la pordon : - Mi malŝatas cian sciencon. Ĝi donas al ci kelkajn mezvalorajn veraĵojn, sed ĝi senigas cin je aliaj veraĵoj. La kredantoj konos la aferojn, kiujn ci konas, kiam ili estos dicitaj de pluraj post ci ; ili scias, jam hodiaù, aferojn, kiujn ci ĉiam nescios. Eble cia metodo pliriĉigas la homojn ; certe ĝi cin malriĉigas.

(Li eliras kaj fermas la pordon post si, ne lasante al Galilejo la tempon por respondi).

G., levante la ŝultrojn kaj lasante sin, el-  
ĉerpita, refali sur sian liton :

- Tiu viro trouzas la vorton vero kiel teologo  
aŭ aristotelano. Kaj sub la nomoj riĉaĵoj kaj  
diamantoj, li ofertas al mi ĉiujn ridindajn  
rulŝtonojn de la marbordo.

\* \* \*

Sepa apero

Ahasvero aperas al Kantio

aù

LA DIALOGO PRI LA KRITIKO

\*\*\*\*\*

En ĉambro kun malnovaj simplaj mebloj, antaù tablo kovrita de bone ordigitaj paperoj, sidas maljunulo. Li legas libron versaĵne malfacilan. La faltoj de la frunto krispiĝas pro la peno. Trifoje la okuloj pristudis la samajn liniojn, kaj tamen la kapo balanciĝas ; kaj tamen la faltoj pli kaj pli profundigas. La bona intenco kaj la nekompreno de la oldulo, ĉu spektanto trovas ilin tragikaj aù komikaj ? Tragikaj ĝis larmoj, komikaj ĝis disŝira rido : tiu, kiu vane provadas kompreni, estas nomita Emanuelo Kantio, kaj la libro, kiun li vane provadas kompreni, estas titolita "Kritiko pri la pura racio".

La filozofo metas siajn kubutojn sur la tablon, ambaùflanke de la libro malfermita antaù liaj okuloj, fermita kiel virgino antaù lia maljuneco. Liaj makzeloj estas premitaj inter liaj pugnoj. Liaj rigardoj nun direktigas foren, al kiu malpreciza regiono ?... Jen. Lantaj kaj pezaj, du larmoj ruliĝas laùlonge de liaj vangoj, rulfalas sur la presitan paperon. Kaj, inter tiuj larmoj, kiujn li ignoras, rideto pli malgaja ol ĉiuj larmoj krispiĝas lian buŝon.

KANTIO, per sia fama kapvoĉo : - Mia granda espero - strange kaj aĵiktege! - estas kredi, ke mi estas finita, simila al mortinto, aù,

almenaŭ, refalinta en infanecon. Ĉar, se al mi restas ia inteligento, tio do signifas, ke por ĉiuj mia verko estas nekomprenbla. Tio pravas, ke ĉi-ene (li pugne frapas sur la libron) estas nur vortoj... vortoj... flatus vocis\*.

Miaj amikoj asertas, ke ili komprenas. Foje-foje, mi kredas ilin ; mi ebriiĝas, kiel per la plej ĝojiga el la vinoj, per la opinio, ke mi fariĝis stulta. Aliajn tagojn, mi sentas, en la vino de ilia parolo, la feĉon de kompato ; kaj mi sekrete elvomas parolon, vinon, ĝojon kaj ebrion. Kio mi tiam estas ? Maljunulo, kiu sentas sur sin disfali sian tutan vivon, ĉiujn gestojn de sia vivo... La justulo de Horacio restas neemociebla sub la disfalo de la mondo, kiu lin frapas. Iam mi sentis min ankoraŭ pli brava. Pereat mundus, fiat justitia\*\*. Por justu aŭ vero, mi estus mem neniiginta la mondon. He! Ĉu mi ne kredis neniigi ĉin, mondo de la dogmema mensogado ? Poste, sur la fundamento de justu kaj praktika racio, mi volis konstrui universon de vero. Ho ve ! mi sentas disfali sur min, en mi, kaj miajn konstruaĵojn, kaj min mem... Jen mi envias iun ajn, kiu eldiras parolon komprenblan, eĉ se falsan ; iun ajn, kiu efektivigis geston efikan, eĉ se kriman. Mi estas iu, kiu faris nenion, nek bonon nek malbonon ; kiu diris nenion, nek veron nek mensogon. Mi ne estas vivinta. Mi ŝveligis sapvezikojn, kiuj senpure krevis inter la ridoj de la vento. Aŭ pliĝuste, ĉu mi eliris el la nenieco ? (Li eksplodas per rido dolora, preskaŭ freneza). Kredeble estas vortoj en la nenio. Eĉ, la nenion mi imagas kiel antaŭtrabaĵon kaj disfalon de vortoj. Sensignifaj vortoj, nenio povus plibone simboli vakuon, kiu ekzistus. Sed ĉu ekzistas alia nenio ol tiu de vortoj por nenion diri ? Ĉu ekzistas alia nenio ol tio ĉi ?...

\* vento de parolo(j) (aŭ de vortoj)(N.d.l.tr.)

\*\* Pereu la mondo, fariĝu justu (N.d.l.tr.)



(Lia absorba penso malhelpis, ke Kantio aŭdu la pardonon de la ĉambro apertigi kaj refermigi. Mano estas metata sur lian ŝultron. Li returnigas. Senkonscia movo. Ekster lia malespero, verŝajne nenio povas interesi lin... La flirtanta rigardo jam ne scias, kion kontakto jam droninta en nekonscio ordonis serĉi, kaj probable ĝi nenion vidas. Baldaŭ la filozofo, malsupren trenite de venka pezo, refalas sur sian libron. Sed la mano denove sin metas sur lin. Ĉi-foje, ĝi skuas lin. Ankaŭ vortoj, eble pli efike, lin taŭzas).

**AHASVERO**, per basa voĉo : - Ahasvero, kiu jam dek ok jarcentojn sukcesas nek vivi nek morti, salutas Emanuelon Kantion, kiu, tra tuta ordinara vivo, sukcesis nek ion diri nek silenti.

**KANTIO** : - Ci konfesas, ci ; ci ne provas trompi min kiel tiuj, kiuj min amas per mi-nescias-kia insulta kompatato. Ĉu ne ? en tiu libro estas nenio... nenio komprenebla de iu ajn ?...

A. : - Nenio.

K. : - Ha!

(Li ekprenas la paĝojn per ambaŭ manoj, ilin disŝironte).

A., haltigante lin : - Ĉu ci povas detrui ĉiujn librojn ?

K. : - Kion ci diras ?

A. : - Ne estas plimulto komprenebla en la aliaj. Eĉ ne en tiuj, kiujn la malsaga pieco de la popolo nomas, en hebrea, araba aŭ greka lingvo, "La Libro".

K. : - Ci provas deŝiri la armilon, kiun ci enprofundigis en mian koron. Sed cia malfrua kompat-indulgo, ho! kiom pli kruela ĝi estas ol cia sincero. Ĉu ci kredas detrui malesperon, ĝin plilarĝigante ? Ĉu ci kredas konsoli Emanuelon Kantion, se ci afliktegas en li la tutan homaron ?

A. : - Sena je kompatemo kiel je krueleco, indiferenta por konsoli aŭ afliktegi, mi diras, senzorge pri konsekvencoj, la veron.

K., post longa penetranta rigardo :

- Ci mensogas. Ci estas malica.

A. : - Nek bona nek malica. La gestoj, per kiuj la homoj meritas tiujn kvalifikaĵojn, estas akv-eroj en la riverigo de l'tempo. Mi, mi estas ekster la riverigo. Rigardu ekziliton el la tempo.

K. : - Do ci kredas, ke la aliaj homoj estas en la tempo ?

A. : - Sendube.

K. : - Ci eraras. Ja la tempo estas en ni.

A., levante la ŝultrojn : - Dume, metu do ankaŭ la tutan spacon en nin.

K. : - Jes, ankaŭ la spaco. (Silentmomento, dum kiu liaj okuloj kaj lia frunto luminiĝas per inteligento kaj ĝojo). Ha! mi retrovas en mi, helan kiel bela tago, la doktrinon de mi verk-itan. Ĉu ci scias, ke mi malkovris la plej grandan veron, kaj plej fekundan ? (Li leviĝas, starigite de entuziasma risorto). Galilejo de-lokigis nur unu movadon. Antaŭ li oni vidis la sunon turniĝadi. De post li, malgraŭ la komplika mensogo de la okuloj kaj de la Eklezioj, ni vi-das la teron turniĝi. Admirinda ŝanĝo, milion-oble pli mirinda ol la renverso aŭ la fondo de imperio. Amasigu unu sur alian mil Aleksandrojn kaj mil Cezarojn ; sed la giganto, kiun ci tiel formas, gardu cin, ke ci ne apudmetu lin al Galilejo : ci vidus, ke ci konstruis ridindan nanon. Remeti la ĉielon kaj la teron en iliajn proprajn lokojn, restarigi ilian eternan ekvili-bron, jen estas, ĝis mia alveno, la plej granda el la herooĵoj. La poetoj igis la ĉielon kelkajn horojn subtenata de ilia Herkulo. Tiu Galilejo, kiu eble ŝajnas mortinta por ilia povra imago-povo, ĝin ĉiam subtenados.

A., malŝatete : - Siatepe, mi metis al cia Galilejo kelkajn kontraŭdirojn, kiujn li ne kapablis solvi.

K., ne aŭdinte : - Sed la verko de Galilejo, ha! kiel malgrava ĝi manifestiĝas apud la verko, kiun mi sukcesis... Mi estas for de ĉia orgojlo.

Mi estas povra maljunulo kaj mizera ruino. Post unu horo, kredeble, mi refariĝos nekapabla kompreni tion, kion skribis mia forto. Jen mi estas preskaŭ blinda : miaj iamaj veroj, blindigaj pro troa lumo, fermas miajn malfortigitajn palpebrojn en abrupta kaj tremeta tenebrobano. Cia kontraŭdiro redonis al mi unu horon da inteligento. Kontraŭ cin mi tuj defendos, mi tuj savos ne la librojn de Emanuelo Kantio, sed la heredan posedaĵon de la homaro. Galilejo transportis la movadon de la ĉielo al la tero, anstataŭigis la vertigon per harmonio. Mi forigis pli malbonan kaj pli vastan vertigon ; mi reguligis pli homecan harmonion. Mi kaptis la tempon kaj la spacon, mi fleksis tiujn senlimajn formojn, kaj mi reenigis ilin en la homon, ilian kreinton ĝis mi nekonscian, ĝis mi sklavon de siaj filoj. Ho! mi ja scias, mia

"Kritiko" estas nur antaŭparolo de la filozofio. Sed mi malfermis la pordon. Post mi, oni eniros.

A. : - La pordo estas preskaŭ ĉiam fermita por cia nuna spirito.

K. : - Kiel grave, ĉar mia verko estas farita ?

A. : - Nu cia nuna spirito estas supera al preskaŭ ĉiuj spiritoj en la pleno de ilia forto. Malmultaj cin komprenos.

K. : - Malmultaj estas la homoj. Ili sin sekvas je longaj jarcentoj da intertempo. Tuj kiam estas unu aŭdanto, li plilongigas la frazon eldiritan antaŭ li. Kiam Sokrato diris : "Konu cin mem", ĉu ne min li alvokis el la fundo de la tempoj ? Necesis ne multe pli ol dumil jaroj, por ke mi alvenu. Eble necesos malpli, por ke tiu, kiun mi alvokas, venu konstrui la metafizikon, kies nedetruiblajn antaŭnociojn mi starigis. Mi estas trankvila : mia voko, kiel la voko de Sokrato, estas el tiuj, kiujn ne haltigas la montoj, kaj kiujn ne sufokas la vanta tumulto de la maroj aŭ de la generacioj.

A., kun akra rido : - Tiel, la tempo estas en ci.

K. : - Ĝi estas unu el miaj formoj.

A. : - En ci do ĉio, kion enhavas la tempo. En ci la homoj hieraŭaj, hodiaŭaj kaj morgaŭaj, la animaloj, la vegetaĵoj, la ŝtonoj, kaj la maroj, kaj la ĉielo, kaj ĉio estinta, ĉio estanta, ĉio estonta.

K. : - En mi la tempo, kaj ĉio estanta en la tempo. Sed ĉu ci estas certa, ke la tempo enhavas ĉion, kion ci diras, en la senco, en kiu ci ĝin diras ?

A. : - Kio pli evidenta ?

K. : - La tempo enhavas nenion en si. Ĝi enhavas nur mian sensan konon pri la aferoj. Ĝi estas unu formo de mia senskapablo, nenio pli.

A. : - Se ci ne estas en la tempo, kiel ci ŝanĝigas ?

K. : - Mi ne estus la unua konkerinto transformita de sia konkeriĝo.

A., malŝate : - Se ci kredas esti al mi respondinta...

K. : - Mi ne kredas esti al ci respondinta. Kaj mi ne kredas, ke mi devas respondi al ci. Filozofo respondas nur al si mem.

A. : - Facila metodo !

K. : - Malpli ol ci kredas. La demandoj, kiujn metas al si filozofo, estas multe pli novaj kaj malfacilaj ol tiuj, kiujn metas al li la homoj. Mi solvis iujn, pri kiuj neniu pensis. Sed mi neniam zorgas pri la frivolaj kontraŭdiroj.

A. : - Ci deklaras frivola ĉiun kontraŭdiron, kiu cin embarasas.

K. : - Mi deklaras frivola ĉion, kio estas malamika anstataŭ esti sincera. Mi deklaras frivola la kontraŭdiron adresatan al homo por lin turmenti, ne al doktrinó por ĝin provi. Mi klare vidas, ke ci venis malamike. Ĉia kontraŭemo levis, en la senmova maro de mia maljuneco, ondon el juneco, inteligento kaj forto. Tiu ondo portas min al vero, ne al la ridinda batalo, por kiu ci instigas min. Veron oni neniam trovis duope. Foriru.

A. : - Tamen oni diras, ke el kontraŭdiro ŝprucas lumo.

K. : - Jesuo pardonis al siaj torturantoj, ĉar ili ne sciis, kion ili faras. Mi pardonas al la disputantoj : la disputo estas ebrio, kiu malhelpas ilin scii, kion ili diras.

A. : - Sincere, sen incitemo, mi cin petas solvi por mi jenan demandon, se ci povas : La tempo, kiu estas en ci, kiel ĝi cin maljunigas kaj malfortigas ?

K. : - Mi povus respondi : En mi estas multaj aferoj, kiuj efikas sur min.

A. : - Ci ja povus antaŭ aŭskultantoj. En skermolukto oni povas retropaŝi anstataŭ bat-eviti. En duopa diskuto ci ne povas. Aŭ estas ci, kiu fariĝas la malamiko kaj la diranto de frivolaj vortoj.

K. : - Ci estas prava... Por paroli al ci kiel amiko, kaj kiel oni parolas al si mem, mi havas du aferojn por respondi. Unue, la fenomeno Kantio maljunigas, ne la noumeno Kantio. Poste ... (Sed liaj okuloj enebuliĝas, liaj trajtoj kuntiriĝas, lia mano sin almetas al lia frunto) Denove tiu doloro ! Indiferenta kiel doloro. Sed ĝia skuado ĉiam forfuĝigas mian penson... Atendu... Kion mi diris ? Ha! jes, mi retrovas. La noumeno kaj la fenomeno, kaj la formoj, kaj la tempo kaj la spaco... Ĉu ci komprenas?... En mi, la formoj, kaj tamen mi en la formoj, laŭ tio, ĉu ci rigardas min kiel... aŭ kiel... (Lia mano baraktas sur lia frunto) Nu ! La fadenvolvajo implikiĝas. Kaj miaj maljunaj tremantaj fingroj rompas la fadenojn, provante ilin malimpliki. Restas nur nodoj kaj nombroj.. (Li sin lasas refali en sian fotelon) Mi ne povas plu ion diri al ci... Mi ne povas plu ion diri al mi... Mi jam ne komprenas... Foriru: mi ne volas plori antaŭ ci.

A. : - Kial ? Mi ja dezirus, mi, plori... Mi restas. Ne povante sensoifigi min per miaj larmoj, mi soifas pri alies larmoj... Ploru, ploru do.

K. : - Ne antaŭ ci.

A. : - Ploru. Ci skribis nur malplenajn vortojn. Sur cia kampo staras ambicia pajlo, kiun pezigas neniu grajno.

K. : - Antaŭ momento, mia mano pesis la spikojn. Ĝi trovis ilin plenaj kaj malmolaj.

A. : - Ci kiu ne komprenas cin mem, kiel la aliaj cin komprenus ?

K. : - Antaŭ momento mi komprenis min.

A. : - Iluzio... Ci malbone memoras... Ploru, ploru do.

K. : - Neniam mi ploris antaŭ iu ajn. Se ci volas, ke mi ploru, foriru.

(Ahasvero ne moviĝas. Kantio frapas sur martelsonorilon.)

A. : - Mi foriras. Mi cin lasas, ho ci plej malplena kaj plej nekomprenebla el la skolastikuloj. Kaj mi ridas, ha! ha! ha! pro la penso, ke ci tuj ploros.

\* \* \*

Oka apero

Ahasvero aperas al Niĉeo

aŭ

LA DIALOGO PRI LA SUPERHOMO

\*\*\*\*\*

Ahasvero marŝas en alta valo. Ĉu li vidas tion, kio lin ĉirkaŭas : montsuproj elstarantaj kiel maltimaj ribeloj, glaciriveroj, kiuj estas rebrilegoj de lumo, herbejoj, kiuj etendas lagojn de kvieto ? Senatente li tra-iras rivereton, kiu, pli malsupre, plilarĝiĝos kaj ŝvelos al riverego. Li antaŭeniras inter du lagoj kun smeraldaj freŝaĵoj. Maldekstre estas vilaĝo. Li sin deturnas de ĝi, kaj, apud la pli malgranda el ambaŭ lagoj, penetras en arboriĉan duoninsulon. Li iras rekte, senhezite. Li havas precizan celon, kaj malŝate malatentas ĉion, kio ne estas tiu celo.

Nun li haltas kaj rigardas. En la arbaro viro marŝas sola. La paŝoj de tiu viro malurĝiĝas en la potencaj lantecoj de la penso; aŭ, iam, en la konsumantaj maŝoj de mistera malsano, ili hezitas kaj embarasiĝas. Jen abrupta vekigo ilin puŝas ; bataleme ĝojaj, ili vigliĝas, kaj forportas lin kiel klarionritmo.

Ahasvero aliras al la viro kun granda gesto respekta, eble ironia.

AHASVERO : - Mi cin salutas, lirika pensulo, dancisto meze de fanfaroj, profeto de la Granda Reveno... superhomo.

NICĈEO, ridetante : - Mi estas feliĉa renkonti, en la glacia dezerto de ĝojo, homon, kiu, kiel mi, staras sesmil futojn super la marnivelo, kaj eĉ pli alte super ĉiuj homaj aferoj.

A. : - Parolu al mi, ĉi kiu scias vortojn tro grandajn por la faŭkoj de malsupre. Versu en miajn orelojn la fanfaron, pri kiu mi soifas.

N. : - Pri kio mi parolos, ho filo mia ? Ĉu mi diros mian unuan vekigon ? Mia menso, pacienca kaj vigla, estis kamelo, kies vigleco postulas pezan ŝargon, la plej pezan ŝargon. Poste ĝi hastis al dezerto, al sia dezerto.

A. : - Ĉi jam ne estas tiu, kiu postulas ŝargon kaj hastas al sia dezerto. Preterlasu do tiun unuan metamorfozon de la spirito ; ne diru al mi, kiel la spirito fariĝas kamelo.

N. : - Mi diros la duan metamorfozon de la spirito, kiel la kamelo fariĝas leono. Tiam ĝi volas konkuri sian liberon kaj konkuri sian propran dezerton. Ĝi vidas, kio reale estis ĝia ŝargo, drako penetriganta en ĝiajn flankojn kruelajn ungegojn. Ĝi volas lukti kun la granda drako, kiun de tiam ĝi rifuzas saluti dio aŭ mastro.

A. : - Kion ĉi nomas la granda drako ?

N. : - "Ĉi devas" estas nomata la granda drako. Sed la spirito de la leono blekegas : "Mi volas".

A. : - Kion ĝi volas ?

N. : - Kio estus volo, se ĝi ne kreus sian propran objekton, se ĝi ne kreus novajn valorojn ? Tion ankoraŭ ne povas la leono. Sed igi sin libera por nova kreado, tion povas ja la forto de la leono. Liberigi, kontraŭmeti al devo diecan neadon, tia estas, ho mia filo, la tasko, kiu postulas la vigan kuragon de la leono.

A. : - Ĉu ĝi sin liberigas mortigante la drakon ?

N. : - Guste ĉi diris. La leono "Mi volas" mortigas la drakon "Ĉi devas", kaj ekstermas la oferadon.

A. : - Ĉu tiam la spirito plenumis tutan sian taskon ?



N. : - Ne. Al ĝi restas farenda la verko plej danĝera kaj plej ĝoja.

A. : - Diru la verkon plej danĝeran kaj plej ĝojan.

N. : - Necesas, ke la rabema leono fariĝu infano.

A. : - Kial tiu tria metamorfozo ? Kion povas fari la infano, kion ne povis la leono ?

N. : - La infano estas senkulpo kaj forgeso, renoviĝo kaj ludo, rado ĉirkaŭ sia propra akso ruliĝanta, unua movo, sankta aserto.

A. : - Parolu, majstro. Eldiru la sanktan aserton.

N. : - La sankta aserto necesa al la dia kreo-ludo, jen estas ĝi, ho mia filo : la spirito volas nun sian propran volon ; tiu, kiu perdis la mondon, volas gajni sian propran mondon.

A. : - Parolu ankaŭ, majstro, pri la libereco de la aferoj kaj pri la plej antikva nobeleco de l'mondo.

N. : - "Hazarde" estas la plej antikva nobeleco de l'mondo. Sed la homoj estis forgesintaj ĝin kaj ĝian nomon. Ili estis katenintaj la aferojn en la legoj de la naturo, kiel oni katenas sklavojn en la prizonoj de la civito. Kaj ili igis ĉi tiujn sklave labori. Kaj, por regi la civiton de la aferoj, ili kreis dion kaj eternan volon.

A. : - Tiam ci venis, ho heroo.

N. : - Tiam mi venis, ho filo mia. Liberigante la aferojn el la servuteco de la celo kaj el la servuteco de la lego, mi relevis la plej antikvan nobelecon de l'mondo.

A. : - Vortoj kantantaj kaj dancantaj ĉirkaŭ la superhomo estus al mia koro eĉ pli ebbriigaj. Diru la superhomon, ho superhomo.

N. : - La superhomo, ho mia filo, estas la senco de la tero. Cia volo diru : "La superhomo estu la senco de la tero !"

A. : - La superhomo estu la senco de la tero !

N. : - Kion mi povas ami en la homo, tio estas, ke li estas trapaso kaj kadukiĝo. Li estu la sago de deziro al alia bordo. Li oferu sin al

la tero, por ke iam la tero apartenu al la superhomo.

A. : - Aliaj proklamis : "Dio ne estas, sed li igas ; li estas filo de la homo kaj de nia penado." Ĉu per novaj vortoj ci diras samon ? aŭ ĉu per najbaraj vortoj ci diras novan aferon ?

N. : - La plej novan el la novaj, ho filo mia. Dio estas konjekto ; sed mi volas, ke cia konjekto ne iru pli transen ol cia krea volo. Ĉu ci scipovus krei dion ? Do ne parolu plu al mi pri ĉiuj dioj. Sed ci povus krei la superhomon.

A. : - Kaj la superhomo povos krei Dion.

N. : - Homo senorela, insulta faŭko, ne parolu plu pri la pasinteco antaŭ la heroldo de estonteco. Ĉu do ci ne aŭdis la grandan novaĵon : Dio estas mortinta ? Ĉu ci ne flaris la grandan fetoron, per kiu la kadavro de Dio plenigas la mondon ?

A. : - Parolu al mi pri la granda reveno, profeto de la granda reveno.

N. : - Ĉu neniam ci aprobis ĝojon ? Ĉu ci diris al ĝi : "Restu" ? Sed la ĝojo ne povis resti. Ĝi foriris. Kaj ci, kun la brakoj al ĝi etenditaj, ci kriis al ĝi : "Revenu !" . Ĝoju, ho mia filo, ĉar ĝi cin aŭdis, kaj de tiam ĝi penadas por reveni. Tiel faras la ĝojoj de ĉiuj vivantoj. Ilia penado tordas la tempon, tordas la eternecon, fermas la ringon de la ringoj. Kiam ci aprobis ĝojon, ci aprobis la mondon, ci aprobis ĉiujn dolorojn. La aferoj estas katenitaj, interplektitaj, amantaj. Ĉiu ĝojo, postulate sian eternecon kaj sian revenon, postulas la eternecon kaj la revenon de ĉiuj aferoj. La doloroj volus, per rektlinia fuĝo, rompi la ringon el oro kaj fero. Sed la doloroj estas malfortuloj, dum la forto de la ĝojoj estas granda. Se do ci lasis malantaŭ ci eĉ unu nuran aferon, kiun ci deziras retrovi, rigardu antaŭen. Per ciaz bedaŭroj faru ciazjn esperojn.

A. : - Kia belega revo, ho revulo.

N. : - Mi ne diras revon ; mi diras la veron. Ĉu ci ne aŭdas ĝin unueca kaj multobla ? Tra la tuta monto de vivo, tiu potenca orkestro vekas mil ĉojn kiuj ripetigas, plidaŭras, ripetigas ankoraŭ... Rigardu la nunan momenton, ho mia filo, kaj diru kiun formon ci vidas en ĝi.

A. : - Por la malforteco de miaj okuloj la momento estas Proteo. Fugo senvizaga, rikano en mil grimacoj, al kio mi komparos ĝin ? Ĉu ĝi ne estas akvero pulvoriganta, vaporiganta en la falado de la tempo, en la falado de la kaskado, kiu la tempo estas ?

N. : - Ci parolas malbone. Aŭskultu min kaj aŭdu min, por ke de nun ci donu al la momento ĝian nomon plej belan kaj plej veran. Aŭdu min, kaj en la lumo de cia spirito la momento starigos la harmonion de portiko.

A. : - Kial mi nomus la momenton : Portiko ?

N. : - De tiu portiko de l'momento, longa, eterna vojo retroiras. Malantaŭ ni estas eterno.

A. : - Sendube.

N. : - Ĉu ĉio, kio scias kuri, ne devas esti laŭirinta tiun vojon ? Ĉu ĉio, kio povas okazi, ne devas esti jam okazinta, plenumita, pasinta ?

A. : - Eterno, kiu ne enhavus ĉiujn aferojn, ne estus eterno.

N. : - Se ĉio, kio estas, estas jam estinta, kion ci opinias pri tiu ĉi momento ? Ĉu la portiko, kiun formas la arboj kaj la ĉielo kaj la momento, ĉu ne ankaŭ ĝi devas esti estinta ?

A. : - Al mi ŝajnas vere.

N. : - Kaj tiu lantmova araneo, kiu rampas en ombro, sunlumo kaj vento, kaj tiu ombro, tiu suno kaj tiu vento mem, kaj mi kaj ci kunigintaj por flustri eternajn aferojn, sub tiu portiko tremanta de folioj kaj de ĉerneco, ĉu ne necesas, ke ni jam estis tie ĉi ?

A. : - Certe.

N. : - Sub la sama vento el timo kaj espero, ni murmuris la samajn vortojn. Kaj tio estis

la sama tago kiel hodiaŭ. Kaj la pasinta tago, pri kiu ni parolis, estis identa al la tago, en kiu ni parolis.

A. : - Mi amas la larĝflugilan potencon de cia flugado.

N. : - Tiel neniu fojo, kiam ni ĉi tie interrenkontis, estis la unua.

A. : - Tamen estas ja necese, ke...

N. : - Se ci estas plongisto timanta la abismon, fugu for de Zaratuŝtro. Ĉar Zaratuŝtro uzas la eternecon, sin jetegante kun siaj kunuloj al la fundo de la senfunda abismo.

A. : - Mi ne konas timon. Parolu do, ho profeto.

N. : - Kiomfoje, en tiu ĉi sama loko, mi dancigis antaŭ ci tiujn parolojn, ebrio por la fortaj, kapturino por la feblaj ! Kiomfoje, ĉirkaŭ ci, ili, je mia ordono, reprenos sian strofan movadon ! Ĉiam ci aŭskultis ilin, ĉiam ci aŭskultis ilin unue kiel vortojn de revo. Sed mi scias la sorĉojn, kiuj ekzorcas kaj disigas la unuan stuporon. Ĉiam mi sukcesis, ĉiam mi sukcesos fari el ci amanton de la nupta ringo de 1' ringoj, la ringo de farigado kaj reveno. Ĉiam fine ci kantis, ĉiam fine ci kantos kun mi la epitalamon, kiu diras : "Ankoraŭ unu fojon !", la ĝojan epitalamon, kiu krias trans ĉiuj mondoj : "Mi cin amas kaj cin edzinigas, ho Eterno".

A. : - Ni do gaje marŝu al la superhomo. Ĉar ĉiuj superhomoj estos grandaj kaj egalaj, kaj jam ne estos homoj por servi al ili kiel sklavoj.

N. : - Mizerulo ! ci prenas miajn vortojn por diri la pensojn kaj la dezirojn de la popolo... Kaj ci nomas superhomo tiun, kiun mi nomas "la lasta homo".

A. : - Lasu min diri...

N. : - Neutile. Silentu. Ĉu mi ne aŭdas cin en ĉiuj pasintaj eternoj ? Ĉu mi ne aŭdas cin, ho ve ! en ĉiuj estontecoj ? En tiu ĉi sama loko, dum, malantaŭ tiuj samaj arboj, tiu sama suno sonĝis kiel luno, kiomfoje mi dispelis cian blindan eraremon. Memoru. Mi diris al ci la

necesecon de nova ordo kaj de nova sklaveco. Por ĉiu plifortigo, por ĉiu plialtigo de la homa tipo, necesas, ho filo mia, nova speco de servutigo... Egalaj rajtoj ! libera socio ! nek mastroj nek servistoj ! tio ne logas nin. Ni ne trovas dezirinde, ke la regno de justo kaj konkordo starigu sur la tero. Necesos meti inter la homojn ĉiam pli da milito kaj maldigalo... Ĉu ci memoras, ke mi diris al ci tiujn aferojn ?

A. : - Mia memoro estas tro malforta, ho superhomo. Sed ci, ĉu ci memoras pri mia respondo unueca kaj multobla ?

N. : - Ci respondis : "En cia parolo de milito kaj potenco, mia koro amas la plej ebriigan el la fanfaroj."

A. : - Se cia memoro estas fidela, do miaj paroloj ŝanĝigas de unu al alia eterno.

N. : - Neeble !

A. : - Ĉar hodiaŭ mi diras al ci : "Vojaĝinte de antaŭ dek ok jarcentoj, mi renkontis frenezulojn multajn kaj diversajn, sed tiel frenezan kiel ci, neniam."

N., post longa rigardo fiksa kaj penetra :  
- Fetera judo, mizera predikanto de egalo, deflankigu de mia vojo. Kiu postulas egalon kaj juston, tiun mi malŝatas kaj forĵetas, ne nur tial ke li estas eta homo, sed ankaŭ tial ke, en sia eta spirito, li volas nur sin venĝi kontraŭ la potenculoj. Iru for de mi, tarantulo ! Ĉie, kie ci mordas, formigas nigra krustogito estas la veneno de cia venĝo, kiu putrigas la animon.

A. : - Baldaŭ mi foriros, ne por obei al ci, sed pro malŝato kaj naŭzo. Mi forkuros de ci, amaso da rubaĵoj, en kiu ĉiuj maljunaj vipuroj kredas sibli novan arion. Neniam iu ruino estis egale disfalanta kiel cia penso.

N. : - Mia penso, tro alta por ci, havigas al ci kapturnon, kaj cian propran disfalon ci nomas mia ruino.

En atendo je la superhomo, mi estas la supro de la homa penso.

A. : - Ci estas la plej terura inter la amasoj da kontraŭdiroj, kiuj obstrukcas la filozofian pejzaĝon.

N. : - Mi, kiu mortigis la drakon "Ci devas"!...

A. : - Sed kiu ĝin revivigis, kiam ci diris : "La homo estas io, kio devas esti superita".

N. : - Mi, kiu renversis la altaron de la ofero !...

A. : - Kaj kiu ĝin rekonstruis, kiam ci diris : "Oferu cin al la tero, por ke iam la tero apartenu al la superhomo."

N. : - Mi, kiu restarigis "Hazarde", la plej antikvan nobelecon de l'mondo, liberigante la aferojn el la servuteco de la celo !...

A. : - Ci ligis ilin pli dure ol iu ajn alia tirano, kiam ci forĝis la ringon de la ringoj. Ci ligis ilin ne unu fojon, sed senfinan nombron da fojoj. Se ci rompis unu katenon, ci ne sciopovus numeri la katenojn, per kiuj ci ilin anstataŭigis.

N. : - Mi, kiu indikis la gloran vojon al la superhomo !...

A. : - Kaj la vojon de honto al la subhomo. Ĉar hieraŭ revenos, ĉar hieraŭ estas ankoraŭ morgaŭ, ĉar la milfoje transpasita vojo restas ĉiam reirenda.

N. : - Mi, kiu proklamas la grandan novaĵon pri la morto de Dio !...

A. : - Kaj de lia reviviĝo. Ĉar kio estis, tio estos.

N., metante manon al sia frunto : - Jen estas unu el tiuj teruraj momentoj, en kiuj mi ne scias plu, kio tie okazas. Mi jam ne scias, kie mi estas. Mi jam ne scias, kiu mi estas. (Li sin lasas fali sur la bordo de la vojo.)

A. : - Eble la eterno turniĝas kiel planedo ĉirkaŭ suno. Sed, de post la peko, la ringo ne estas plu cirklo. Cirklo havas centron, kiun oni vidas egale de ĉiuj punktoj de la cirkonferenco.

De ĉiuj punktoj oni vidas, ĉu la centro estas plena, aŭ ĉu ĝi estas malplena, ĉu estas Dio kaj suno, aŭ ĉu estas nenio.

N. : - Kion li diras ? kiu li estas ? kaj kiu mi estas ?

A. : - De post la peko, la kurboj, en kiuj la tempo estas enfermita, ne estas plu cirkloj, sed elipsoj. La granda jaro estas elipso simila al tio, kion la vulgareto nomas jaro. Ĉe unu el la fokusoj brilas la suno kaj Dio. La alia fokuso estas nigra kaj frida kiel la nenio. Sed tiu Eterno, kiun ci vidas ĉe ĝia afelio, ĉu ĝi ne estos trudata resupreniri al sia perihelio ?

N. : - Kia estas tiu fanfaro, kiu ne estas mia fanfaro ? Ĝi faras sub mia kranio bruon, kiu malhelpas, ke mi min aŭdu. Mi serĉas, kolizante al ĉiuj miaj son-anguloj, kaj mi eĉ ne plu sukcesas aŭdi mian nomon, la plej gloran el ĉiuj nomoj.

A. : - Aŭskultu, kaj ĝoju, se ci restas kapabla je racio kaj je homa ĝojo. La elipso, kiu iam estis cirklo, iam refariĝos cirklo.

N. : - Kiu estas tiu frenezulo, kiu frenezigas min ?

A. : - La cirklo primitiva kaj perfekta estis misformita per la peko de senprudentuloj similaj al ci. Antaŭ ilia krimo, la jaro ne konis la ekscesajn malvarmojn kaj la bruligajn varmojn ; la vivo ne konis la suferon, la penon kaj la morton.

N., relevigante : - Ĉu ĝi estas la superhomo, kiu ci prikantas per paroloj diferencaj de miaj paroloj ?

A. : - En la pasinteco kaj en la estonteco, mi prikantas la justan homon... La sola maljusteco de la homo malaranĝis la universon kaj kreis la malegalan kruelon de la aferoj.

N. : - La vivanto estas volo pri potenco, ne volo pri justo.

A. : - Justo estas la sola potenco harmonia, ne dividiĝanta kontraŭ si mem. Ĝia egaleco

estas sena je ĉia senfortiĝo. Iam la homoj komprenos. Ili refariĝos justaj, kaj la pacigo de la homa frenezo kvietigos la frenezon de la kosmaj movoj. La homo estas reĝo, kiu per sia demenco logis la mondojn, siajn regatojn, al ribelo kontraŭ li. Lia saĝeco remetos ĉion en ordon. Tiam la jaro estos cirklo ĉirkaŭ la suno ; ĉirkaŭ ni ĝi estos printempo neniam velkanta. Mastrite kaj reguligite, la Eterno rulados sian harmonion. Jam ne la elipso, la absurda kurado, kiu fuĝas de tio, kion ĝi serĉis, kiu serĉas tion, de kio ĝi fuĝis. Sed la rado feliĉa ĉirkaŭ centro de paco kaj akso de lumo.

N. : - Ho judo, persistema tarantulo, ĉu ci imagas, ke mi lasos cin meti nigran kruston sur la superhomon, kaj, en mian militdancon, frenezon de justo kaj vengemo ? Ha ! Ĉu ne prefere mi metos en cian frenezon mortige ĝojan dancon ?...

(Li sin ĵetas sur Ahasveron, premas lian kolon inter siaj demencaj kaj murdivolaj manoj)

A., senmove, en ekklakega rido : - Ha! ha! ha!

N. : - Kio estas tiu frido ? Kio estas tiu meta-la duro, ĉe kiu mi kontuzas min ? Kia estas tiu rido ? Kiu ridas pri mi, laŭlonge de la ringo de la ringoj ? De kiu, mi ?... Ci kiu ridas, diru al mi mian nomon.

A. : - Ci havas plurajn nomojn. Ci estas nomata Tiraneco kaj Senpotenco, Demenco kaj Maljusto.

(Li foriras).

N., lin postkurante : - Ŝtelisto, mi ne volas, ke ci forportu de mi mian nomon. Ĉu mi donis ĝin kiel garantiaĵon al ci, judo procentegisto ? Shylock, prenu mian karnon, sed lasu al mi mian nomon, redonu al mi mian nomon.

A. : - Tiu viro, kiu estis freneza kiel lirika reĝo, jen li estas vulgara frenezulo, taŭga por estifordonota al kuracistoj.

N., alkroĉiĝante al Ahasvero : - Mi certigas, ke ci redonos al mi mian nomon... Ĉu ci imagas, ke mi lasos cin foriri kun tiu glora rabaĵo ? Tiel longe, kiel ci ne redonos ĝin, mi ne ellasos



cin.

A., lin renversante per brutala ekŝancelo :  
- Ruliĝu en polvo. Ĝi estas cia loko, super-  
homo fuŝita pro manko de justeco.

(Li foriras per rapida marŝo).

N. : Mian nomon, mian nomon !... Sub la nigra  
krusto, kiun kreskigis la tarantulo, neniam,  
neniam plu mi povos legi mian nomon.

(Li ploras kiel infano).

\* \* \*

Naŭa apero  
 Ahasvero aperas al Neo-Stoikus

aŭ

LA DIALOGO PRI LA JUSTO

\*\*\*\*\*

Ĉambro malriĉa sed vasta. Plafono kun vid-  
 eblaj fostoj. Muroj kalke blankfarbitaj. Kelkaj  
 bretoj portas malnovajn librojn. Granda tablo  
 estas kovrita de paperoj. En malfermita alkovo,  
 fera lito kun tukoj senzorge flankenĵetitaj.  
 En angulo, vestokesto. Ŝuoj senorde kuŝas. Krom  
 la paperoj kaj la libroj, ĉio estas dismetita  
 en malordo, kiu signas indiferenton. La loĝanto  
 de tiu loko, Neo-Stoikus, rigardadas nemulte  
 pli ol en si mem. La eksteraj detaloj, se li  
 malprecize vidas ilin, restas senpovaj por kon-  
 fuzi lian trankvilecon aŭ lian meditadon.

Li marŝas malrapide tra la ĉambro. Lia mal-  
 dekstra mano ludas per lia barbo, kun la montra  
 fingro vaganta inter la grizaj haroj. Lia deks-  
 tra mano tenas folion de papero.

NEO-STOIKUS, legante : - "Justo serĉas perfek-  
 tan, ripozan ekvilibron, la malon de la vivo.  
 Amo serĉas la plenan, satan kunfandiĝon, ankaŭ  
 ĝin malan de la vivo. Historie, justo kaj amo,  
 revoj pri eksterhoma paco, estis teruraj krein-  
 toj de milito. Sed la saĝo, sola efika pacigan-  
 to..."

(Li ĵetas la paperon sur la tablon, iras  
 kubutapogi sin al fenestro, malkontente skuas  
 la kapon). Ne, tio ne ĝustas. Mi diras pli ol  
 mi volas, kaj kun tia dogma brutaleco... Mia  
 frazo neripareble disigas tion, kio devas unu-

iĝi super la nebulo. Kun naiveco, se al la necesoj de la marŝo mi oferus la belecon mem, al kiu strebas mia penado. Ĉu la saĝo, sola laŭirebla vojo, ne kondukas al la justo vivanta kaj al la vivanta amo, kies mortokaŭzajn karikaturojn mi antaŭ momento mallaŭdis? Amo kaj justo malsupraj: marĉoj kaj enŝlimigoj. Sed vi, ŝajne sekegaj vojetoj de saĝo, vi kondukas al du fontoj alte puraj, kaj ili havas la samajn nomojn kiel la marĉoj konataj de la popoloj.

Ho miaj okuloj, estu la singardemaj skoltoj, kiuj anoncas, - por ilin venki, aŭ de ili sin deturni - la sinsekvajn malfacilaĵojn de la vojo. Estu ankaŭ la trinkantoj de nobla ebrio, kiuj, por doni al mi la forton necesan al marŝado, penetrigas en min la lumon kaj la malproksiman promeson de la supro.

(Neo-Stoikus sin turnas por reiri al sia tasko. Li havas geston de stuporo. Tie staras nekonato, klinita super la tablo, kun plumo en la mano).

NEO-STOIKUS: - Kiu ci estas? kaj kion ci faras?

LA NEKONATO: - Mi korektas la erarojn, kiujn, kredeble, konfesis cia monologo.

(Li prezentas la paperon).

NEO-STOIKUS, legante: - "Saĝo, vojo de morto, ci kondukas al sindeteno. Al la avidaj konkerantoj ci liveras senarmigitan mondon. Amo, ci kulpas la saman malkuraĝon, kaj ci priploras la malbonojn, de kiuj cia cedemo faras cin komplico. Solaj, la justo kaj la egalredono..." (Fikse rigardante sian neantaŭviditan kunlaboranton) - Ci, ci estas judo.

LA NEKONATO, kun jesa gesto: - Fidela al mia raso kaj al la penso de mia raso. Tiu penso, ĉu ci scias, ke ĝi estas la Mesio, aŭ, se paroli lingvon, kiun instruis al ni la diasporo, la Vorto?...

NEO-STOIKUS: - Mi malkonfesas ĉiun Mesion aŭ

Vorton, kiu sin armas per glavo. Cia penso kaŭzis miriadojn da militoj kaj revolucioj. Ĝi estas ĉiam sanga kaj senfrukta.

LA NEKONATO : - Diru al mi cian penson, cian, ha! ha! ha! la penson de cia raso.

NEO-STOIKUS : - Kiu ne jam elvindicis sin el sia raso, tiu ankoraŭ ne marŝas al penso.

LA NEKONATO : - Ĉu la penso de fremda raso estas vesto pli harmonia al cia formo kaj pli favora al cia progreso ? Kial ci pensas greke, ci kiu ne estas greko ? Kial ci renovigas antikvan doktrinon, ci homo de la XXa jarcento ?

NEO-STOIKUS : - Ankaŭ egalredono ne apartenas al frua juneco. Ke mi-ne-scias-kiu harmonio flirtanta inter cinikismo kaj stoikismo fariĝis mia marŝokanto, estas tial, ke mia racio kaj mia koro ĝin aprobas.

LA NEKONATO : - Ĉu cia racio aŭ cia koro forĵetas la redonon ?

NEO-STOIKUS : - Brutala reflekso, mordo de mordita hundo, la redono estas egale malinda je la racio kaj je la koro de la homo.

LA NEKONATO : - Kio estas malinda je la koro de la homo, tio estas pardono, malkuraĝo kaj indiferento ; kio estas malinda je la racio de la homo, tio estas pardono, konsento pri la malordo kaj malfrua komplikeco, kiu daŭrigas la krimon.

NEO-STOIKUS : - Ĉu la redono restarigas la aferojn en ilia unua ordo ?

LA NEKONATO : - Ĝi restarigas la ekvilibron.

NEO-STOIKUS : - Farante maldekstre la saman malbonon, kiu estas farita dekstre... Tiel longe, kiel murdi la murdinton ne redonos la vivon al la viktimo...

LA NEKONATO : - Ĉu do saĝo kaj amo revivigas la mortintojn ?...

NEO-STOIKUS : - Almenaŭ ili ne mortigas la vivantojn... La redono duobligas la malordon, kiun ĝi intencas ripari kaj renovigas la konfuzon, kiun ĝi fanfaronas pacigi. Anstataŭ milde relevi renversitan ĉaron, tiu brutalo ĵetas ĝin sur la

flankon kaj ĝin frakasas.

LA NEKONATO : - Mi diras al ci...

NEO-STOIKUS : - Mi havas nenium rimedon por aboli ekstere la malbonon de iu faritan. Sed mi detruas ĝiajn plej malbonajn konsekvencojn: mi rifuzas ĝin daŭrigi, mi kvietigas la Ŝancelon, kiun, sen mia klopodo, ĝi kaŭzus al mia animo, kaj mi haltigas la geston, kiun ĝi diktas al mi. Por tio, kio dependas de mi, mi abolas ĝin kiel kaŭzon, mi forpelas ĝin el la serio de agoj kaj reagoj, mi diligentas por irigi la serenajn aferojn, kvazaŭ tiu Ŝancelo ne estus okazinta.

LA NEKONATO : - Ĉu ci restas same neŝancelebla, kiam la maljusto frapas cin mem ?

NEO-STOIKUS : - Tiam mia venko estas kompleta. Kiu volas fari malbonon al mi, tiu kaŭzas profundan malutilon nur al si mem, se nur mi rifuzas simili al li. Li sola rezignis sian racion, ĉesas esti homo. Mi eskapas de la kontaĝo. Mi ne malsupreniĝas al la besta nivelo, sur kiu estas farata la lukto, al kiu min invitas lia frenezo kaj la komplika stulteco de la redono.. (Ridetante). Sed, ĉu mi povas, malgraŭ la strangeco de nia renkonto, ekscii, al kiu mi havas la honoron paroli ?

LA NEKONATO : - Al la Vaganta Judo.

NEO-STOIKUS : - Mi estas ravita, ke mi ekkonas vin persone... Cetere mi konfesas, ke, nomante aŭ ne nomante vin, pli ol unu fojon mi atakis vin en miaj paroloj aŭ en miaj skriboj. Almenaŭ tiel ofte, kiel vian malamikon Jesuon... Li estas pli bela ol vi, kaj, dum via dureco vundas min, lia mildeco rave emocias min. Tamen okazas, ke mi forsendas vin ambaŭ dorso ĉe dorso, tial ke viaj principoj, jen inter si malamikaj, jen kunligitaj, kaŭzis al la homoj proksimume saman kvanton da malbono.

AHASVERO : - Senprudentulo, mi pretendas...

NEO-STOIKUS : - Metu vin nek en koleron nek en sindefendon. Ne rigardu min kiel agresanton. Mi nenion faros por persvadi vin. Mi ne atribuas

naive al vortoj el mi povon, kiun vi rifuzas al tiom da jarcentoj el spertado. Cetere, mi konas vin incitebla, kaj mi kredas vin, tuj kiam vi rilatas al nekredanto, artifikema en la disputludoj kiel en la komercludoj. Se vi bonvolas, ni preparolu aliajn aferojn, kaj, anstataŭ kontraŭmeti pensojn, kiuj sin reciproke vundus, instruu min pri kelkaj faktoj... Sed unue, ekskuzu mian preterlason, kaj prenu la penon sidigi vin.

A. : - La peno estus tro granda.

N.-S. : - Ĉu vi dezirus, ke mi iru preni por vi ian nutraĵon aŭ ian refreŝigaĵon ?

A. : - Nek unu nek alian.

N.-S. : - Laŭ via bontrovo... Sed permesu, ke mi mem sidigu min (Li sidigas). Nun, se vi bonvolos rakonti al mi kelkajn incidentojn el via longa vivo, mi ricevos de tio ekstremam plezuron.

A. : - Mi preferas disputi.

N.-S. : - Sed mi ne. Kaj por disputo kiel por geedziĝo, necesas esti almenaŭ po du.

A. : - Se mi detruos cian doktrinon, ĉi ja provos relevi la ruinon.

N.-S. : - Ĉi eraras. Mi ridos pri mia fragila pasinteco, kaj mi serĉos pli firman ŝirmaĵon.

A. : - La mia estas nedetruibla.

N.-S. : - Ĉia povra vermoborita tegmento lasas trafali sangoplumon, kiu naŭzas min.

A. : - Anstataŭ defendi pozicion, kiun ĉi sentas netenebla, ĉi ĉin preparas por ataki mian.

N.-S. : - Lasu, ke mi ridu... Mi ĉiam ridas pri tiuj vortoj, kiujn iu ajn el ambaŭ kontraŭuloj povas adresi al la alia... Kiom da argumentoj ŝajnas, al tiu, kiu ilin ĵetas, plenaj kaj incendiantaj, kaj al senpartiaj okuloj sin manifestas malplenaj kaj ridindaj sapvezikoj !

A. : - Da ili nerefuteblaj mi havas rezervon.

N.-S. : - Alvoku la gvardion, se tio ĉin amuzas. Sed mi antaŭvidas, ke ĉi atakos, kiel ofte okazas, karikaturo de mia penso, ne mian penson

mem. Ci jetos ciajn pafaĵojn kontraŭ mian omb-  
bron, ne kontraŭ min mem. Por kompreni alian  
homon necesas multe da simpatio. En la lando  
de la penso malamikeco blindigas, kaj oni ne-  
niam scias, kie troviĝas tiu, kiun oni ne amas.

A. : - Ci igas ĉian diskuton nebla.

N.-S. : - Se ci verdiras, mi faras multon por  
la vero.

A. : - Malon mi asertas. El la interbato de  
ideoj sprucas lumo.

N.-S. : - Mia povra Ahasvero, ĉu penvaloras  
vivi mil naŭcent jarojn por resti banala kiel  
proverbo?... Ĉia diskuto estas sterila, kaj  
neniam oni naskontigis infanon sur batalkampo.

A. : - Penso, kiu ne estas provata en diskuto...

N.-S.: - ... Povas esti malpli kruda kaj pli vera  
ol tiu, kiu triumfas... Cetere la venko dependas  
de la batalantoj pli ol de la motivoj, kiuj in-  
terbatigas ilin.

A. : - Ci konfesas cian mankon je kuraĝo.

N.-S. : - Mi ne havas la kuraĝon de brutaleco  
kaj de trompemo.

A. : - La spiritaj bataloj...

N.-S. : - ...similas al la aliaj. En ili la ven-  
ko akiriĝas per la dogma perforto, kiu asertas  
kun aŭtoritato kaj decidemo tion, pri kio en  
profundo oni ankoraŭ dubas, aŭ ĉiam dubos. Ĝi  
gajniĝas ankaŭ per la ruzo, kiu altiras la mal-  
amikon en subitan embuskon, mi intencas diri en  
la ŝajnan kontraŭdiron, en kiu la penso estas  
premegata inter du hurlantaj bandoj da vortoj.

A. : - Tamen...

N.-S. : - Por voli demonstri, ekster la aparten-  
aĵo de matematiko, necesas manko je inteligento  
aŭ je honesto.

A. : - Bone... Mi obeos al ci kaj eble al mi.

Aŭdu - ili cin instruos pli ol rekta refuto -  
kelkajn el miaj aferoj al homoj. Mi precipe  
diros al ci la parolojn, kiujn mi interŝanĝis  
kun certaj filozofoj malpli timemaj ol ci.

(Ahasvero rakontas siajn renkontojn kun

Lazaro, kun Seneko, kun Mark-Aùrelìo, kun la Jakvoj, kun La Boesio, kun Galileo, kun Kantio, kun Niùeo, proksimume tiel, kiel oni povis legi pri ili ÷i-supre. Li komencis grandnombre aliajn rakontojn. Sed, kiam li vidis la atenton de sia aùskultanto malakriçi, preskaù ÷iam li forlasis la rakonton nesufiçe pasiigan, kaj sin jetis en alian. Li ekvolis diri renkonton kun Karlo, la imperiestro kun florblanka barbo. Tiam)

NEO-STOIKUS, longe oscedante : - Ho! tiuj suverenroj kaj militistoj, enuigaj kiel komercistoj aù rabistoj, tute mergitaj en la eksteraj tenebroj... Tiu ÷i e÷ ne egalvaloras kiel Mark-Aùrelìo... Ni preterpasu, mi petas.

A. : - Çu ci preferas, ke mi diru mian interdikton kun Inocento IIIa ?

N.-S. : - Per kio papo diferencas de imperiestro?

A. : - Li estas devigata al pli subtilaj mensogoj.

N.-S. : - Ne pli interesaj mi trovas ilin.

A. : - Çu al ci pli plaçus, ke mi prezentu al ci kelkajn malpli altrangajn pastrojn ?

N.-S., kun laceca gesto : - Neniun pastron ! Neniun advokaton de doktrino obeeme akceptita.

A. : - Certaj apologiistoj estas tre inçeniaj en la inventado de argumentoj kaj komparoj.

N.-S. : - Mi havas religieman animon. Ne vundu çin ÷e dogmaj interbataloj. Çiuj tiuj naivaçoj, kiuj difinas la infiniton...

A. : - Ne çagreniçu. Mi çerpos el mia memoro loton da ÷inaj kaj hindaj filozofoj.

N.-S. : - Mi estas tiel malbone edukita por ilin kompreni !...

A. : - Sed tiuj grekaj doktrinoj, per kiuj ci cin ravas, estas hindaj travestiitaj. Ciaj cinikistoj aù ciaj stoikistoj estas gimnosofistoj, al kiuj mankas maltimo.

(Çi-foje Ahasvero obstinis. Li prezentis longajn argumentadojn kontraù riùioj kaj kontraù joganoj. Neo-Stoikus malprecize aùdis en duondormo. Li nenion konservis en memoro).

N.-S., oscedante : - Çu en dormon mi sentas min



- gliti, aŭ en nirvanon ?...
- A., bruske skuante Neo-Stoikus'on : - Ĉu ci scias, kiu mi estas ?
- N.-S., abrupte vekita kaj ridetanta malgraŭ sia surprizo : - Se ci ne tro mensogis al mi, mi ja scias.
- A. : - Kion ci nomas vero ?... Ĉu la haŭton de frukto al ci proponata, aŭ ĝian pulpon, aŭ ĝian kernon ? Aŭ ĉu la tutan frukton ci nomas vero ?
- N.-S. : - La tutan frukton, kiam ĝi ne estas tro dika kaj tro peza por la tremanta malgrandeco de mia mano.
- A. : - Ĉu ci kredas pri la realeco de tio, kion ci vidas ?
- N.-S. : - Mi, filozofo nezorgema pri difinoj, ne scias precize, kion ci, aŭ eĉ mi, nomas realeco.
- A. : - Eble ci prenas min por fantomo eliginta el ci ?
- N.-S. : - Eble.
- A. : - Do aŭskultu min kiel ci cin mem aŭskultus.
- N.-S. : - Mi bonvole cin aŭskultas kiel parton de mi mem. Tamen mi restas singarda kontraŭ la peco invadema kaj detruema, kiu volus vori la ceteron kaj fariĝi la tuto.
- A. : - Ĉu ci studis la psikologion de tentado?
- N.-S. : - Mi ekstudis multe da problemoj. Mi solvis malmulte el ili.
- A. : - Ĉu ci konsentas al la tentanto objektivan ekziston, kiel vi nun diras ?
- N.-S., ridetante : - Iafoje, kiam la tentanto estas viro... aŭ virino. Sed, se li ne trovas komplikon en mi...
- A. : - Ne kredu, ke mi eldiras malĝustatempajn parolojn, kaj ĉesu respondi al mi kun tiu malŝata senzorgeco. Ĉu eliginta el ci aŭ ne, mi ekstaras kiel la tentanto. Mi estas la bona tento.
- N.-S. : - Preskaŭ ĉiuj samon asertas.

A. : - Ĉar ci estas senpova por efektiviĝi la juston, ĉar ci retroiras antaŭ la viglaj brav-  
aĵoj, kiuj havigas al la ekzistado guston de  
lukto kaj venko, mi alportas al ci la unikan  
solvon por ci honoran.

N.-S. : - Parolu.

A. : - Ci ne divenas tion, kion mi diros ?

N.-S. : - Ne.

A. : - Ci propravole fermas la okulojn... Sole,  
la morto...

N.-S. : - Kiam mi opinios, ke mi atingis la su-  
pron de mia vivo kaj elvolvis la tutan moralan  
perfektecon, kies ĝermo estas mia animo, ci far-  
igos potenca tento.

A., levante la ŝultrojn : - Ci do imagas, ke ĉiu  
tago cin pliperfektigas ?

N.-S. : - Al tiu celo, almenaŭ, mi aplikas mian  
diligenton.

A. : - Ci atingas nur pli kaj pli grandan difekt-  
igon.

N.-S. : - Mi ne aŭskultas pli la insultojn de  
malamikoj ol la nevolajn flatojn de amiko.

A. : - Kion ci faras en ĉi mondo ?

N.-S. : - Mi penadas pensi honeste. Mi laboradas  
por koni kaj realigi min.

A. : - Ĉu ci kredas tion ebla en la nuna socio ?

N.-S. : - Mi kredas ĉian socion kontraŭa al sen-  
dependa penso kaj al filozofia vivo. Ja ne miaj  
samtempuloj verŝis cikuton al Sokrato aŭ ekbrul-  
igis la ŝtiparon de Ĝjordanano Bruno.

A. : - La ekzekutoj varias laŭ la epokoj. Hodiaŭ  
heroo estas kondamnata al morto pro malsato. Me-  
moru pri Villiers de l'Isle Adam, memoru pri...

N.-S. : - Mi parolas libere, kaj al mi neniam  
mankis pano. Interŝange je laboroj penigaj kaj  
iom ridindaj...

A. : - Ci estas malpli filozofo ol tiuj, kiujn  
oni mortigas.

N.-S. : - Ja eble.

A. : - Sokrato rimarkigadis la stultaĵojn kaj  
la maljustaĵojn.

N.-S. : - Mi samon faras laŭ la mezuro de miaj rimedoj.

A. : - Se ci aplikus en tio sufiĉan kaj dange-  
ran viglecon, jam longe ci estus mortigita.

N.-S. : - Sokrato estis jam longe transpasinta  
mian aĝon, kiam oni findecidis pri li.

A. : - La tagon, kiam Sokrato komprenis sian  
senpovecon, estas li, kiu volis morti.

N.-S. : - Ci diras ?...

A. : - Anitos, Melitos kaj Likono akuzis  
Sokraton, sed ili estis por li malfortaj kon-  
traŭuloj, kaj li estis ema sin defendi kun  
efika modereco. Li volis turni kontraŭ siajn  
akuzantojn la subtilan kaj teruran armilon de  
sia ironio. Li marŝis ridetante, ĉar en li  
jam skiziĝis la supla kaj armita diskurso, kiu  
faros, kun lia propra savo, la honton de liaj  
malamikoj... Tiam li renkontis la sklavon de  
Menono.

N.-S. : - La sklavon de Menono ?...

A. : - Tiun, kiu antaŭe, subtile akuŝigita de  
la filo de Fenareta, naskis geometriajn de-  
monstrojn kaj konstruis kvadraton duoblan de  
donita kvadrato.

N.-S. : - Mi memoras.

A. : - Tiu sklavo diris al li, kun riproĉa  
tono : "Ho Sokrato, ci vekis mian menson, ci  
malfermis miajn okulojn, kaj nun ili sin tur-  
nas al regiono, kiun ci nekonas. La kurĉevaloj  
de la ĉaro, kiu antaŭ nia naskiĝo min forpor-  
tis en la sekvo de l'dioj, ne estis, al mi  
ŝajnas, malpli malavaraj ol tiuj, kiujn ci  
gvidis. Mia animo estas pli obeema al la lumo  
ol la animo de Menono, kaj en ĝi la veroj sin  
malkovras pli abundaj kaj brilegaj. Kial do  
tiu homo estas mia mastro, kaj kial mi estas  
lia sklavo ?... Ci ne ordonos al mi, kiel  
pastro, min submeti senekzamene al la volo de  
la dioj. Ĉar ci parolas kontraŭ ĉian memvolan  
blindigon, kaj la dioj, pri kiuj ci kredas,  
sendube ŝajnas al ci tiel justaj kiel ci mem."

N.-S. : - Kion respondis Sokrato ?

A. : - Sokrato amis demandi, ne respondi. Kaj, zorgante pri la proceso, en kiu li estis sin defendonta antaŭ la juĝistoj, li konsentis al sia kunparolanto nur nesufiĉan atenton. Li faris malprecizan konsentan rideton. Sed la sklavo, tirante lin per lia mantelo : "Ho Sokrato, kiel ci povis defendi Atenon per armiloj ? Kiel ci povis defendi tiujn skribitajn leĝojn, kiuj, male al la justa volo de la neskribitaj leĝoj, kreas mastrojn el naturaj subuloj, kaj trude sklavigas naturajn superulojn ?"

N.-S. : - Ĉu Sokrato denove respondis per senzorga rideto ?

A. : - Sokrato pledis : "Neniam mi mortigis aŭ vundis iun. Ke, en la aĝo de mia forteco, mi marŝis al batalo, tio estis por savi Alcibiadon kaj kelkajn aliajn." Sed la sklavo reekparolis : "Ho plej saĝa inter la liberaj homoj, ci nekonas la aspekton de la landoj, en kiuj ci ne vojaĝis, kaj ci nescias la verojn instruatajn de la servuteco. Do aŭskultu mian parolon, kaj lasu, ke miavice mi akuŝigu cian spiriton. Laŭ kiu rajto ci kredas cin justa, se ci ne kontraŭbatalas ĉiujn maljustojn ? Laŭ kiu rajto ci kredas cin justa, tiel longe kiel cia silento kaj cia neagado estas pezoj, kiuj pluigas la sklavecon ? Ci, kiu cin starigis kontraŭ la juĝo de l'popolo, kaj rifuzis kondamni la senkulpulojn de la Arginuza insuloj, starigu cin kontraŭ la abomeninda penso de cia lando, kaj ne kondamnu la sklavojn, senkulpajn pri sia naskiĝo. Ci, kiu preferas la neskribitajn leĝojn al la skribitaj, laŭte proklamu, ke la socia malegaleco estas mensogo de la malnoblega civito : ĝi senfine daŭrigas, ĝis en tio, kion vi trompe nomas paco, la abomenindan brutalecon de tio, kion vi aŭdacas nomi la rajto de milito."

N.-S. : - Cia sklavo estas sokrate prava. Lia parolo similas kiel frato al la cinika parolo, ido de Sokrato.

A. : - Tial la majstro de Antisteno estis konvinkita. Li komprenis, ke li ne povas plu, eĉ per sia neagado, aprobi la maljuston. Li devis, per siaj tutaj fortoj, per ĉiaj rimedoj, kontraŭbatali la abomenindajn legojn. Aŭ li devis rezigni pri vivo, kiu fariĝis konscie krima. Ho ve! al li mankis la juda vigla kuraĝo. Li retroiris antaŭ certaj necesoj de la lukto. Lia malkuraĝa dajmono ĉiam malpermesis, ke li sin malpurigu ĉe politikaj manovroj, kaj li ne kuraĝis sange makuli Atenon per sklavmilito. Por li kiel por ci la morto restis la sola honcrinda eliro. La Apologio estis la akra kaj spita armilo, per kiu li sin frapis... Al homo de saĝo, tuj kiam li estas kompreninta, restas nur morto. Ankaŭ al homo de amo. En la Oliv-arba ĝardeno, tiu abrupta kompreno kovris Jesuon per la ŝvito el akvo kaj sango... Nur la heroo batalanta por justo noble rajtas vivi.

N.-S. : - Kie ci legis tion, kion ci rakontis koncerne Sokraton ?

A. : - Kiel gravas al ci ? Ĉu ĝi estas aŭ ne estas historia realaĵo, ĝi estas morala vero. Ĉu la faktoj okazis, kiel mi diris ? Mi ne scias. Sed estus noble kaj harmonie, ke ili tiel okazis. En la fremda buŝo de la sklavo mi metis parolojn, kiujn eble murmuris al Sokrato lia propra dajmono. Inter la iamaj maljustaĵoj mi elektis tiun, kiu plej impresas la hodiaŭajn homojn. Al la antikva saĝulo, iu alia maljusto povis aperi en pli viva lumo. Tiu detalo estas al mi indiferenta, kaj devas esti al ci indiferenta... Tuj kiam homo de saĝo konstatis sian neripareblan senpovecon, li mortu.

N.-S. : - Kial ?

A. : - Mi jam diris al ci, ho propravola surdulo. Tial ke cia ekzistado estas konstanta malnobliĝo. Cia maldiligenta konsento al la maljusto, en kiu ci vivas, fariĝis, sub la helo de mia parolo, konscia, kaj, konsekvence, kulpa.

N.-S. : - Se mi faras tion, kio dependas de mi por kontraŭbatali tiun maljuston...

A. : - Sed ci tion ne faras. Ci eĉ ne denuncas al la popolo...

N.-S. : - Paroli al la popolo estas neutile. Justa popolo ne estus viktimo de maljusto. La amason ci povas movi nur cin turnante al la plej malaltaj pasioj. Se ci bone parolas, ĝi ĉesas aŭskulti, aŭ ĝi mise aŭdas. Mi provis, en mia naiva juneco. Kiam mi diris : Justo, oni aŭdis : Venĝo.

A. : - La amaso estis prava. Ĝi komprenis cin plibone ol ci mem. Venĝo estas la necesa komenco de justo.

N.-S. : - Kiom maljuston, tiom venĝantan juston mi malamas. Kiu aspiras al venĝo, tiu estas nur ŝajna justulo. Lia peno troviĝas justa pro hazardo, pro cirkonstanco. Helpu lin ŝanĝi sian situacion, kaj tiu homo starigos, anstataŭ la justo pro kiu li suferis, maljuston de kiu li ĝuos.

A. : - Frapu la hodiaŭan turmentiston. Se la viktimo fariĝos turmentisto, ci frapos lin liavice.

N.-S. : - Altigi humilulojn, por fari el ili malhumilulojn, kiuj meritoj esti malaltigitaj. Tiu biblia tasko ne logas min.

A. : - Tamen...

N.-S. : - Ŝajna justo estas logo, kiu vokas en kaptilon. Mi retroiras antaŭ la cirklon de perforto. Mi vidas la pasejon, tra kiu oni eniras, kaj kiu similas al rideto. Sed ĝi refermiĝas sur la malsingardulon. Neniu reeligis el la cirklo, kiu turniĝadas kiel vertiĝo.

A. : - Ne, sed kiel suno.

N.-S. : - Anstataŭ radioj kaj planedoj, ĝi disĵetas ĉirkaŭ si sangon.

A. : - La justaj dioj ĉiam postulis sangajn oferojn.

N.-S. : - Kaj neniam ili starigis juston.

A. : - Tial ke ili havis malkuraĝajn kaj kompatemajn filojn.

N.-S. : - Justo promesas pacon.

A. : - La sola paco... La lega maljusto estas kaŝa milito. Kiu, iel aŭ alie ŝtelas de ci la frukton de cia laboro, ĉu ci ne rigardas lin kiel malamikon ?

N.-S. : - Sendube.

A. : - Do, kial ci ne kontraŭbatalas lin ?

N.-S. : - En la socia interimpliko, ĉiam, per forto aŭ per ruzo, iu ŝtelos de mi parton el mia laboro. Iu nuna kunbatalanto fariĝus, post la komuna venko, ŝtelanto kaj malamiko... Tro ofte renoviĝis la sperto... Revolucio, cia nomo estas Sizifo. Mi ne plu senspiriĝos suprenrulante la ŝtonegon, kiu ĉiam refalas sur min.

A. : - Tute necesas, ke ciaj paroloj kaj gestoj estu filoj de ciaj sentoj, aŭ ke ci estu mensogulo. Ĉu ci estas mensogulo ?

N.-S. : - Mensogon mi abomenas.

A. : - Kion ci diras kaj kion ci faras, tio kongigas tion, kion ci pensas ?...

N.-S. : Tion mi esperas.

A. : - Do ci estas maljusta en cia koro, ci kiu konsentas manĝi la panon de maljusto.

N.-S. : - Kion ci diras ?

A. : - Tiu, kiu kreskigis la grenon, ne ricevis sian plenan salajron. La proprietulo de la kampo ŝtelis parton el ĝi ; diversaj vendistoj, alian parton ; la registaro, trian. Antaŭ ol manĝi pecon da pano, serĉu, se ci estas justa, tiun, al kiu ci ŝuldas tiun panon, kaj redonu al li tion, kio estis de li ŝtelita.

N.-S. : - Ci postulas malfacilaĵon. Mi ne scias, de kie venas tiu pano...

A. : - Ci konsentas esti maljusta, ha! ha! ha! pretekste ke estas al ci pli oportune. Lasu, ke mi admiru cian kuragon... Mi povus paroli pri ciaj vestoj kiel pri cia pano. Ci estas vestita per teksaĵo el maljustoj.

N.-S. : - Mia senpoveco kreas al mi ian senkulpecon.

A. : - Ne, tiel longe, kiel ci ne faras ĉion,

kion ci povus... Ne, tiel longe, kiel ci ne frapas.

N.-S. : - Frenezulo ! Al enŝlimiĝanta homaro ci konsilas skuigadon, kiu povas nur pligravigi la katastrofon.

A. : - Kiel grave, ĉar por ciaj okuloj la katastrofo estas neevitebla ?... Ĉu ci konstruis la domon, en kiu ci loĝas ?

N.-S. : - Mi estas tute nekapabla.

A. : - Ĉu, interŝanĝe, ci faras ian servon al la masonistoj, kiuj ĝin konstruis, kaj el kiuj unu, eble, estas sentegmenta ?... Ci preferas pagi la proprietulon, kiu priŝtelas cin post kiam li priŝtelis la masoniston. Ci senigas cian bonfarinton por riĉigi cian malamikon.

N.-S. : - Kion mi faru ?

A. : - Loĝu en la barelo de Diogeno.

N.-S. : - La klimato ne estas tre favora...

Krome, la barelo povus ja esti farita de laboristo senigita je la frukto de sia laboro.

A. : - Iru do al alia klimato. Sed ci preferas ekzili cin for de justo ol for de cia urbo...

Cetere tiu demando, solvite, ne solvus la aliajn.

N.-S. : - Ĉiuj demandoj pri justo estos nesolvitaj tiel longe, kiel ekzistos juĝistoj, t.e. tiel longe, kiel ekzistos skribitaj leĝoj kaj civito.

A. : - La civito de justo iam stariĝos sur la ruinoj de tiu ĉi. Helpu detruĝi la frenezan konstruaĵon, kiu embarasas la terspacon kaj kontraŭas la efektivigon de harmonia plano.

N.-S. : - Cia civito de justo estas sanga revo. Mi deflankiĝas kun abomeno de ĉiu revo, kiu konsilas frapi kaj mortigi. Disverŝi sangon por miraĝo retroforiranta antaŭ ni, por promeso eĉ ne nur necerta, sed nerealegebla...

A. : - Nerealigebla ? Kion ci scias ?

N.-S. : - Sur la vojo de la jarcentoj, ĉiam justo ridetas ĉe la horizonto, kaj la horizonto ĉiam restas tiel malproksima. Justo estas la plej postulema kaj mensogema el la diaĵoj. Mi estas nek



blindulo adoranta jam aperintan Mesion kaj jam plenumitan Elaĉeton, nek frenezulo ankoraŭ esperanta pri la veno de Mesio kaj Elaĉeto.

A. : - Kial ne venus la Mesio ?

N.-S. : - Milfoje oni diris : "Jen li ĉi tie; jen li tie for." Milfoje oni mensogis aŭ eraris.

A. : - Kaj tamen li venos.

N.-S. : - Kiam ?

A. : - Kiam vi estos indaj lin akcepti kaj kapablaj lin rekoni. Kiam en la civito estos dek justuloj.

N.-S. : - Neniam ci renkontis dek justulojn ?

A. : - Mi renkontis maloftajn saĝulojn. Mi renkontis, eble pli maloftajn, homojn de amo. Ĉu iam mi trovis eĉ unu solan solidan justulon?

N.-S. : - Ĉia koncepto pri justulo estas kontraŭdira. Ci postulas, ke li faru malbonon pro volo al bono. Ĉu li estas de sufiĉe profunda inteligento ? Li deflankiĝas de la malnobligo de perfortoj aŭ ruzoj, kaj, transirante cian principon, supreniras al saĝo aŭ al amo. Alie, farante malbonon li fariĝas malica ; jen li estas laboristo misformita de sia tasko.

A. : - Sed...

N.-S. : - Prefere rigardu. Tio, kion ci nomas justo, ofte troviĝas en la koro de infano. Justo tia, kia ci komprenas ĝin : infana penso, glano, el kiu eliĝos kverko de saĝo aŭ amo.

A. : - Ne ĉiuj justaj infanoj fariĝas saĝuloj aŭ korkompatuloj.

N.-S. : - Multaj glanoj estas voritaj de porkoj, ĉar en la civito estas multaj porkoj, kaj iliaj dentoj estas potencaj... Koncerne cian juston, tuj kiam ĝi promesas pacon, ĝi estas la plej naiva el la mensogantoj.

A. : - Tamen...

N.-S. : - Pacema estas justo, kiu donas, ĉar, ĝis la horo en kiu ĝi ĉesas doni, estas mal-facile ĝin distingi disde amo. Amo ĝuas plezuron akceptigante donon kiel pagon de ŝuldo,

kaj ĝi volonte surmetas maskon de justo. Sed justo depostulanta estas militema.

A. : - Ĝis ĝi ricevis kontentigon.

N.-S. : - Ne eblas samtempe kontentigi cian juston kaj tiun de cia najbaro. Se du rigidaj justuloj interrenkontos, ili ĝismorte interbatalos.

A. : - Ci diras frenezaĵojn.

N.-S. : - Kiom da procesoj, en kiuj ambaŭ pledantoj estas, unu kaj la alia, persvaditaj pri la justeco de sia afero ! Kiom da militoj, en kiuj, sincere, ĉiu popolo kredas batali por justo !

A. : - Ili plibone rigardu.

N.-S. : - Tiel longe, kiel ci restas ĉe cia vidpunkto, ci nescias, kion oni vidas el la vidpunkto de la kontraŭulo. Tuj kiam ci konsentas rigardi el la starloko de la kontraŭulo, ci eliras el ci kaj el cia justo por eniri en simpatian kaj amon. Amo povus esti principo de paco...

A. : - La historio donas al ci malkonfirmon - mi ne estas sufiĉe sprita por nomi ĝin sanga.

N.-S. : - Se ĉiuj homoj amus kiel Jesuo, se ĉiu estus preta forlasi eĉ sian tunikon al tiu, kiu kredas havi rajton je lia mantelo, de kio venus ankoraŭ militoj, procesoj kaj kvereloj ?... Sed, se mia penso transformas ĉiujn homojn en akrajn justulojn laŭ la juda maniero, tiam mi vidas sur la tersurfaco nur kriojn, disputojn kaj batojn.

A. : - Lasu min ridi pri ciaj okuloj kiel pri du frenezuloj.

N.-S. : - Amo kaj saĝo ĉiam scias, kion ili devas fari. Satiginte la brutalan redonon kaj la stultan venĝon, cia justo jam ne scius al kiu direkto turni sian penadon.

A. : - Mi ne komprenas ciajn vortojn.

N.-S. : - Laŭmerite disdona justo : vojkrucio kiu, mi ja kredas, malfermiĝas nur al senelirejoj.

A. : - Faru al mi la favoron klarigi ciajn obskurajn blasfemojn.

N.-S. : - Ĉu ĝi donos al ĉiuj homoj egalan porcion de la materiaj havaĵoj ? Ĉu ĝi dispartigos ilin proporcie laŭ la bezonoj, proporcie laŭ la penoj, proporcie laŭ la produktado ?... Se la justuloj jam ne bezonus lukti kontraŭ la universalan maljuston, ili dum la tuta eterneco bataladus inter si antaŭ ol akordiĝi pri la ĝusta formulo.

A. : - Tiuj preparaj malfacilaĵoj...

N.-S. : - Ni supozu ilin solvitaj. Sed, se, kiel probable, ci forpuŝas la unuan formulon, se ci trovas absurde malriĉa kaj naiva tiun egalecon, kiu forgesas la malsamecon de bezonoj, de penoj kaj de rezultoj...

A. : - Mi ja kondamnas tiun infanaĵon.

N.-S. : - Nu do, kiun ci komisias por limigi la invademajn bezonojn, mezuri la penojn aŭ taksii la produktadon ?

A. : - Kiel gravas tiu detalo ?

N.-S. : - Ĝi tiel gravas, ke ĝi necese kreas tiranecon. Kaj la tiraneco - tion ci scias, ci kiu ĝin instruis al Mark-Aŭrelio - havas maljuston kiel neeviteblan idon... Se ci povus por momento starigi cian malvarman ekvilibron, la arda komplikeco de la vivo ne prokrastus por ĝin detruiri.

A. : - Al kio ci intencas veni ?

N.-S. : - Al nenio. Mi estas alveninta.

A. : - Ci maksimume demonstris, ke mia devo estas sama kiel cia : morti. Ha! se mi povus...

N.-S. : - Mi volus vidi cin kreski ; mi dezirus vidi cin fine eliri el tiu infaneco, kiu estas la volo pri justo.

A. : - Saĝo kaj amo estas ankoraŭ malpli plenkreske viraj.

N.-S. : - Se, marŝante kun infano, mi trovos amason da ludglobetoj, ĉu mi dividus ĝin kun ĝi laŭ la leĝoj de justo ?

A. : - Mi komprenas : ci lasos al ĝi ĉiujn globetojn, pro indiferento aŭ pro amo. Sed, kiam temas...

N.-S. : - En ĉiuj kvereloj inter individuoj aŭ popoloj, ĉiam temas pri globetoj, kaj la judmaniera justulo estas nekuracebla infano. Sed Jesuo...

A. : - Ankoraŭ !... Ci rediros al mi pri la tuniko, kiu aspiras sekvi la mantelon en la manojn de la ŝtelisto, pri la maldekstra vango, kiu envas la dekstran, ĝis ankaŭ ĝi ruĝiĝos pro vangofrapo. Ha! ha! ha!

N.-S. : - Ridu tiom, kiom al ci plaĉos, pri tiu solvo malfacila, sed ekzakta. Cia solvo estas malĝusta.

A. : - Do kristano ci estas ?... Mi kredis cin stoikisto.

N.-S. : - Kristano senpere ordonas al si ami la homojn. Mi, mi indiferentiĝas pri tiuj ŝajnaj posedaĵoj, kiuj malhelpas tiun amon. Sed cia justo, kiu taksas tiujn mizerajn globetojn kiel la solajn posedaĵojn, cin enfermas por eterne en la eksteraj tenebroj. Jesuo eligis el ili per sublima flugo de sensciaj kaj ardaĵ flugiloj. Li ne scias diri la vojon, kiu konvenas al niaj rampaj pezecoj. Mi, stoikisto, povas, plibone ol kristano, indiki kiuj padoj kondukas al la liberaj suproj de amo.

A. : - Simpla afero pri provizora metodo. Ĉar ci retrovas Jesuon, ci estas kristano.

N.-S. : - Eble Jesuo estas stoikisto, en kiu genia impeto anstataŭas la metodon. Sed ne gravas al mi la nomoj, per kiuj oni laŭdas aŭ mal-laŭdas min. Tie supre, mi ja retrovas, kune kun Sokrato, kun Epikuro, kun Epikteto, kun ĉiuj, kiuj sciis fariĝi homoj anstataŭ resti grekoj, la grandulojn, kiuj, devenintaj de cia raso, sciis elimplikiĝi el cia raso.

A. : - Nomu kelkajn el ili.

N.-S. : - Jesuo, Filono, Spinozo.

A. : - Kaj via malkuraĝa amo ne provas savi la popolojn !

N.-S. : - Nia amo vokas tiel laŭte, kiel ĝi povas ; ĝi indikas la padon, ĝi etendas la manon

al venantoj. Malmultaj individuoj aùdas niajn vokojn kaj ekvidas niajn gestojn. Iafoje, ho ve! iu popolo provas la grimpadon. La mallarĝa vojeto ne enlasas la frenezon baraktantan kaj puŝpelantan. La provadoj de grupo ĉiam finiĝas per brua kaj sanga falo en abismon aù per ne-perceptata glitado, kiu rekondukas al la deirpunkto. Sed oni ŝanĝas la nomon de la loko, en kiu oni sin retrovas, ne konante ĝin, kaj oni ornamas la longan surlokan paŝadon per la nomo progreso.

A. : - Ci lerte ekskuzas cian neagadon. Ĝi tamen faras el ci abomenindan komplicon de la organizita maljusto, kies samtempano ci estas... Ĉu ci lasus mortigi antaŭ ci ?

N.-S. : - Se, povante malhelpi murdon, mi lasus ĝin fari, mi fariĝus murdanto.

A. : - Ci faras pli ol lasi murdi, ci helpas la murdanton... Malamiko de milito, ci pagas la impostojn, kiuj ebligas prepari militon. Malamiko de la maljusto de la leĝoj kaj de la malico de la juĝistoj, ci pagas impostojn, kiuj pludaŭrigas la maljuston de la leĝoj kaj la fieran malicon de la juĝistoj.

N.-S. : - Mi estas malriĉa, kaj la impostkolektisto adresas al mi neniuajn paperojn.

A. : - Parto de tio, kion ci donas al la proprietulo de cia loĝejo estas imposto. Dank'al la mekanismo de la komercimposto kaj de la nerektaj impostoj, ci ne manĝas pecon da pano sen doni iom da mono por la eternigo de maljusto.

N.-S. : - Mia morala pozitivismo deturnas mian penson de la problemoj, kiuj estas nesolveblaj.

A. : - Ha! ha! mi admiras cian kuraĝon por fuĝo.

N.-S. : - Indiku al mi ion alian.

A. : - Kiu estas brava ne bezonas, ke oni eks-citu lin al batalo.

N.-S. : - Kaj kiu estas klarvida, povas sendanĝere esti ekscitata. Li ĉiam rifuzos aldoni

al la ordinara maljusto la maljuston de batalo, interbatigi la kaŝe malican perforton de la leĝo kaj la hurlantan perforton de ribelo. Post la revolucio, tion li tro scias, la malbono estus pli grava ol antaŭe.

A. : - Pli grava ?...

N.-S. : - Ĉiu batalo estas selekto. Ĝi elektas, por ilin altigi, la plej ruzaĉajn kaj la plej akrajn, la plej militemajn, la plej maljustajn. Ĉiam revoluciisto laboras por Kromvelo aŭ por Napoleono.

A. : - Tiel ci ne konservas por iu estonteco, eĉ malfrua, plej palan esperon ?

N.-S. : - Mi amas jenan difinon de unu poeto : "Espero, la lasta el miaj malkuraĝaĵoj."

A. : - Tamen ĝi sola senkulpigas la malkuraĝon vivi. Se ci rezignas pri tiu senkulpigo, kiel ci povas ankoraŭ alkroĉiĝi al la vivo ?

N.-S. : - Eble ci persvadus min, se ci instruus al mi, kio estas la morto.

A. : - Ha! ha! ci retroiras antaŭ la nekonato...

N.-S. : - Mi ne retroiras... Sed mi neniel fidus al la promesoj de la morto. Mi suspektas, ke ĝi estas mensogo kaj ŝajno.

A. : - Plia motivo por ne timi ĝin.

N.-S. : - Kaj por ne strebi al ĝi... La vivo, kredeble, ĉiam pludaŭras. Antaŭ tiu marŝado retroiras la horizonto el nokto kaj ripozo. Nu, la justo pri kiu ci revas, absoluta kaj neŝancel- ebla ekvilibro, ĉu ĝi ne estus definitiva halto? Ĉu ĝi ne estus morto ?

A. : - Nu ?

N.-S. : - Mi sentas ĝin neebla tie transe kiel tie ĉi. Mi domaĝas al mi la penon, vere naivan, fuĝi de maljusta atmosfero por fali en maljustan atmosferon.

(La Vaganta Judo, levante la ŝultrojn, sin direktas al la pordo. Li malfermas, trapasas ĝin. Sed li ne refermas. Li hezitas. Poste li faras tiun abruptan movon, kiu, en certaj ekdecidoj, reĵetas la kapon malantaŭen. Malvarma rideto

disigas liajn lipojn kiel fendo disigas montan glacieron. Kaj li revenas al Neo-Stoikus, kred-eble por nova batalo).

A. : - Se mi pensus kaj sentus kiel ci, ĉu ci scias, kion mi farus ?

N.-S., ridetante : - Se ci pensus kaj sentus kiel mi, ci farus tion, kion mi faras.

A. : - Ne, ĉar mi estas logikema.

N.-S. : - Ĉu do mi ne estas tia ?

A. : - Malproksime ci estas.

N.-S. : - Do ĉesu esti tia, aŭ ne pretendu plu pensi kiel mi.

A. : - Tiajn subtilaĵojn mi abomenas.

N.-S. : - Artileriisto abomenas kuglegon, kiam la kuglego lin frapas.

A. : - Ĉu ci, Neo-Stoikus, trovas juste, ke tiuj fi-estuloj, la trivialaj homoj, de kiuj ci nenion esperas eĉ en la plej fora estonteco, ĝuas la verkojn de geniuloj, kiujn ili persekutis kaj malsatigis ?

N.-S. : - Ili estas tiel nekapablaj ĝui tiujn verkojn !

A. : - Ĉu ne ŝajnas al ci, ke ci devus bruligi la muzeojn kaj la bibliotekojn ?

N.-S. : - Juĝante min laŭ si mem, tiuj honestuloj balancus la kapon kun envia aprobo : "He! he! ili dirus, ne mallerta, tiu reklamo. Lia venonta libro estos aĉetata."

A. : - Ĉu la timo pri tiaj stultaĵoj sufiĉas por cin haltigi ?

N.-S. : - Tiaj antaŭviditaj stultaĵoj estas unu el la amuzaj tentoj, al kiuj mi malfacile rezistas.

A. : - Kial ci rezistas ?

N.-S. : - Ĉu ci opinias cin inda vidi la fundon de mia penso ?

A. : - Se ci imagas, ke ĝi estas malfacile penetrebla, la fundo de cia penso... Ĉi tie kiel ĉie, ci obeas al sindetena filozofio, kiu esprimas cian naturan pigrecon.

N.-S. : - Se ci ĝuas plezuron tion kredante,

mi vidas en tio nenium malutilon.

A. : - Almenaŭ pelu ĝisekstreme sindetenon kaj pigron.

N.-S. : - Mi komprenas. Ĝis lasi min morti.

A., skuante la kapon : - La heroaj konsiloj glitas sur ci. Nun, mi postulas de ci multe malpli.

N.-S. : - Kion ci postulas ?

A. : - Unu el ciaj poetoj konstatas, ke la Patro, malgraŭ la preĝoj kaj la agonio de la Filo, "lasis al ni kvazaŭ abortitan mondon\*". Ĉu ci memoras pri la decido de lia malespero ?

N.-S., kun jesa signo :

- "La justulo kontraŭmetos malsaton al malesto  
Kaj plu respondos nur per malvarma silento  
Al la eterna silento de la diaĵo."\*

A. : - Ĉar ci kredas eterna la surdecon de la homoj, kial ci ne staras antaŭ ili kiel la poeto antaŭ la fermita ĉielo ? Ankaŭ rilate al la homoj, por ĉiu, kiu pensas kiel ci, "Sole silento estas granda, ĉio cetera estas malforto"\*

N.-S. : - Sed...

A. : - Sed ci, kiu nenion esperas de ili nek por ili, ci malsaĝe foruzas cian vivon parolante al ili. Ci rigardas kiel neeban la savon al la mondo ; tamen cia gesto estas tiu de apostolo, kiu imagas, ke de lia gesto dependas la savo al la mondo. Eĉ okazas, ke ci proklamas antaŭ ĉiuj homoj tiujn verojn, kiujn oni singarde rezervu al inicitoj, tiujn verojn, kiuj malinklinas al publika parolo kaj deziras la silentan geston de hierofanto.

N.-S. : - Tiuj stultuloj zorgantaj pri profitoj kaj malamoj, pri komercaj konkurencoj kaj pri militoj kun armeoj kaj flotoj, pri mekanikaj inventoj kaj aliaj malsaĝaĵoj naivaj aŭ malicaj, kiel ili komprenus la noblan perditan lingvon,

-----  
\* Alfred de Vigny.



kiun mi parolas ? Tiuj estuloj, al kiuj Mamono krevigis la okulojn, kiel ili vidus, eĉ se mi ĝin svingus sur la suproj, la lumon ?

A. : - Do kial ĝin svingi ? Kial paroli ?

N.-S. : - Ne, ne por ili mi svingas la lumon ; ne, ne al ili mi parolas.

A. : - Ci parolas antaŭ ili.

N.-S. : - Miaj vortoj, tro grandaj por iliaj oreloj, ne eniros en iliajn orelojn...Analoge pripenso, se ci volas scii, igas min respekti muzeojn kaj bibliotekojn. Tiuj stultuloj sin kredas kulturitaj, kaj aroge fanfaronas, ke ili ĝuas belon. Neniam ili trapasas la surfacon kaj tion, kion ili nomas la metio. Iu animo sin elmontras riĉa kaj harmonia ; legantoj kaj spektantoj kredas pri mekanika lerteco, kaj ilia blinda analizo reduktas ĝin al procedoj de malriĉulo. Ili kredas rigardi mirindan arbon, kaj ili eksplikas al ni, kiel ĉiu folio estis gluata sur sia branĉeto, ĉiu branĉeto sur sia branĉo, ĉiu branĉo sur la multenaska trunko. Tiel amuzaj estas iliaj azenaĵoj ! Foje-foje mi legas unu el tiuj akademianoj, kiu tenas butikon de kritikisto. En ĉiu el liaj paĝoj estas sufiĉa materio por ridi dum jarcentoj.

A. : - Kia malsaĝo igas cin senspiriĝi parolante antaŭ tiu grego ?

N.-S. : - Perditaj inter la grego, vivas kelkaj homoj, kiuj eble aŭdos mian parolon kaj amos mian voĉon. Mi konas pli ol unu fraton mian, kaj kredeble mi ankoraŭ pliriĉigos mian familion.

A. : - Ne tiel ci parolis antaŭ kelkaj jaroj.

N.-S. : - Miaj fratoj venis malfrue. La malica naturo igis min naskiĝi antaŭ mia generacio.

A. : - Ci jam estis parolanta, antaŭ ol ili venis.

N.-S. : - Por ke ili venu.

A. : - Ci estis voĉo krianta en dezerto.

N.-S. : - Kaj homplenigonta sian dezerton.

A. : - Se neniu estus veninta ?...

N.-S. : - Mi estus plu parolinta.

A. : - Kiel absurde !

N.-S. : - Iam okazas, ke voĉo estas aŭdata nur de ĉare, nur kiam la trivialaj homoj kredas ĝin mortinta.

A. : - Ci donas al ci pretekstojn.

N.-S. : - Vere ja mi ankoraŭ ne diris al ci la motivon plej profundan inter ĉiuj, kiuj postulas, ke mi parolu.

A. : - Diru ĝin.

N.-S. : - Voĉo estas kreita por paroli. Eĉ se ĉio ekstera konspiras por ĝin sufoki, ĝi ne povas silenti.

\* \* \*

Deka apero  
 Ahasvero aperas al Festiva  
 aŭ  
 LA DIALOGO PRI LA SONGO

\*\*\*\*\*

Estis, ankoraŭ peza, somera vespero. En la bonodora varmeto de pinarbaro, Festiva, filino de Neo-Stoikus, pasigis la tagon kun sia patro. Ili parolis pri Ahasvero, kies diversajn aperojn intencis skribi rakonti la filozofo. Nun, sola sub la lampo, ŝi relegis malnovajn paĝojn de la patro. En la varma aero, en la laceca zumado, tio, kion ŝi legis miksigis kun la vortoj aŭditaj kelkajn horojn antaŭe, eble ankaŭ kun novaj bildoj kaj konceptoj : monotona dancado de pensoj, en kiu neniu estas distingiga, kie en ĉiu momento unu prenas la lokon de alia, alia la lokon de unu, kie unu fariĝas la alia, kie la alia fariĝas la unua. Ĉiuj aferoj en kirlo kunfandiĝas, kaj en la konfuza kunveno, nekonatoj nerimarkite sin enŝovas, frenezuloj sin enmiksas, sen ke iliaj falsbrilaj ornamoj kaj iliaj gestoj havigu surprizan ekskuon, sen ke la laca prudento tiru la sonorilŝnuron kaj laŭtigu la alarmsonoron pri danĝero. Sed, kiam Ahasvero aperis al Festiva, ŝajnis al ŝi, ke ŝi jam ne legis. Eĉ, ĉu ŝi dormis, ĉu ŝi estis vekita, ĉu ŝi descendis la deklivon, kiu kunigas maldormon al dormo, ŝi ne sciis diri. Kaj ŝi estas tro sincera por aserti, ke subite la viro estis antaŭ ŝi, kaj ke la voĉo frapis ŝin kun la bruskeco de bato. Ĉar eble la fantomo malrapide sin formis. Eble malrapide preciziĝis, unuiĝis ; ombroj de vortoj

naĝantaj en la fluidaĵo de sonĝo troviĝis, oni ne scias kiam nek kiel, kunigitaj en ordigita kaj potenca armeo.

A. : - Filino de tiu, kiu, ne sciante vivi, retroiras antaŭ la morto, mi venas paroli al ci pri cia patro.

FESTIVA : - Mi malpermesas, ke ci tuŝu miajn amatojn, ĉar ci scias paroli nur malamike, kaj cia unua parolo enhavas mensogon.

AHASVERO : - Ci ne malhelpos, ke mi diru, kion mi volas.

F. : - Sed mi krios pli laŭte ol ci kaj mi malbenos cian rason.

A. : - Kion vi ĉiuj havas kontraŭ mian rason ?

F. : - Mi, nenion, tiel longe, kiel ci ne vundas tiujn, kiujn mi amas.

A. : - Kaj se mia voĉo estos la pli forta ?...

F. : - Mi kapablos ĝin malfortigi.

A. : - Per kiuj rimedoj ?

F. : - Mi remetos cin en cian lokon. Mi memorigos al ci, ke ci estas, entute, nur legendo.

A. : - Eble mi estas io alia.

F. : - Kio do ?

A. : - Nu, se resti modesta, sonĝo, por ekzemplo.

F. : - Ankaŭ sonĝo rajtas nur je murmuroj glitantaj kaj svenantaj.

A. : - Mi kompatas pri cia nescio. CIAJ SONĜOJ estas la plej profundaj el cIAJ REALAĴOJ.

F. : - CIA ABSURDA AŬDACO...

A. : - SONĜO MOVAS EN CI LA HUMON DE CIAJ HIERAŬAJ pensoj ; kion ci kredis mortinta, tion ĝi restarigas viva. La dormo de cia juneco, rigardu, redonas al ci cian infanecon. La sonĝo de cia maljuneco rekonstruos cian maturan aĝon. Anu la banon, kiu ĉiunokte rejunigas cian spiriton.

F. : - Se...

A. : - Per neniu rimedo ci eniĝos en cin tiel profunde kiel per la sonĝo. Respektegu cIAJN SONĜOJN : per ili ci enprofundiĝas en cin ĝIS ci retrovas cian patron.

F. : - Mistera potenco !

A. : - Ĉiuj statuoj de ciaj hieraŭoj de ci konataj, de ciaj hieraŭoj, kiujn ci kredas de ci nekonataj, amasiĝas kiel senforma piedestalo, sur kiu ci pene starigas la hodiaŭan statuon. Tiu piedestalo, ligita per forgesoj kaj tenebroj, la sonĝo ĝin deligas, kaj jen estas, liberigitaj, miriadoj da statuoj.

F. : - Cia parolo vekas en mi, pli laŭtan kaj pli fortan ol cia parolo, vorton de Epikteto : "Ĉu ci volas scii kiom ci progresis : esploru ciajn sonĝojn."

A. : - En morala formo de ci pli atingebla, Epikteto diras ekzakte tion, kion mi diras.

F. : - Tion mi ne kredas.

A. : - En la sonĝo, ci havas la karakteron, kiun hieraŭ ci ne provis detrui ; ci retrovas tion de ci, kio estas jam solidigita, kio jam ne estas malcerta peno, duba akiro, fandiĝanta metalo.

F. : - Cia parolo revekas en mi la popolan diradon, kiu superas cian parolon : "Sonĝo, mensonĝo".

A. : - Ci nomas mensongo la veron, kiun ci neas de post ĉi mateno. Neniam sonĝo mensogas. Ja vere, ofte ci atribuas al ĝi erarojn.

F. : - Kiel nome ?

A. : - Se paroli kun kelka rigoreco, ci mensogas ĉiufoje kiam ci raportis pri sonĝo. Kaj la homo, ĉiam dirinte nur sonĝojn, ĉiam mensogadis.

F. : - Mi ne scias, Ahasvero, ĉu ci konfuzas tion, kio devas resti distingita, aŭ ĉu cia sola kulpo estas, ke ci tro rapide parolas : denove mi ĉesas kompreni.

A. : - Memoru. Ĉe la vekigo, ci volas kolekti cian sonĝon. Ĝi fuĝas, disigitaj gutetoj, kiel hidrargo kiam rompiĝas la vazo. La malmulto, kion ci sukcesas kapti, restas fragmenta, senkohera, malfirma. Poste cia ŝajne venka peno ĝin enfermas en novan ujon. Kaj ci kredas, ha! ha! ha! ke ĝi reprenis la formon de la unua vazo.

F. : - Ci troigas.

A. : - Ke cĉiaj songoj estas malpli logikaj ol cĉiaj pensoj de la maldormado, ĉu ci aŭdacus nei ?

F. : - Mi ne neas.

A. : - Do kiel, maldormante, ci rakontus ilin, se ne tradukante ilin en tiu tro-logika lingvo ? Sed ĉiu traduko estas komento kaj perfido. Ĉu eĉ cĉiaj songoj estas penseblaj de cia maldorma penso ?... La homo, tial ke li parolas, misformas la aferojn kaj misformas sin mem.

F. : - Denove mi ĉesas kompreni.

A. : - Cĉiaj songoj similas, se ne al la profunda realo de la aferoj, almenaŭ al cĉiaj realaj profundaĵoj. Ili neniel similas al cia absurda sistemo pri la aferoj kaj pri ci. Ĉio, kion oni donas al ci, eĉ kiam cin mem oni provas al ĉi doni, ci misformas ĝin.

F. : - Ĉu ci estas certa ?

A. : - Nokte, sur la sama soleca vojo, superstiĉulo vidas fantomojn, sed timulo fuĝos antaŭ trupo da rabistoj. Nu, fantomoj kaj rabistoj estis arboj sub la luno aŭ ruinaj murpecoj.

F. : - Mi estas nek superstiĉa nek fitimema.

A. : - Aŭ ci ne estas, aŭ ci estas io. Kio ci estas, tio modifas tion, kio estas al ci donita. La songo donas al ci dornaĵon, ci faras el ĝi fantomon, rabiston aŭ arbaron. Ĝi donas al ci ruinon, el kiu ci starigas fantomon aŭ palacon.

F. : - Ci troigas.

A. : - Eble. Pro indulga mildeco. Cĉiaj songoj jam estas en ci. Ili donas al ci nur cian malriĉan veron, ne la riĉan veron de la aferoj. Nu, ci, malo de tio, kio ci kredas esti, vidas la malon de tio, kion ci kredas vidi.

F. : - Ĉu mi povas peti, ke ci pli klare parolu ?

A. : - La bildo de la objektoj, kiel ĝi formiĝas sur cia retino ?

F. : - Renversite.

A. : - Do, laŭ kiu rajto ci kredas la objekton rekta ? kaj per kiu mensogo ci kredas vidi ĝin rekta ?

F. : - Mia tuŝosenso edukis mian okulon.

A. : - Kial ci fidas cian tuŝosenson pli ol cian okulon ? Kial ci faras el sia okulo mensogan sklavon, kiu parolas la lingvon de sia tuŝosenso ? Per kio ci diferencas de la fitimulo, kiu trudas siajn okulojn paroli la lingvon de sia timo, aŭ de la trokredulo, kiu trudas siajn okulojn paroli la lingvon de sia superstiĉo ? Cia unueco estas nur falseco... Kredu ĉiujn ciajn sensumojn, aŭ kredu nenium. (Silento, poste Ahasvero eksplodas per granda rido) Ha! ha! ha!

F. : - Kial ci tiel ridas ?

A. : - Mi pensas pri la motivoj, pro kiuj la homo donas la reĝecon al sia tuŝosenso prefere ol al kiu ajn alia el siaj sensoj.

F. : - Eble pro tio, ke la tuŝado sin trudas per sia vasteco kaj per la konstanteco de sia babilado : ĝi havas kiel organon la tutan surfacon de la korpo, kaj neniam ĝi plene mutas.

A. : - Ne. Ĝi estas pro tio, ke la homo ĉiam timas fali.

F. : - Cia klarigo ŝajnas al mi malmulte subtila.

A. : - Ankaŭ pro tio, ke tuŝado estas la senso de la doloro, kaj, kiel ci pli poste ekscios, naiva infano, de la plezuro. Cia prudento estas nur obeado al plezuro kaj al doloro. Cia racio, pri kiu ci tiel fieras, estas nur glora nomo donita al cia sensiveco.

F. : - En la homo ĉio sin kuntenas...

A. : - La homo estas artefarita fasko, grego kies unueco estas konservata per la mordoj de la doloro kaj la karesoj de la plezuro. Ĉu ci havas kelkan kuraĝon kontraŭ sia sensiveco ?

F. : - Mi kredas.

A. : - Nu do, provu la grandan aventuron. Aŭskultu ĉiun el ciaj sensoj por ĝi mem, ne kiel

avertilon de la tuŝado. Esploru ĉiujn ciajn landojn ; disiĝu per vigla kurajo en cia plur-eco.

F. : - Estas ja frenezo, kiun ci konsilas al mi.

A. : - Cia racio malriĉigas cin. Konsentu al cia denaska riĉeco.

F. : - Ci asertas racia la forlason de racio. Cia konsilo sin mem detruas. La branĉo, kiun ci desegas, estas la branĉo, kiu cin subtenas.

A. : - Kio ŝajnas al ci mia venkiteco, tio estas ĝuste mia granda triumfo. Mi lasas paroli la racion solan, ĝi estas trudata konkludi kontraŭ si mem.

F. : - Ni ambaŭ diras samon, kaj tamen malon. Pri tiu punkto ni povus nur ripeti niajn parolojn, eble ŝanĝante ingenie ilian aspekton.

A. : - Tio sufiĉas, por ke mi cin kondamnu.

F. : - Ankaŭ, por ke mi cin forpuŝu... Sed, se ci deziras, reparaĵu al mi pri la sonĝo. Ci ŝajne diris, ke la bildoj de ĝi prezentitaj estas misformataj de la vekigo.

A. : - Misformataj kaj renversataj.

F. : - Ci mirigas min.

A. : - Rimarku la rapidecon, aŭ pli ĝuste la momentecon, kun kiu ci asertas, ke ci vidas rekta tion, kion reale ci vidas renversita. Ci atingis, ke ci jam ne povas, eĉ per diligenta peno, vidi la objektojn tiaj, kiaj ci vidas ilin. Kion ci faras pri la objektoj desegnitaj sur cia retino, tion same ci faras, ĉe la vekigo, pri la bildoj desegnitaj sur cia dormo.

F. : - Nur aserton ci donas.

A. : - Eble ci legis tiun anekdoton : viro, kuŝanta sur la ventro, estis vekita per stango de sia lito, kiu falis sur lian kolon.

F. : - Ŝajnas al mi, ja.

A. : - En momento tiel mallonga, ke ĝi estas eĉ nemezurebla, li ricevis sonĝon, kies rakonto estas longa.



F. : - Mi proksimume memoras.

A. : - Li travivis la tutan epokon de la francrevolucia Teroro. Li estis prezentita antaŭ la revolucia tribunalo. Li vidis Robespierre, Marat, Fouquier-Tinville. Li diskutis kun ili. Li estis juĝita, mortkondamnita, kondukita en la terura ĉaro, inter multopa popolamaso, al la Revoluci-placo. Li supreniris sur la eŝafodon, sentis sian kolon en la gilotina koltenilo, sentis la tranĉilegon frapilinan nukon, sentis sian kapon apartiĝi de sia korpo. Lin vekis la angoro, aŭ pli ĝuste la reala bato.

F. : - Mi admiras tian amasiĝon de okazoj en unu sekundo.

A. : - Ankaŭ tion admiris la viro, kiu rakontis tiun sonĝon. Mi, mi spertas alian miron, senmezure pli grandan.

F. : - Kiun ?

A. : - Ja la abrupta kaj malvarma falo de la stango estigis la penson pri gilotino.

F. : - Sendube.

A. : - La penso pri gilotino retroirigis la sonĝanton al la antaŭaj scenoj. Kiel la nuboj iras de maro al montoj, la sonĝo iris de la elfluejo al la fonto, de la fino al la komenco, de la efiko al la kaŭzo. En la sonĝo, nepre la kondamno okazis post la ekzekuto, la kontraŭdira juĝado post la kondamno, la aresto post la juĝado. Sed la trompa vekigo, kondensante la nubojn kaj ilin defaligante inter la bordojn de la loĝika rivero, malsupren fluigis tiun pezan kaj fridan akvon sur la necesa deklivo de la homa menso.

F. : - Kion ci diras, tio estas konsterna, kaj tamen ŝajnas vera.

A. : - Kaj la rakontinto - kaj tamen li estas homo, kiu pasigis sian vivon en observado pri siaj sonĝoj kaj rezonado pri siaj observoj - eĉ ne suspektis tiun ordoŝanĝon, kiu fariĝas evidenta tuj kiam oni ĝin rimarkigas. Ĉe lia

vekigo, sammomente, lia racio kaj liaj kutimoj rerektingis la bildon renversitan sur la ekranon de la dormo, samkiel cia racio kaj ciaj kutimoj rerektingas, sen ke ci konscias, la bildon renversitan sur cia retino. La vekigo estas kondamnita reordigi la temposekvojn de la maldormo.

F. : - Interesa observo.

A. : - Eble ĝi iras pli funden ol ci kredas.

F. : - Ĝis kie ĝi iras ?

A. : - Antaŭ ol mi tion diros, mi donos alian ekzemplon. Kartezio, pikita de pulo, songis pri kverelo kaj duelo. La batalo finiĝis per spadobato en la preciza punkto pikita de la pulo, kaŭzo de tiu tuta perturbo.

F. : - Amuza estas la historieto.

A. : - Ĉi tie ankoraŭ, ĉar la kaŭzo de la sono estas konata, ni povas restarigi la ordon, laŭ kiu ĝi fariĝis. La batalo unue finiĝis, poste ĝi komenciĝis. La spadobato estis ricevita, antaŭ ol la spadoj interkruciĝis. La duelo antaŭis siajn preparojn, kaj tiuj ĉi antaŭis la kverelon, kiu ilin kaŭzis. Sed Kartezio, malgraŭ la potenco de sia menso, neniam suspektis la retroan iradon de sia sono. Naive, eĉ ne imagante alian eblon, li transportis en la veron de la sono la ordon, la kaŭzecon kaj la mensogan temposekvojn de la maldormo.

F. : - Ĉio ĉi estas tre maltrankviliga.

A. : - Ci ne finis maltrankviliĝi. Ĉiu el ciaj sonoj kaj ĉiuj el ciaj sensaĵoj postulas, por fariĝi tiaj, kiaj cia racio ilin volas, plurajn mensogojn.

F. : - Ci diras ?

A. : - Al ci ne sufiĉas, ke ci renversas la veron de cia okulo. Krom iafoje en la sincero de ebrio, la homo faras unu bildon el la du bildoj, kiuj pentriĝas sur liaj du okuloj. Ĉar la menso de la homo malpli valoras ol lia korpo, kaj la menso de la homo estas unuokula.

F. : - Tiu unuigo de du bildoj estas tiel

facile eksplikebla. Ci ja scias...

A. : - Plie, cia okulo, antaŭ ol ci ĝin kontraŭnaturigis, donas al ci ĉiujn objektojn sur unu sola ebena. La unuaj vidoj de denaska blindulo operacie vidantigita demonstras, ke la distingaj ebenaĵoj, la distancoj, la spaco estas artefaritaj aferoj, inventoj de la racio, homaj mensogoj.

F. : - Tamen...

A. : - Cia okulo, se ci scias ĝin malfermi, detruas la spacon samkiel, se ci scias ĝin fermi, ĝi detruas la tempon. Sed, tuj kiam ci provas koncepti cian sonĝon dum maldormo, ci transformas en konstruaĵon senkoheran amason da materioj.

F. : - Sed...

A. : - Aŭ pli ĝuste, tio estas nur ŝajno. Konsentu al la unua peno, konsentu al la malordo unue prezentata de ciaj veraj sonĝoj kaj de ciaj veraj sensaĵoj. Kiam ci estos detruinta la banalan konstruaĵon starigitan de cia mallerta racio, ci vidos iom post iom stariĝi la plej mirindan el la palacoj.

F. : - Mi kredas, ke...

A. : - La beleco, kiun ci atribuas al la Kosmo, estas de ci kreita. Rezignu ĝin. Konsentu momente al la kaoso, kiun ci ekvidas tra cia fragila konstruaĵo. Mi promesas al ci tiel emocian spektaklon...

F. : - Ci ne tentos min. La eksperimento estas tro danĝera.

A. : - Estu brava. Kuraĝu fronti diseriĝon kaj demencon. Transe troviĝas la vera racio, tiu de la universo ; la vera belo, tiu de Dio.

F. : - Mi pli vere timus...

A. : - Necesas elekti. Rezignu tion, kion ci kredas esti ci, aŭ rezignu la aferojn. Rezignu la racion aŭ la sciencon.

F. : - Mi ne estos tiel naiva, ke mi serĉu sciencon, kiu ne estus homa.

A. : - Tamen la promesita rekompenco...

F. : - Pri ĝi mi ne kredas.

A. : - Tial ke ci timas.

F. : - La demenculo...

A. : - Sentime plonĝas tra la kaoson, kiu cin timigas. Ĉu ci scias pri la spektaklo, kiu eble emocios lin post la trairado de ŝtonegoj kaj disfalaĵoj ? Li vidis Dion, mi asertas, en lia tuta beleĝo.

F. : - Malica tentanto ! Ankoraŭ pli ol antaŭ la danĝeroj de la trairado, mi retroiras antaŭ la mirbelaĵoj, kiujn ci promesas. La vizaĝo de dio, se ĝi forlasas ĉian homan maskon, sufiĉas por nenigi mortemulon. Vade retro, Satanas\*.

(Ŝajnis al Festiva, ke ŝiaj incititaj paroloj forpelis la estulon aŭ la fantomon. Sed li revenis. Kaj ŝi ne scias, ĉu la eklipso konsistis el unuminuta vekigo aŭ el unuminuta endormetiĝo. Ŝi ekkoleris kontraŭ lian revenon).

F. : - Foriru do, Isaako Lakedem\*\*.

A. : - Al kiu ci parolas ?

F. : - Foriru, absurda Kartafilus\*\*.

A. : - Al kiu ci parolas ?

F. : - Foriru, Juan Espera-en-Dios\*\*; foriru, abomena Butadeus.\*\*

A. : - Kial ĉiuj tiuj nomoj ? Mia nomo estas Ahasvero.

F. : - Songo, suferu la leĝon de la songoj. La vortoj, liberigitaj kaj vagantaj, vizitas aliajn ideojn ol tiuj, el kiuj la maldormo faris ilian loĝejon. La vortoj, vivantaj etiketoj, jen, en la frenezo de songo, ili vagas kaj ludas tra la tuta butikoj, hazarde gluiĝas sur plej neantaŭviditaj varoj, foje gluiĝas unuj sur aliaj. Ofte, je la vekigo, mi kaptis frazon, kiun mi elparolis en songo. La vortoj, kiujn ĝi grupigis ĉe sia surfaco, signifis nenion. Tamen la frazo havis subteran signifon. Ĉiu vorto signifis ideon, kiu ne konvenis al ĝi.

\* Iru retro, Satano.

\*\* Aliaj nomoj signantaj la Vagantan Judon.

A. : - Ankaŭ mi memoras. Ci diras veron. Sed, tiaokaze, la vortoj estas maskoj, ne vizaĝoj. Sed tiaokaze eraras la filozofoj, kiuj, en profundoj, identigas vorton kaj penson. Sed tiaokaze la Vorto ne estas la samsubstanca filo de Dio. Ĝi pliĝuste similas al edzino, kiu, tuj kiam la edzo ne sufiĉe forte ŝin gardas, fariĝas adulta.

F. : - Mi redonas al ci tion, kion ci donis al mi : trezoron da meditaĵo kaj zorgaĵo. Ni estas kvitaj. Kaj nun, mi volas, foriru, Ahasvero, Kartafilus, Butadeus, Juan Espera-en-Dios, Isaako Lakedem.

(Per la movo de la sfera volo en si mem volviĝanta, ne konsentanta plu koni ion krom si mem, la estulo foriĝis aŭ la fantomo svenis. La morgaŭan tagon Festiva rakontis tiun interparolon. Sed - ĉar ŝi estas sincera - ŝi ne povis diri, ĉu la Vaganta Judo malaperis taŭzite per momenta vekigo, aŭ diluite en la disaj profundoj de komenciĝanta sono).

\* \*  
\*

Dek-unua apero

Ahasvero aperas al Simplicio

aù

LA DIALOGO PRI LA AMC

\*\*\*\*\*

Ĉu Neo-Stoikus spertis tion, kion aliaj nomis forkapto de spirito ? Ĉirkaù la spektaklo, kiun li vidis, ĉirkaù la vortoj, kiujn li aùdis, vastigas dezerto el stuporo kaj silento. Li scias nenion pri la horo antaù, nenion pri la horo posta. Ĉu li eliĝis el si mem por penetri en iun foran kaj strangan landon ? Ĉu li eniĝis en sin mem sufiĉe profunde por atingi misteran regionon ? Sen ekster aù en si, li ekkonis aferojn, kiuj ekzistas per si mem, sur kiu punkto de la Elipso de la Eterna Estanteco endas ilin situigi ?... Ĉu en la spaco, kiun la homoj nomas nuna ?... Ĉu en la spaco, kiun ili nomas estonta ?... Sed, se, kiel iuj asertas, la vido antaùen estas neebla, ĉu Neo-Stoikus retroiris en sian pasintecon, ĝis li renkontis tiun estontecon?...

Kiam Neo-Stoikus provas diri, kion li vidis, tio, kion li vidis, fuĝas kaj forsvenas. Li kaptas, en tremantaj vortoj, kelkajn pecetojn de la spektaklo. Aliaj malaperas kiel tiaj fluidaj songoj, kiam oni premas ilin por ilin enmeti en parolon. Kaj, inter la aferoj, kiujn li diras, pluraj estas arbitraj, novaj, kreitaj de lia peno mem por ilin esprimi, en logiko, ne en memoro. Kaj li ne sukcesas distingi la parolojn idojn de la vizio, la viziojn idojn de la parolo. Miranta kaj malĝojega, li rigar-

das. Tiuj akvoj, kiuj en vazo dufoje mensoga, ricevas formon kaj perdas ĉian koloron, ĉu estas la samaj, kiujn li vidis meze de la flirtanta maro, meze de la flirtanta lumo, danci sian bluan dancon ?...

Nu, jen estas - veroj kaj mensogoj intermiksitaĵoj - tiö, kion li povas diri.

La pejzaĝo estis senkreska kaj dezertaspekta. Ĝin ĉirkaŭis nudaj ŝtonegoj, nigraĉaj, fenditaj de tenebroj. Malglataj, malhelaj ŝtonoj formis la grundon de la stranga cirko. Ne unu arbo, ne unu floro, ne unu herbero, ne unu akvoflueto. Tamen ja, tie for, brilega de freŝeco, kvazaŭ krianta de verdo, laŭte kantanta de gajaj fontetoj, oazo... Ĉu la spektanto farigas freneza ? Sajnas al li, ke la oazo moviĝas. Jes ja, certe, ĝi alproksimiĝas. Ĉu ĝi estus nura miraĝo ?... Sed, ĉu ne tuta tiu vidaĵo estas miraĝo ?...

La alproksimiĝo de la oazo ebligas vidi. En ĝi estas homo, kiu marŝas. Lin ĉirkaŭas la akvoj kaj verdaĵoj, eble kreitaj de lia ĉeesto. Poste li haltas, kaj la vazo senmoviĝas. La spektanto, kiu fine lin vidas kontraŭvizaĝe, pretervole ellasas grandan krion, unu el tiuj grandaj krioj de sonĝoj, kiujn neniu aŭdas :  
- Jesuo ! Li estas Jesuo !

Efektive, ĝi estas la vizaĝo, kiun ni vidas al Jesuo. Sed, post la granda krio de certeco, jen Neo-Stoikus hezitas. La kreinto de la oazo ne surhavas la senkudraĵan tunikon. Li estas vestita, kiel la loĝantoj de niaj kamparoj, per pantalono kaj bluzo. Kaj li estas en aĝo, en kiu ni malfacile prezentas al ni la filon de Maria. Ni konas lin infano, poste plenkreska viro ; ĝis la dek-dua jaro kaj ekde la trideka. Tiu ĉi estas verŝajne dek-kvin- aŭ dek-sesjara.

Li sidigis mediteme. Lia mano ne iras, kiel ĉe aliaj pensantoj, al la frunto. Ĝi apogiĝas sur lia koro. Ĉu ĝi tro forte batas, tiu koro ? Aŭ ĉu la mano, nekonscia pri antaŭsigna gesto,

jam kunpremas la elverŝigon de estontaj doloroj ?

Fore, veninta de oni ne scias kie, oni ne scias kiam, oni ne scias kiel, alia viro. Li marŝas, kaj li ŝajnas porti ĉirkaŭ si cirklon da dezertigo. Li proksimiĝas al la oazo : flanke de li la arboj krepitas kiel en komenco de incendio. Li eniras : la verdaĵo sekiga kaj la fontoj senakviĝas. La spektanto lin rekonas, kaj granda krio silenta sonas interne de li :

- Ahasvero !

La oazo estas preskaŭ tute velkinta. Apenaŭ, ĉirkaŭ tiu, kiun Neo-Stoikus nomis Jesuo, malvasta verdaĵo kaj murmuro de maldika akvofluo rezistas al la malbona ĉeesto.

Ahasvero ekvidas la junulon, kiu rigardas lin kun senmezura mildeco. Liaj pugnoj fermiĝas, lia kapo kliniĝas en malama movo ; por malamika impeto, li faras paŝon retroen ; sed, sub la rigardo, kies mildeco insistas, ĉu io en li malstreĉiĝas ? Sur liaj lipoj ekflirtas rideto - oni ne scias, ĉu ĝi esprimas kruelecon aŭ simpation. Pli probable stuporo, deklaras al si Neo-Stoikus.

AHASVERO : - Kiu estas cia nomo ?

LA JUNULO : - Simplicio.

AHASVERO : - Ha! ha! ha! ci ne scias, kiu ci estas.

SIMPLICIO : - Mi ne scias.

A. : - Ĉu neniu iam diris ĝin al ci ?

S. : - Neniu.

A. : - Ĉu ci ne rekonas cian nomon, kiam ci legas ĝin en libroj ?

S. : - Mi plu ne legas. La libroj estas mensogaj aŭ frenezaj. Ili tro malklarigis la komencon de lumo, kiu estas en mi.

A. : - Strange ! Ĉu do estas mi, kiu instruos al ci, kiu ci estas !

S. : - Jes, ŝajnas al mi, ke estas ci. Mi jam sentas min filo de cia alproksimiĝanta rivelilo.



Mia koro impetas al ci kiel al patro.

(Li etendas la brakojn kaj faras paŝon al Ahasvero)

A., kun haltiga gesto : - Ĉu ci scias, ĉu mi cin amas, mi, aŭ ĉu mi cin malamas ?

S. : - Kiel homo povus malami homon ?

A. : - Ĉu ci scias, ĉu mian rivelon mi ne penetrigos en cin kiel glavon ?

S. : - Senprokraste penetrigu en min tiun glavon el lumo kaj amo.

A. : - Povra infano !

S. : - Ci kompatas min : ci do vidas ja, ke ci amas min.

A. : - Povra infano ! Li suferos ankoraŭ pli ol la antaŭan fojon.

S. : - Sed mi petas nenion krom sufero, se mia sufero povas kaŭzi al ci iom da bono.

A. : - Ci akceptus malbonon sur ci interŝange kun bono por mi, kiun ci eĉ ne konas ?...

S. : - Mi cin konas : ci estas homo.

A. : - Por mi, kiu aspektas malice, kaj kiu estas malica ?...

S. : - Iuj homoj aspektas malice. Iuj homoj ankaŭ, en certaj tagoj, surmetas maskon.

A. : - Mi, mi estas malica. Eĉ la aferoj tion scias. Ĉirkaŭ mi la verdaĵo sekigas kaj velkas. Mi kunportas veran inferon.

S. : - Neniam ci sciis vidi en ci mem nek en la aferoj. Rigardu pli bone.

A., fermante la okulojn : - Ĉu mia malamo estas nur eraranta amo ?

(Li remalfermas la okulojn, rigardas ĉirkaŭ si, en ekmiro). Ĉio rekreskas. Jen mi produktas la efikojn de bonfara potenco.

S. : - Ĉu ci estas certa, ke iam ci estis malica ?

A. : - Mi jam ne scias. Ĉu antaŭe mi mensogis al mi mem ? Ĉu nun ? Oni mensogas senkonscie.

S. : - Oni ĉiam mensogas, krom kiam oni diras : "Mi amas."

A. : - Tamen ŝajnas al mi, ke mi estis akre malica.

S. : - Eble, por ke ci povu fariĝi bona. Kred-eble, oni tiom ĝojas fariĝante bona... Ĉu ci ne sentas grandan ĝojon ?

A. : - Strangan ĝojon, pro kiu mi suferas... Dissiron de ĝojo... Ĝojon, kiu ne povas el-flori... Ion, kvazaŭ infano, kiu ne sukcesas eligi el la patrino.

S. : - Helpu cian ĝojon, por ke ĝi forlasu sian doloran maskon kaj ĉesu esti batalo. Hastu fariĝi bona.

A. : - Ho ve! ho ve! mi ne povas fariĝi. Ĝi estas mia suferado, kiu dum sekundo prenis al si maskon de ĝojo ; ĝi estas mia eterna malvenko, kiu dum sekundo havis rideton de venko. Ho ve! ho ve! la mensogo de espero forsvenas, kaj mia impeto de frenezo refalas en la fundon de mia realo. Ho ve! ho ve! mi estas tiu, kiu ne povas fariĝi.

S., alproksimiĝante kaj karesante per la mano la vizaĝon de Ahasvero : - Mi ne volas, ke ci suferu. Mi volas, ke ci estu feliĉa.

A., anhelante : - Ĉie, kie pasas cia mano, mi fariĝas. Ĉie, kie cia mano min tuŝas, mi estas feliĉa. (Lia vizaĝo ja ricevas la suplecon de la vivo. El liaj okuloj eldevenas homeca rigardo. Liaj lipoj ridetas kiel aliaj lipoj.) Donu cian manon. (Li metas la manon de Simplicio al sia brusto, ĉe la loko, kie devus bati la koro.) Kion ci sentas ?

S. : - Tio estas pli malvarma ol cia vizaĝo. Tio estas pli dura. Tio estas pli malamika. Tio estas pli mensoga.

A. : - Nenio batas, ĉu ?

S. : - Nenio batas... Kion fari ?

A. : - Premu tre forte.

S. : - Mi premas per mia tuta forto.

A. : - ... Kaj ordonu al mia koro.

S. : - Mi ne scipovas ordoni al koroj... Ŝajnas al mi, ke baldaŭ mi povos.

A. : - Provu... Diru al ĝi : "Iru! iru!"

S. : - Mi timas ne sukcesi... Iru! iru!

(Longa atenda silento)

A. : - Foriru. La malbono, kiun ci faris, ci estas senpova por ĝin malfari.

S. : - Mi faris malbonon, mi ?

A. : - Jes, kiam ci estis nomata Jesuo.

S. : - Jesuo!... Jesuo!... Ho stranga lumo...

Mi estas Jesuo... Ha! nun mi scias, kiu mi estas, kaj mi scipovos ordoni al la koroj.

(Li etendas la manon al la brusto de Ahasvero. Ahasvero lin haltigas.)

A. : - Mi ne volas. Pardonu, ke mi diris al ci cian nomon, ke mi eble donis liberan kuron al cia destino.

S. : - Mi cin benas, ho patro mia, ke ci rivelis min al mi mem. Mi cin benas, tial ke ci ĵus donis al mi mian potencon.

A. : - Malfeliĉulo ! Ci do nescias, je kioma prezo oni ordonas al la koroj ?

S. : - Mi vidas. Skarlata mantelo atendas miajn ŝultrojn, dornokrono malsupreniras al mia frunto, kraĉaĵoj kaj vangbatoj serĉas kaj trovas mian vizaĝon, vergoj svinge frapas mian korpon. Miaj manoj kaj miaj piedoj estas tratruataj de najloj, mia flanko estas pikata de lanco. Mi pendas kiel tro peza frukto de la kruca arbo. Kaj al mi de ĉiuj flankoj supreniras insultoj. Poste venas la morto, en forlaso de la ĉielo, inter huadoj de la tero.

A. : - Kaj ci akceptas ĉion tion ?...

S. : - Mi konsentas pagi la prezon, kiom ajn alta ĝi estu, per kiu oni aĉetas la povon fari ion da bono.

A., skuante la kapon : - Ĉion tion !...

S. : - Sed ni malbone rigardas, ho patro. Ne estas tio.

A. : - Kion ci diras ?

S. : - Tion mi vidas en la lumo, el kiu mi elvenas. Sed la nebuloj, al kiuj mi marŝas, kred-eble kaŝas malsamajn kaptilojn.

A. : - Ŝajnas ja, ke mi antaŭvidetas...

S. : - Tio, ĝi estas la antikva mono. Hodiaŭ ĝi ne plu validas. La oro el sufero, per kiu mi pagos la saman prezon, surhavas alian stampo. Mia reĝeco super la koroj, necesos, ke mi ĝin aĉetu per nova mono.

A. : - Diru pri tiu nova mono.

S. : - Ĝin oni ne nete vidas antaŭ ol pagi. Ĝi estas ankoraŭ enfermita en la mistero de mia monerujo, kaj mia blindpalpanta mano malprecize ĝin divenas. Sed, ĉu la longaj turmentoj de malsato ne estas unu el la novaj monoj, per kiuj la profetoj pagas la rajton diri la veron kaj fari la bonon ?

A. : - Ho mia filo, mi sentas la larmojn de kompatato supreniri ĝis miaj okuloj.

S. : - Ho mia patro, de kie ili suprenirus, se ci ne havus koron ?

(Li metas la manon sur la bruston de Ahasvero)

A. : - Faru, kion ci volas. Mi ne faros plu al la Bonfaranto la insulton lin forpeli for de la bonfaro.

S. : - Koro, estu do tio, kio ci estas. Iru! iru!

A., en ĝojkrio : - Ha! mi sentas ĝin ekbatanta. Dankon, ho filo mia : fine mi povos morti !

S. : - Fine ci povos vivi.

A. : - Vivi!... Por kio kaj por kiu ? Kie estas mia patro ? Kie estas mia patrino ? Kie miaj fratoj ? Kie mia fianĉino ?

S. : - Ĉu ci scias, ĉu kun vizaĝoj novaj, sed heligataj de ridetoj, kies lumo rivelas la estontecon, ili ne vivas tie tute proksime, sur la kamparo aŭ en la urbo ?

A. : - Kiel gravas al mi, ke ili denove ekzistu, se miaj okuloj ne povas ilin rekoni ? Se, ilin amante, mi riproĉos al mi, ke mi forgesas ilin por aliaj ? se mia fideleco estas honta kaj dolora kiel perfido ?...

S. : - Kaj mi, ĉu do ci ne amas min, ho patro mia ?

A. : - Ĉu mi cin amas, cin, kiu min savas !...  
 Ĉu mi cin amas, cin, en kies estonteco mi vidas  
 tion da doloro kaj tion da heroeco... Cin mi  
 amas profunde, ne nur pro la motivoj, kiujn mi  
 povas diri, sed ankaŭ pro mil motivoj, kiuj  
 flirtas en mi, obskuraj, nekapteblaj, emociaj  
 ĝis frenezo.

S. : - Ci diris al mi unu el miaj nomoj, ho mia  
 patro. Sed ci nescias mian nomon plej homan.

A. : - Diru al mi cian nomon plej homan. Ŝajnas  
 al mi, kvazaŭ mi mortus pro soifo, kaj ĝi estus  
 min revivigonta per dia freŝo.

S. : - Mi estas nomata Koro. Do, ĉar ci amas  
 min, amu ĉiujn korojn, povra koro, kiu fine po-  
 vas bati.

A. : - Ho mia filo, mi volas tion, kion ci volas,  
 kaj mia koro ĉiam batos laŭ la ritmo de cia. Mi  
 amos ĉion, kion ci amas, mi ripetos la vortojn,  
 kiujn ci diras, mi semos la grajnon, kiun ci  
 semas. Kaj mi ne similos al la ĉiamaj disĉiploj,  
 al tiuj, kiuj fuĝas kaj disiĝas antaŭ la danĝero,  
 se la Majstro rifuzas al ili la ebrion de kruda  
 kaj materia batalo. Mi cin sekvos fidele ĝis la  
 fino, kaj mi mortos, kiam ci mortos.

S. : - Ne, patro mia, ci postvivos min... Ci  
 atendos por vidi, ĉu mi ne reviviĝos el inter  
 la mortintoj.

(...Sed, subite, la vidanto ĉesis vidi.)

FINO

## GLOSARO

\*\*\*\*\*

1. Neologismoj troveblaj en PIV

besti/o	epitalam/o	konjunkci/o (3)	rumor/o
brusk/a	eskap/i	krepit/i	sinistr/a
brutal/o	fragil/a	lontan/a	simni/o (ĉe "hu")
dajmon/o	hierofant/o	neg/i	stop/i
degn/i	imperator/o	precesi/o	stupor/o
diaspor/o	kompan/o	prizon/o	tenebr/o
dokt/a	kondens/i	prokonsul/o	vor/i

2. Ne en PIV

epiciklo : trajektorio de astro, kiu laŭiras cirklon, kies centro laŭiras alian cirklon (Kp.epicikloido,PIV)

gimnosofistoj (nudaj saĝuloj): nomo donita de la antikvaj grekoj al certaj hindaj filozofoj.

riŝio : hinda sanktulo.

3. Propraj nomoj esperantigitaj

Ĉiuj troveblaj en PIV, escepte de jenaj :

Aniceto : kristana martiro en la regado de Mark-Aŭrelio.

Attalo : alia martiro.

Arrieno : greka historiisto.

Blandino : kristana martirino, liverita al sovaĝaj bestoj en la Liona amfiteatro (177 p.K.).

Gjordano Bruno : itala filozofo (1548-1600), kontraŭbatalis skolastikon kaj aristotelismon ; brulekzekutita en Romo kiel herezulo.

La Boesio (Estienne de La Boétie) (1530-1563). Lia "Diskurso pri Memvola Servuto" aŭ "Kontraŭ-Unu", aperis en 1574-76. (esperanta traduko de ROL, eld. LJP, SAT-broŝurservo).

Sferus : la dio Sfero, prezentanta la perfektan formon de la Kosmo.

Sotiono : pitagorana filozofo.

Samajo aŭ Sammajo : kontraŭulo de Hilelo (vd. PIV).

#### 4. Propraj nomoj ne esperantigitaj

Fouquier-Tinville (Fukje' Tenvil') (1746-1795). Publika akuzisto ĉe la Revolucia Tribunalo, dum la Teroro.

Marat (Mara') (1743-1793). Fizikisto kaj fama revoluciano, murdita dum la Teroro.

Robespierre (Robespjer') (1758-1794). Advokato.

(En PIV, ĉe Monto, 2 : Robespiero estis la ĉefo de la Monto).

Shylock (Ŝajlok) : ĉefa persono de la Ŝekspira teatraĵo "La Venecia Vendisto" - juda procentegisto.

Villiers de l'Isle-Adam (Vilje' d'liladam') (1838-1889). franca verkisto kaj poeto, mortinta en mizero.

Kelkaj aliaj propraj nomoj ŝajnas sufiĉe klarigitaj de la kunteksto.

\* \*  
\*

Tiu ĉi broŝuro aperas en la kadro de la broŝurservo de Sennacieca Asocio Tutmonda.

\*\*\*\*\*

Directeur de publication : J.Simonet. CPPAP n°58651.

Imprimeur : C.Baudé. F 47340 Laroque Timbaut.

Enhavtabelo  
\*\*\*\*\*

Unua apero.		
Ahasvero aperas al Lazaro à		
LA DIALOGO PRI LA MORTO		3
Dua apero.		
Ahasvero aperas al Seneko à		
LA DIALOGO PRI TEMPO KAJ SPACO		12
Tria apero.		
Ahasvero aperas al Mark-Aùrelìo à		
LA DIALOGO PRI LA POTENCO		41
Kvara apero.		
Ahasvero aperas al la Ĵakvoj à		
LA DIALOGO PRI LA RIBELC		57
Kvina apero.		
Ahasvero aperas al La Boesio à		
LA DIALOGO PRI LA MEMVOLA SERVUTO		69
Sesa apero.		
Ahasvero aperas al Galilejo à		
LA DIALOGO PRI LA SCIENCO		86
Sepa apero.		
Ahasvero aperas al Kantio à		
LA DIALOGO PRI LA KRITIKO		106
Oka apero.		
Ahasvero aperas al Niĉeo à		
LA DIALOGO PRI LA SUPERHOMO		114
Naŭa apero.		
Ahasvero aperas al Neo-Stoikus à		
LA DIALOGO PRI LA JUSTO		125



Deka apero.		
Ahasvero aperas al Festiva aù		
LA DIALOGO PRI LA SONGO		151
Dek-unua apero.		
Ahasvero aperas al Simplicio aù		
LA DIALOGO PRI LA AMO		162
GLOSARO		171

\* \* \*

Korektendoj			
Paĝo	linio	estas	devas esti
9	24	<u>unua</u> j	<u>unu</u> oj
64	28	<u>tio</u> , kion	<u>tion</u> , kion
91	27	<u>konfirmigis</u>	<u>konformigis</u>
96	- 9	<u>nomi</u> nomon	<u>doni</u> nomon
112	- 8	<u>nuberoj</u>	<u>ruberoj</u>
162	13	<u>Sen</u> ekster	<u>Se</u>
163	23	<u>vazo</u>	<u>oazo</u>

La  
BROŝURSERVO  
de  
S.A.T.

adreso : La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut

poŝtkonto : La Juna Penso, 3 374 04 M Bordeaux

sub la ŝildo de "La Juna Penso" aŭ de "Laŭte!"  
celas etkoste eldoni diversajn manuskriptojn kaj  
reeldoni elĉerpitajn tekstojn.

Mendoj : La prezoj, en francaj frankoj, inkluzivas  
la afrankon por minimume 25FF-mendo. Por malpli ol 25FF  
aldoni 20 % por la afranko. Eblas uzi la mendkodon.

Abonoj : Sendi aŭ ĝiri minimume 50FF-provizon. Oni tiel  
ricevas ĉiujn novajn E-tekstojn ekde la kuranta jaro  
ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo.

Rabato : La abonantoj ĝuas 20 % da rabato por la novaj  
eldonaĵoj. Ankaŭ la libroservoj por la mendoj superaj  
al 50FF.

\*\*\*\*\*

Listo de disponeblaj broŝuroj Mendkodo. FF

\*\*\*\*\*

Adamaĵoj (Lanti)	AD. 5.
Antropogenezo (Pannekoek)	AG. 7.
Abundo kaj konsumsocio (Duboin/Berthier)	AK. 3.
Anarkio kaj organizo (Malatesta)	AO. 3.
Argentina novelaro I	AR1. 4.
Argentina novelaro II	AR2. 5.
La bazoj de anarkiismo (Balkanski)	BA.10.
La blankaj gardistoj (Heiligstein)	BG. 5.
Civila malobeemo (HD.Thoreau)	CM. 3.
Durruti, simbolo de la hispana revolucio	DU. 2.
Kiel diri...? (E-frazeologio)	DI.15.
Esperanto or English? (Masson)(en la franca)	EE. 6.
Espéranto de poche (por franclingvanoj)	EF. 3.
Esperanto en 24 páginas (por hispanoj)	EH. 1,5
Esperanto su 24 pagine (por italoj)	EI. 1,5
Etiko I (Kropotkin)	ET.10.
La forto de la fortaj (J.London)	FF. 2,5
Fronte al la vivo (Krishnamurti)	FV. 3.
La homa animo sub socialismo (O.Wilde)	HA. 1,5

Historia materiismo (Pannekoek)	HM. 2,5
Humanitaristaj principoj (Relgis)	HP. 2,5
Individuismo en Antikveco (Han Riner)	IA. 5.
Initiation à l'espéranto (An Kaù)(en la franc)	IE. 3.
Individuisma Manlibreto (Han Riner)	IM. 3.
Kontraŭflue (Valo)	KF. 8.
El la kara infaneco (Valo)	KI. 8.
Katastroplano pri Fessenheim + Wyhl	KP. 5.
Lingvaj anguloj (Baronnet)	LA. 6.
La laborista esperantismo (Lanti)	LE. 2.
La liberecana penso (citaĵoj)	LP. 2.
Liberecanaj vivkonceptoj (Fontaura)	LV. 2,5
Miguel Cervantes (Han Riner)	MC.10.
La migrantoj en Francio nuntempe (de Cazenove)	MI. 4.
Mistero de nia surtera ekzisto(Archdeacon)	ME. 2,5
Memvola servuto (La Boesi)	MS. 2,5
Mia vivo. Artikolaro. Poémaro (Bartelmes)	MV. 5.
Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg)	NA. 2,5
Manlibro de nova homo (Rufegon)	NH. 1,5
Neperforta revolucio (T.Ebert)	NR. 1,5
Parabolo pri la cisterno (Bellamy)	PC. 1.
La rajto de pigro (Lafargue)	PI. 3.
Por nia medito (Han Riner/Alain)	PM. 2,5
Politika neperforto (M.A.N.)	PN. 5.
Por la paco (citaĵoj)	PP. 3.
La piramido de l'tiranismo (Domela Nieuwenhuis)	PT.3.
Revolucia registaro, k.a. tekstoj(Kropotkin)	RA. 5.
Rimarki (Krishnamurti)	RI. 0,5
La rentumo, kiun ni pagas (W.Schmid)	RP. 0,5
Du rêve à la réalité (Masson)(en la franca)	RR. 5.
Rido sanigas! (J.Burger)	RS. 3.
*.Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)	SJ. 8.
Sindikatismo - Sovetoj (Pannekoek)	SS. 3.
Tabakismo kaj emancipiĝo (Masson)	TE. 3.
La triviala homo (Ingenieros)	TH. 6.
Tiu, kiu ne volas morti (Jean Rostand)	TK. 1.
Tra la mondo per biciklo k esperanto(AlfaBeta)	TM. 4.
La veraj interparoloj de Sokrato (Han Riner)	VI.10.
Vivi en komunumo (M.Schneller)	VK. 1.
El verkoj de E.Lanti	VL. 9.
Vortoj de Kamarado E.Lanti	VO.15.

\*\*\*\*\*

\* disponebla fine de 1980.